

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Anglès o bé Esperanto?

D'un viatge per Escandinàvia n'he tret una impressió pessimista de la difusió de la llengüa francesa. En un congrés internacional, en el que jo hi prenia part, ja al començament fou anunciat, que es deixava d'usar la parla francesa i la traducció en aquesta llengüa, perquè gairebé cap dels presents la comprenia. En un altre, de més importància, fou usat no més en tercer lloc i encara per consideració a la delegació francesa i sense trovar ressò en les demés. L'anglès dominava, com a parla acceptada per tots, sobretot al començar. Però, tan mateix, de mica en mica l'alemany devenia més usat i més general en els últims dies.

Mai ha passat en un Congrés Esperantista, que els oients hagin deixat de comprendre als oradors, com jo vaig poguer-ho comprovar a Stóckolm, quan els estrangers provaven de parlar anglès. Oi més de la excessiva abundància de sons difícils, l'anglès té encara un altre defecte molt perillós per a la comprensió: en sa més gran part està constituït per monosílabs. Moltes frases contenen no més mots monosilábics: *Where have you have been?* *In this room with two friends of mine*. Dotze mots, dotze síl·labes, deu sons de vocal diferents. Si n'errèn una, perden el sentit de tota la frase.

L'alemany és certament molt més senzill de fonètica. Per això fou més i més emprat en els últims dies del mencionat congrés de Stóckolm. Els seus sons són bastant senzills. Si fos igualment aixís en la gramàtica i sintaxis, tindria un bon pervindre. Malauradament l'ordre de les frases destorba la fàcil comprensió i la gramàtica fa perdre el coratge de parlar-lo. Hom te por d'errar-se en les finals del plural o bé en l'us de l'article. En comptes de pensar en el tema del seu discurs cal esforçar-se a recordar si la lluna és masculí i el sol femení o bé al revés. Igual passa en francès.

Cap propaganda es tan eficaç com la comparació entre l'us de l'anglès i l'us de l'Esperanto en un mateix congrés.

(De Esperanto número 12).

EDMOND PRIVAT

700.014-B Esp- 1928-1930



KATALUNA ESPERANTISTO"

OFICIALA ORGANO DE
KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

Membra kotizaĵo: 3'50 p.; Grupoj: 1'20 por membro.

Jarabono: 6 p. enlande kaj 6 sv. fr. internacie, provekzemplero 2 respondkuponoj.

Federacia sidejo kaj redaktejo: carrer València, 245-BARCELONA

LA DEK DEVOJ DE LA ESPERANTISTO

1. Bone sciŭ la lingvon, traktu ĝin kun respekto, kaj lasu la versfaradon al poetoj.

2. Esperanton uzu parolante, studu legante kaj ne fuŝu skribante.

3. La plibonigistoj diskutu; vi Fundamenton sekvu kaj fide-la restu.

4. Propagandu ĉiam, ne ĉie; klarigu, ne prediku; rakontu faktojn, ne esperojn.

5. Kion vi povas lerni nur en unu semajno, ne instru en unu horo; el malgravajoj ne faru regulon, kaj el la regulo ne faru malgravajon.

6. Verkante en Esperanto, ne kredis interesa, kion nacilingve neniu legus; ne imagu, ke preseraroj plibeligas libron, ne malesperu, se mankas aĉetantoj.

7. Al grupo aliĝu; la kunvenon vizitu; Esperanton parolu. Subtenu K. E. F.

8. Atentu, ke internacia lingvo vivos nur per uzado; memoru, ke tial internacia organizaĵo estas necesa, senlace varbu por U. E. A.

9. Legu gazeton, por ke vi konu faktojn; novajn abonu, por ke ĝi povu ekzisti; kunlaboru, por ke ĝi estu interesa.

10. Por Esperanto kiel movado agu; por ĝi kiel realaĵo pagu, kaj kiel altan idealon konservu ĝin en via koro.



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gataro* Redakcio: *Carrer València 245 BARCELONA*

DIREKTORO: MARIAN SOLÁ

Nia Kongreso

En la antaŭa numero de nia gazeto ni anoncis ke baldaŭ oni povos doni sciigojn pri la venonta kongreso. Jen ili estas. Ĝi okazos en proksima Septembro en Vinaroç. Multajn malfacilaĵojn renkontis la Direkta Komitato de K. E. F. por organizi kongreson en 1928^a; pro lokaj cirkonstancoj pli ol du esperantistaj grupoj devis rezigni. Sed fine dank'al senlaca agado de nia komitatano S-ro Sebastia Chaler, kiu estas ja filo de Vinaroç, ni sukcesis trovi lokon por festi inde la Internaciajn Florajn Ludojn kaj nian ĉiujaran kunvenon. Niaj legantoj trovos en alia rubriko de nia gazeto raporton pri la vojaĝo kiu tien faris S-roj Dalmau kaj Chaler kaj kiu tiel valora estis kaj estos por la propagando de nia lingvo en urbo kie tre malmultaj personoj ĝis nun ion sciis pri Esperanto. La aŭtoritatoj de la urbo kaj ĉiuj societoj estas apud ni kaj ĉiuj helpos kiel eble plej multe nian solenajon. Se nur niaj federaciaĵoj helpos nin per granda amaso de partoprenantoj oni povas esperi tre grandan sukceson.

Al ĉiuj esperantaj verkistoj ni rekomendas respondi la Alvokon por la Internaciaj Floraj Ludoj kiun ili povas legi en tiu ĉi numero de nia gazeto. Ni ja deziras ke ili estu eĉ pli abundaj kaj riĉaj, se eble, ol la antaŭaj.

Ĉar nia kongresurbo troviĝas en Valencia regiono, la Direkta Komitato de K. E. F. turnis sin al la valenciaj amikoj kun la deziro ke ili ankaŭ organizu propran kongreson en la sama dato kaj sama loko. Estas nia plej kara espero ke ili akceptos nian deziron kiu povas alporti fekundan rezulton por la propagando.

Al ĉiuj niaj legantoj kaj amikoj plej feliĉan novjaron.

M. S.

Vinaroĝ XV^a Kongreso de K. E. F. XIV^aj Floraj Ludoj. 8 - 9 Septembro 1928

Jen katalunlingva urbo ekster Katalunujo: Vinaroĝ, en la provinco Castelló de la Plana, en la regno Valencio. Kiel antaŭe Palma de Majorĝo, kaj Sóller en la Balearaj Insuloj, nun Vinaroĝ, deziras kaj petis la honoron esti en 1928 urbo de la Internaciaj Florludoj kaj de la K. E. F.-a. Kongreso.

Neniu samideano ankoraŭ estis en Vinaroĝ, sed la Vinaroĝano Sro. Sebastià Chaler, nia kara vicsekretario, kiu de antaŭ longe loĝas en Terrassa, sukcesegis interesi siajn samurbanojn pri nia sankta afero, kaj nun danke kaj fervore multaj vinaroĝanoj volas lerni, jam lernas Esperanton, kaj la tuta urbo celas konatiĝi kun nia afero pere de niaj solenaj kunvenoj en 1928, en Septembro, la 8an kaj la 9an.

Antaŭ kelkaj tagoj Sro. Chaler kaj mi veturis al lia naskurbo, kaj en la salono de la urbdomo kunvenis la Vinaroĝaj aŭtoritatuloj kaj granda publiko, kiu avide aŭskultis niajn paroladojn pri Esperanto kaj la jaraj solenajoj de nia Federacio. Interesege montris la progresemaj civitanoj de tiu koninda urbo, kun komerca haveno, kun mirindaj ĉirkaŭaj oranĝarbaroj, kun najbara apudmara antikva Palaco kastelo Penýscola, kie estas la antikva sidejo, tombejo kaj memorajejo de Petro Luna, antipapo nomita Benedictus XIII, elektita, post la morto de Klemento VII, de la francaj kardinaloj; kreinto de la Universitato Santa Andreo en Skotlando.

Vinaroĝ, belega ĝardeno, ĉarma banejo, amikinda civitanaro, lova esperantistejo, ni salutas vin, Esperantujo bonvenigas vin, ni dankas nian kamaradon, vian karan filon Chaler, kiu malkovris al ni viajn virtojn, vian progresemon.

Plenkonfide ni povas inviti la samideanaron al la XIV^aj. Internaciaj Floraj Ludoj, al la XV^a Kongreso de K. E. F., al la alloga vizito, al Vinaroĝ.

DELFI DALMAU
Prez. de K. E. F.

La granda mistero

Ho, jen de la vivo la granda mister'!:
pro kio ni vivas sur ĉi tiu ter'?
Ĉu la viv' estas mort', ĉu la mort' estas viv'?
Ĉu la viv' ne devenas de iu motiv'?
Ĉu post nia vivo do restas neni'
krom nia kadavro, malvarma mumi'?
Ĉu ni estas nur vermo, nur besto, nur plant'!?
Jen malesperiga, terura demand'!
La vivo estas konstanta batal'
de l'kruda realo kontraŭ l'ideal,
en kiu venkadas ja super la fort'
finfine sensenta, fatala la sort'!
Al kio do servas la homa labor',
se flugas ĝi kiel fumnubo for'?...
Restados enigmo, ĉiama mister'
pro kio ni vivas sur ĉi tiu ter'...

Jan van Schoor



Alvoko por la XVI^a Internaciaj Floraj Ludoj

kies solena festo okazos kun la XV^a Kongreso de K. E. F.

Al vi, Esperantaj verkistoj, inspiruloj el ĉiuj landoj, saluton!
kaj inviton partopreni la jenajn konkursojn:

ORDINARAJ TEMOJ

ORIGINALAJ TEKSTOJ

I.—Versaĵo kantanta *Amon*.

II.—Proza *Ama* verkaĵo.

TRADUKITAJ TEKSTOJ

I.—Esperantigo de la jena kataluna versaĵo:

VORA EL BARRANC DELS ALGADINS

Vora el barranc dels Algadins
hi ha uns tarongers de tan dolĉ flaire,
que, per omplir d'aroma l'aire,
no té lo món millors jardins.
Allí hi ha un mas, i el mas té dins
dolĉos records de ma infantesa;
per ells ĵo tinc l'ànima presa,
vora el barranc dels Algadins.

Vora el barranc dels Algadins
s'alcen al cel quatre palmeres;
el vent, batent ales lleugeres,
mou son plomall i sos troncs fins.
En elles, milers de teuladins,
fan un soroll que el cor encisa.
Qui oir pogués sa xillerissa,
vora el barranc dels Algadins.

Vora el barranc dels Algadins
l'aigua corrent los camps anega;
en sos espills lo sol llampega,
i traŭ l'arròs verdosos brins.
Sota el tic-tac en los molins,
i, al caure el sol, caĉadors destres
a joca van d'ànecs silvestres
vora el barranc dels Algadins.

Vora el barranc dels Algadins
 mourà demà les palmes l'aire,
 li donaran els horts son flaire
 i sa cantúria els teuladins.
 El mas demà guardarà dins
 dolços records e imàgens belles
 jo no podré gojar ja d'elles
 vora el barranc dels Algadins.

TEODOR LLORENTE

Esperantigo de la jena kataluna prozajo.

EL PUNT DE DOLÇOR

L'Antonet ha superat tot just aquell any antipàtic en què la naturalesa d'un hom sembla que mudí de pis. Vull dir que l'Antonet ja és un adolescent sense vacil·lacionís. Quan parla, no és allò de dues síl·labes de baríton i les dues següents de tiple: les cordes de la seva veu són primès i trémoles, però uniformes. Sota el nas, el descarat borrhissol de préssec s'ha convertit en un vellut de seda, clarer i sense malícia, però cotitzable com a pel. Si encara anés de marinera, se'l pendria de lluny per un carrabiner de port dulcificat. Però va d'home; i la mamà, petita i grassona, ja no es sorprén que sigui dos dits més alt que ella. Frueix ja d'una pensió setmanal fixa, que li abasta just per a anar dijous i diumenges al cinema—en el meu temps amb els diumenges sols n'hi havia prou per a estar al dia—i fumar de quaranta, canviant-se ell mateix el paper. Cova potser una afició platónica a l'aviació: però ni la boxa ni el futbol ni el ciclisme, no han convertit la seva adolescència en res de ferest, provocatiu i impermeable als degotissos obacs i silenciosos de la sensibilitat. Sense lluita, s'ha decidit pel romanticisme. Diguin el que vulguin, el romanticisme és una de tantes vocacions.

Es un vespre de diumenge, i dia de Santa Llúcia. L'Antonet ha fet cap a la fira amb el seu amic August. Per a les dues famílies que els han fet companys de dijous i diumenges, l'un s'espera que sigui un fre per a l'altre si insinuava el peu en cap pendís de dissipació. Han de tenir, demés, els itineraris aprovats prèviament.

En mig de les empentes enriolades, entre les innúmeres, minúscules viles de cartró i de suro que les flametes d'acetilén il·luminen com uns intermitents meteors, l'Antonet i l'August cerquen l'aventura. Deu vegadés l'August ha escoméés altres tantes donzeles, amb frases rituals. Si és davant d'una parada haurà dit:

—Li agraden aquestes casetes? Vol que li'n compri una?

Si és en mig dels rierols arremorats i sinuosos de la gent, haurà protegit:

—No té o no tenen, por d'anar tan sola, o soles?

Però la fortuna ha somrigut menys que elles. La conversa no ha agafat. L'August ho atribueix a la tímidesa de l'Antonet. A les envistes d'un grup de donzelles, prou ne fan tot d'una un repartiment entre ells dos, com uns pirates; però en ésser el moment de l'escomesa, l'Antonet no es mou del costat de l'August, té por d'ésser vist, l'estira del braç.

A l'últim, una ha respost. No cap cosa alada, ni plena de gràcia, ni de promeses; però almenys ha parlat. Es un triomf? L'Antonet ha hagut de posar-se vulgues no vulgues al costat de l'altra germana, ha hagut de parlar-li també. Han arribat així fins davant d'una escaleta rónega, amb un llumet de gas que xiula, tan estreta que dos enamorats ja l'embussarien tota. L'Antonet ha demanat a la seva parella com se diu. Ella de primer ha respost: ¿Qué en traurà de saber-ho? Ell ha insistit una altra vegada. Llavors ella diu el primer nom que se li acudeix:

—Lola.

I ell fa, però mig ennuegant-se:

—Jo em dic Antonet.

Des d'aquell moment l'Antonet es declara, dins el seu cor, oficialment enamorat. Però no gosa dir-ho a l'August; aquest, cosa imprevista, ni tan sols parla més de l'aventura, riu grassament, fins té esma de caragolar un cigarret, fent una boleta del paper vell i llençant-la despectivament a una banda; fumant, mai l'Antonet no l'havia vist escurar-se la gola i escupir d'aquella manera.

Però he de fer el conte de l'Antonet, no el de l'August. L'Antonet s'enfila somniosament al seu quart pis; cada graó, un pensament nou. Té un impuls de confessar l'enamorament a la mare; però l'atura com un instint de conservació, una por de complicacions imprecisables.

Passen dies, i en el silenci continua l'obra de cristal·lització, la primera figura de la qual havia tingut per escena un pessebre immens, amb rieres de paper d'argent, i prats de molsa, i rabadans amb el flaviol i rabadanes en éxtasi.

El matí de Nadal, el papà diu a l'Antonet:

—Antonet, ¿i si aquest any ja hi anaves tu a comprar les neules?

El minyó s'enrojola. L'any passat, aquesta comanda semisacra hauria estat per a ell com una declaració de majoria; aquest

any, li fa l'efecte d'un rebaixament de la seva categoria d'enamorat. Però no hi ha resistència possible; allò que hom diu a la promesa quan festeja, es podria també dir al genitor: una insinuació és una ordre.

L'Antonet pren la suma justa per a fer la compra, més deu céntims per al tramvia de tornar. Quan baixa el primer graó, el papà repeteix:

—Sobretot que siguin del Forn de Sant Jaume... Entrant al carrer de la Llibreteria...

L'Antonet baixa tres graons més:

—Demana vint-i-cinc neules, sobretot dígues que te les donin de llet.

Ja era sabuda l'adjudicació de cada Nadal: deu per al papà, nou per a la mamà, sis per a ell. ¿S'alterarien aquell any les normes distributives?

L'Antonet arriba al pis de sota. El papà s'aboca encara i torna a advertir:

—Sobretot demana-les de llet!

L'Antonet es precipita escales avall, pregonament ofès, ell que ja somniava de formar una família.

Al Forn de Sant Jaume hi havia cua. Fet i fet, quan prengué el tramvia ja era hora de dinar. Ni un seient: romangué a la plataforma passablement plena vergonyós de la paperina, dissimulant-la contra la seva cuixa. A la primera parada pujaren dos homes més; a la segona dos homes i una dona; a la tercera, «Ella».

El cor li botà com un cabrit innocent, com si li pugés fins al paladar: de Santa Llúcia que no l'havia vista. Ella el saludà lleument amb els ulls, però res més; éssent impossible d'entrar més endins, romangué davant mateix d'ell, d'esquena: una atmósfera d'un centímetre de fondària l'en separava, però hi cabien fantasieigs infinits. Potser ell li hauria adreçat la paraula, si no hagués estat el rubor de les neules. Tement per elles, d'arran de cuixa les havia pujades fins arran de pit, tenia la paperina amb totes dues mans, com un estoig de relíquia.

El conductor féu una aturada un poc brusca: la gent de la plataforma s'inclinà un moment enrera, com un joncar. L'Antonet sentí l' enamorada damunt seu: el cervell giravoltà, brunzí, semblà que li volgués sortir per totes les eixides del cap, com si li hagués augmentat incommensurablement de volum. Ensems alguna cosa cruixí entre el pit de l'Antonet i l'esquena de la donzella.

Més enllà, algü va voler fer-se pas a través d'aquell humà feix d'espàrrecs; la donzella va ésser empesa de bell nou sobre l'Antonet; el temps de comptar fins a dos, fins a tres, fins a deu, de girar se-li i tot i somriure-li.

¿Somreia a l'Antonet? ¿Somreia merament al passatger molest, sobre el pit del qual alguna cosa continuava cruixint? ¿S'havia recalcat un punt més de l'estrictament necessari per pura delícia, o bé per pura facècia? Misteri. L'Antonet hauria estat simplement feliç, sense aquell oprobi de la paperina de neules. L'August, més tranquil, n'hauria tret motiu precisament per a enfilars una conversa, li n'hauria ofert una tot seguit; per salvar-ne la ineptitat, hauria arborat la paperina com un ganfaró damunt les testes dels passatgers. Però l'Antonet, romàntic de vocació, si servava encara un lloc de lucidesa per a imaginar-ho, no trobava un cop de gosadia escaient per a fer-ho.

I davallà gent, i davallà també la donzella, i davallà també ell, endolcit de prefiguracions, i alhora marrit per aquella paperina plena d'engrunes. El pare el titllà d'idiota; la mare sospità que ho havia fet expressament perquè no tornessin a enviar-l'hi cap més amy.

I aquell Nadal, a casa de l'Antonet, hom va menjar les neules de l'adroguer de la cantonada, perfumades—era un dir—vulgarment de vainilla.

Això és tot el començament de les amors de l'Antonet. Però la resta no importa. Van ésser un, dos, tres anys de timideses vençudes, d'encontres fortuits, d'encontres planejats; va venir el dir-se de tu, el saber el veritable nom de l'estimada, el primer bes i uns quant's més; van venir les assignatures sospeses, els emmagriments, les invectives familiars i les desesperacions, els rompiments i les represes, les gelosies i les generositats.

Va ésser més aviat una història vulgar i amarga, esvaïda a l'últim en una fumerola blavissa. Però de llarg a llarg de l'idil·li, el record de de les neules engrunades va conservar-se com un punt de dolçor al fons de tot; com un secret sabut de tots dos, del qual ni l'un ni l'altre no gosà parlar mai, però que a ella li feia pujar, inevitablement, un somriure, i a ell una pürpura; com una llavor d'ironia que sense l'Antonet saber-ho l'impedí de pensar mai del tot seriosament en el suïcidi ni en el rapte, i d'escriure mai un sonet amb una absoluta bona fe.

CARLES RIBA

EKSTERORDINARAJ PREMIOJ

ĝenerale konsistantaj el 50 kaj 100 pesetoj. aljuĝotaj al pri libervola temo plej bonaj

- Versaj Originaloj.
- Prozaj Originaloj.
- Versaj Tradukoj.
- Prozaj Tradukoj.
- Didaktikaj Verkoj.

(Ni petas ĉiujn societojn kaj privatulojn bonvolajn, tuj anonci al ni siajn premiojn kaj temojn por la proksimaj Floraj Ludoj).
Inspirigu kaj verku por la gloro de nia Literaturo!

NOTOJ

I.—La aŭtoroj de la du premiitaj Originalaj tekstoj I-II, kaj tiuj de la du premiitaj Tradukitaj tekstoj I-II, ricevos ekzempleron de la verko «Historio de Esperanto» de Ed. Privat. Krom tio estos donacata al ĉiu laŭreato atesta diplomo.

II.—Al la aŭtoro de la plej bona teksto (versaĵo aŭ prozaĵo) el la kvar ordinaraj premiitaj verkoj, la Komitato aljuĝos la *Naturan Floron* kaj la rajton elekti reĝinon de la Festo.

III.—La verkoj konkursontaj devas esti verkitaj en bona Esperanto, kaj ne ankoraŭ eldonitaj aŭ anoncitaj.

IV.—La soleno de la XIV^a Floraj Ludoj okazos en Vinaroĝ dum la XV^a Kongreso de «Kataluna Esperantista Federacio».

V.—La manuskriptoj, kiuj portos surskribitan devizon, devas esti ricevitaj antaŭ la 15 majo 1928 ĉe la Kataluna Esperantista Federacio, carrer València, 245, Barcelona) akompanataj de fermita koverto, kiu surhavas la saman devizon kaj entenos karton kun la nomo kaj adreso de la verkinto.

VI.—La manuskriptoj ne estos resendataj eĉ se ili alvenis post la datolimo por akcepto de verkoj. Ĉiu sendinto bonvolu konservi kopion de la manuskriptoj. La manuskriptoj devas esti skribitaj plej legeble sur unu flanko (paĝo) de ĉiu paperfolio. Oni menciui ĉiam ĉu la verko estas originala aŭ la lingvon el kiu oni tradukis. La paperfolioj de ĉiu konkursaĵo estu centimetre nek pli ol 30x20 nek malpli ol 20x15.

VII.—La membroj de la Juĝontaro partoprenos en neniu konkurso.

VIII.—La Komitato publikigos la verdikton per «Kataluna Esperantisto» kaj per la esperantaj kaj katalunaj gazetoj kiuj bonvolos ĝin represi.

IX.—La verkoj premiitaj fariĝos propraj dum unu jaro, de la Komitato de la Floraj Ludoj, kiu zorgos pri ilia publikigo sur «Kataluna Esperantisto» aŭ aliaj esperantaj gazetoj. Permeson por reproduto dum tiu unua jaro oni devas peti de la Redakcio de K. E.

X.—Eventuala aljuĝo de «Subpremioj» nur signifas honoran mencion sen rajto al efektiva premio.

Peto al la gazetoj.—Ni petas niajn kolegojn, ke ili publikigu nian alvokon por ke la konkurson partoprenu esperantistoj el la tuta mondo.

LA SEKRETARIO DE LA FLORLUDOJ.

La sistemoj Tonike-ritma kaj Silabmezura en la esperanta versfarado

(Daŭrigo)

VERSFARADA SISTEMO GREKA-LATINA

Mi tradukas el la hispana «Poetiko» de Clemente Cortejón («Questionario de Retórica y Poética», Barcelona, 1885):

Ĉapitro II, paragrafo 1. «Estas *preskaŭ* universala opinio, ke la metriko greka kaj latina bazis sur la distingo inter silaboj *longaj* kaj *mallongaj* (la lastaj valoris *unu tempon*; la unuaj, *du tempojn*) kaj sur la *iktus*'oj (1), egalvaloraj al la *fortaj tempoj* en muziko. Ne estis konstanta la korespondado de la *iktusoj* kun la *tonika akcento*».

Cap. 2, par. 2. «Per la grupoj da silaboj, kies *kvanton* la antikvuloj konis kaj ĝuste taksis, ili formadis la *metrikajn piedojn*, nome grupojn da du, tri, kvar aŭ pliaj silaboj; en tiuj silabgrupoj oni devas distingi, krom la nombro da silaboj, la kvanton de ĉiu silabo».

Cap. 2, par. 3. «La metrikaj piedoj» aŭ «mezuroj» estas *simplaj* aŭ *kunmetitaj*. Da piedoj simplaj, ekzistas dekduo, kiuj neniam havas pli ol tri silabojn, nek malpli ol du silabojn.»

La *simplaj* piedoj plej uzataj estas:

Dusilabaj	}	Pirikio (du silaboj mallongaj)	v v
		Jambo (mallonga kaj longa)	v —
		Trokeo (longa kaj mallonga)	— v
		Spondeo (du longaj)	— —
Trisilabaj	}	Anapesto (du mallongaj kaj unu longa)	v v —
		Amfibrako (unu mallonga, unu longa kaj unu mallonga)	v — v
		Daktilo (unu longa kaj du mallongaj)	— v v
		Bakio (unu mallonga kaj du longaj)	v — —

La *kunmetitaj* piedoj rezultas el la kombinaĵoj de simplaj; el ili formiĝas grupoj kvarsilabaj, kvinsilabaj kaj eĉ sessilabaj.

Per tiuj piedoj konvene kombinitaj oni formis diversajn specojn de versoj, nome la *heksametron*, la *pentametron*, kaj multajn aliajn.

Ni vidis ke la greka-latina poetiko estas karakterizata per la ekzisto de silaboj longaj kaj mallongaj. En Esperanto ne ekzistas (1) ictus=ritma akcento.

longaj kaj mallongaj silaboj, sed nur silaboj *tonike akcentitaj* aŭ *senakcentaj*. Pro tio, se oni volas imiti en Esperanto la klasikan metrikon, oni estas devigata, same kiel en aliaj modernaj lingvoj, uzi piedojn konsistantajn ne el silaboj longaj aŭ mallongaj sed el silaboj tonike akcentitaj aŭ senakcentaj. Do la greka-latina *longeco* de la silaboj havas kiel ekvivalenton, en Esperanto, la *akcentitecon* de a silaboj.

VERSFARADA SISTEMO TONIKE-RITMA

Tiu ĉi sistemo, en kiu estas verkitaj la plimulto de Esperantaj poemoj, konsistas el *alternado de silaboj fortaj kaj malfortaj*, tio estas, el sinsekvado de piedoj konsistantaj el silaboj akcentitaj aŭ neakcentitaj. La aranĝo de tiuj piedoj devas esti identa en ĉiuj verslinioj.

VERSFARADA SISTEMO SILABMEZURA

Tiu ĉi sistemo ne konsistas el piedoj kaj sekve ne havas tiom da ritmaj akcentoj kiom da tonike akcentitaj silaboj. En ĝi oni kalkulas la nombron da silaboj kaj ritme akcentas en ĉiu verso—devige—nur unu silabon. En tiu ritmakcentita silabo devas koincidi, kompreneble, tonika akcento. (1)

La loko, kie devas esti la ununura ritmakcento de ĉiu linio, dependas de la nombro da silaboj. Ekzemple, dekusilaba verso devas havi akcentita la *sesan* silabon, sed anstataŭ la sesa *ĝi povas havi akcentitak la kvaran kaj la okan samtempe*.

Do ne estas manko de ritmo en la versfarada sistemo silabmezura. Se en la tonika sistemo periode revenas unu ritmakcento ĉe ĉiu piedo, en la silaba sistemo periode revenas almenaŭ unu ritmakcento ĉe ĉiu linio.

Krome, kelkafoje en silabmezuraj versoj troviĝas, funde, iaj piedoj, tio estas, grupoj da du aŭ tri silaboj, sed okazas ke ilia sinsekvo ne estas identa en ĉiu linioj.

(1) La kataluno Milà i Fontanals skribis: «Koncerne la modernan poezion, ni parolas ne pri veraj piedoj, sed pri la movo naskiĝinta el la nombro da silaboj kaj el la lokigo de la akcentoj». Sialflanke Coll y Vehí diris, en «Compendio de Retórica y Poética», paragrafo 141: «En la lingvoj greka kaj latina oni mezuris la verson kalkulante la nombron da piedoj aŭ mezuroj; en la hispana oni mezuras ĝin kalkulante la nombron da silaboj kaj plie *atentante difinitajn regulojn koncerne la akcenton*».

KOMPARO INTER LA SISTEMOJ TONIKA KAJ SILABA

Ĉe la versfarada sistemo tonike-ritma, en ĉiu silabo kun tonika akcento estas samtempe *ritma akcento*; do, en aliaj vortoj, tonikeco estas identa je ritmeco. Tial oni nomas la sistemon *tonike-ritma*, ĉar la *ritmeco* nature rezultas el la *tonikeco*.

Ĉe la versfarada sistemo silabmezura, nur en unu tonike akcentita silabo en ĉiu linio estas deviga samtempa *ritmakcento*. Oni nomas la sistemon *silaba*, ĉar en ĝi oni atentigas en ĉiu verso aŭ linio la *egalan nombron da silaboj* kaj ne, kiel en la sistemo tonika, la *egalan sinsekvon de piedoj*.

Sekve de tio, esperantisto leganta laŭ sistemo *tonika* poemon verkitan laŭ sistemo *silaba*, serĉas ritmajn akcentojn kiuj ne ekzistas, tio estas, li tonike akcentas tiujn silabojn en kiuj, laŭ lia opinio, devus esti ritma akcento, kaj se tiuj silaboj hazarde estas senakcentaj kaj tial ne permesas tian arbitran akcentadon, tiam li erare konkludas ke tiuj silaboj havas malpravan tonakcenton. Tiuokaze, ne la silaboj pekas kontraŭ tonikeco; okazas nur tio, ke en ili ne estas la ritmeco, la difinita speco de ritmeco serĉata de la leganto laŭ sistemo tonika, kiu, malkonante la sistemon silaban, ne faras ian diferencon inter akcento tonika kaj akcento ritma.

KIAMANIERE ONI DEVAS LEGI POEMOJN VERKITAJN
LAŬ LA SISTEMO SILABMEZURA

Oni devas legi tiujn poemojn preskaŭ kiel prozon, tute forgesante pri piedoj kaj lasante ke la natura fluado de la silaboj indiku la emfazon por la deklamado. Estas malfacila afero skribi montri pri tio, kaj tial mi ne kuraĝas plilongigi miajn rimarkojn, kiujn komence mi projektis pli vastaj kaj pli *klarigantaj*. Esperable iam mi havos okazon deklami miajn versaĵojn antaŭ internacia publiko kaj pli taŭge pritrakti denove la aferon.

Ĉu mi ne povos traduki el la parnasoj kataluna, hispana, franca kaj itala, tiom valoraj kaj indaj esti konataj, ĉar la Esperantistaro volas poetikan sistemon senutile rigidan? Ĉu, post centfoja klarigo ke mi ne uzas la laŭpiedan ritmon, oni ankoraŭ riproĉos min pri malbona ritmo? Mi tre dezirus, ke esperantistoj el latindevenaj lingvoj helpu min en tiu ĉi afero... Kvankam modeste, mi persiste iros antaŭen, renkonte al la malkomprenemo...

JAUME GRAU CASAS

Bibliografio

KATOLIKA KANTARO kolektita kaj eldonita de Leopold Chiba, laŭ komisiono de la Katolika Unuiĝo Esperantista en Wien-Verlagsanstalt TYROLIA A. G. WIEN I Stephansplatz 5. 75 paĝoj 14x9. Prezo: 2 aŭstriaĵ ŝilingoj aŭ 1'30 RM.

Sub tiu epigrafo S-ro. Chiba kolektis kaj publikigis en formo de broŝuro, 40 katolikajn kantojn kun akompano de koncerna melodio. Ĉe la traesploro prezentigis al ni, antaŭ ĉio, demando ĉu la plimulto da tekstoj estas originalaj aŭ tradukitaj kaj aliflanke ĉu ili estas verkitaj aŭ esperantigitaj de la kolektinto, ĉar ni rimarkis ke neniu teksto, krom du aŭ tri, portas nomon de aŭtoro. Ni tamen volas kredi ke la plej granda parto da ili estas tradukitaj el latinaj tekstoj kaj ke tiu traduko estas ŝuldata al la eldoninto. Laŭ tiu ĉi vidpunkto ni konsideros lian laboron.

Plaĉis multe al ni la apero de verko kiel tia ĉar ni spertas ankoraŭ en nia literaturo la mankon de verkoj destinitaj al la popola kantuzo. Tia neceseco okazigis en ni favoran inklinon al la bonakcepto de la verko kaj ni malfermis la libreton kun la espero de io vere bona, verkita kun solida preparo. Ni iomete elreviĝis. La intenco estas efektive bona sed la fakto ne tute respondas al tiu intenco. Laŭ nia opinio, ĉe kantaro, tekstoj kaj melodioj devas formi kvazaŭ unu tuton ne disigeblan, la spirito de la melodio devas kunfandiĝi kun tiu de la teksto kaj inverse, en formo ke melodio devas ŝajni komponita por la kantaĵo kaj reciproke. Tiamaniere ambaŭ ili sin montras naturece kaj atingas la estimon de la publiko kiu plej ŝate proprigas ilin al si kaj faras ilin parto de sia propra spirito. Sed en la verko kiu nin okupas mankas tiu kunpenetriĝo de teksto kaj melodio kaŭze de ne sufiĉe bona tekstomaterialo kaj de versaj malfacilaĵoj ne travenkitaj de la aŭtoro. Ni faras escepton pri tre malmultaj kantoj kies plimulto videble estas originalaĵoj en Esperanto.

Ni riproĉas al la tradukinto la oftegan uzon de pronomaj kaj sufixaj rimoj, la helpopeton kiun li insiste faras apud konjunkcio *ja* kaj artikolo *la* sendube por plenigi mankon de versa silabo ĉar ambaŭ ili estas vere superfluaĵoj en sennombraj okazoj; forigon de prepozicio en esprimoj kiaj: *venu min, rapidu min, inda vin, plaĉu lin, mankas min*, kaj aliaj; forigon de akuzativo en frazoj kiaj: *kiun-kiel testament'* (on); saman forigon en frazoj de almovo kiaj: *En korpo (n) kaj en sang'* (on) *de Di'*. Kaj kian figuradon dirigas al S-ro. Chiba la postulo de rimo *on'*: *sur kruco-tron'*, kvazaŭ la kruco estas trono aŭ havas ĝin. Ni rimarkas uzon de prepozicio

per anstataŭ *pro*; mankon de substantivo kaj uzon de adjektivo en substantiva rolo; saman mankon ĉe esprimo *la miajn* en senco de *miajn samfamilianojn*. Nekomprenblaj ni juĝas la 10^a strofon de la 17^a kanto kaj parton de la 2^a de la 25^a kaj ankaŭ nekomprenbla montriĝas al ni la frazo: *la nomo Mario la koron certig'*. Ni vidas predikatecajn adjektivojn en akuzativo, vortojn: *taskis, regnujo*, (antataŭ *regno*), *malmank'*, *protegu*, *sigilo*, *koncedo*, k. a. ne pre malakceptindajn, kaj grafikaĵon: *Jesu'n alvidante*, anstataŭ *Jesuon vidante* (cetere, kion signifus *alvidi*?). Speciale ni rimarkas la malreligian sencon komunikitan de la aŭtoro al la 6^a strofo de la 11^a kanto kiun ni permesas al ni kopii por edifo:

En la maljunaj tagoj
Nun eĉ Elisabet'
Per Liaj mirindaĵoj
Troviĝas en graved',
Senfrukta estis ŝi
Sed ĉio estas ebla
Al la eterna Di'

Ni tre bedaŭras la malbone zorgitan taskon de S-ro. Chiba. Ni ne konas antaŭan verkon lian kaj supozas ke tiu ĉi estas la unua publikigita. Pro tio ke ĝi estas la unua, nin ne mirigas ke li ne sciis havi sufiĉan paciencon por atendi, sen tempopremoj, pli malproksiman okazon de verkeldono por dume, pli profunde kaj konsciencelabori ĉe la nuna kiu efektive meritas tion.

Muzikflanke la verko estas ŝatinda. Ĝi enhavas kompletan meŝkantaron kaj aliajn diversajn melodiojn konvene ordigitajn kaj taŭgajn por specialaj religiaj solenaĵoj kies plimulto apartenas al klasikaj aŭtoroj, kaj la ceteraj estas ĉu eliritaj el diversaj diocezoj ĥorlibroj ĉu el popolkantoj. Oni komprenos do, ke ili pasis tra la kriburo de l'tempoj kaj ke ili alvenis al ni kun plenece de inspiro en sia profunda religia senco. Iuj el ili estas ja allogaj. La aŭtoro enŝovis melodion de li komponitan kiun ni opinias sufiĉe akceptinda. Ni ne povus konsili, tamen, prunteprenon de melodioj por adaptigo al kantoj, kiam la unuaj estas tre konataj kaj havas difinitan karakteron, kiel okazas kun la melodio de «LA ESPERO» de F. de Ménéil enhavigita por taŭgi, sub ŝanĝita teksto, kiel «Himno Katolika». ORPHEUS.



Diversajhoj

Navàs (Barcelona).—Jus fondiĝis grupo en tiu ĉarma vilaĝo; ĝia nomo estas «Morgaŭna Stelo»; ejo, ĉe Sro. Johano Sarri pl. Iglesia 18. Longan vivon kaj prosperadon al la nova grupo.

Sant Vicens de Castellbet (Barcelona).—Propaganda parolado de Sro. Sebastià Chaler ĉe Salono Miralles; 100, personoj ĉeestis la propagandan feston en kiuj multaj fariĝis adeptoj al nia idealo. Kurso gvidata de fervora Esperantisto Sro Matabosc.

Rubi.—Nova kurso por fraŭlinoj sub sperta gvidado de Sro. Escayol. La kursoj progresas ĝoje. Projektata parolado pri Esperanto en Teatro C. D. Republicà.

Terrassa.—Granda festaro okaze de la Jubileo de Esperanto. Libro kaj gazeteksposicio.

Eldono de 2.000 propagandaj folioj en formato de granda ĵurnalo kun foto de Doktoro Zamenhof kaj kliŝaĵo de Esperanta Himno.

Kristnaskfestoj kun paroladoj de S-roj Garriga, Chaler, Puig, Dalmau, kaj Solà. Novaj Kursoj dum Januaro. Sino Elisalet Ith svisa esperantistino ĉeestis la feston kaj estis kore kaj frate akceptata.

Vinaroz.—La 18an de Decembro, niaj kunkomitatoj S-roj S. Chaler kaj D. Dalmau veturis al la urbo Vinaroz por tie fari propagandon kaj prepari la organizadon de nia kongreso en la venonta jaro. En Vinaroz, kaj en la salono de la Urbodomo, kun ĉeesto de Lia Urbestra Moŝto, S-ro Higinio Roca, Paroĥestro, Ptro. J. Pascual, ĵuĝisto, S-ro Luis del Castillo. Provinca Deputito, S-ro Sebastián Roca, Instruistinoj S-inoj Francisca Ferrer, Julia Querol, Amparo Brandes, Rogelia Bernat kaj grandnombra publiko okazis la propaganda kunveno. S-ro Ribera en la nomo de la urbestro prezentis la parolantojn kaj laŭdis la decidon okazigi nian kongreson en sia urbo. S-ro Chaler parolis poste pri la signifo de Esperanto, ĝiaj historio kaj disvolvo kaj longe priskribis la simplecon de la lingvo. Multaj aplaŭdoj bonvenigis la paroladon de nia amiko. Fine parolis nia Prezidanto, kiu klare vidigis la altan celon de la esperanta movado kaj la gravecon de la Internaciaj Floraj Ludoj. Longa aplaŭdado salutis ankaŭ la paroladon, kiu estis bona antaŭpreparo por nia venonta kongreso. La propagando farita vekis en la urbo grandan intereson por Esperanto; multaj personoj petis

informojn al niaj amikoj kaj ni scias ke jam lernolibroj estas senditaj al Vinaroĝ kaj kurso estas en preparo.

Barcelona.—La 15^an de Decembro okazis en la grupo «Barcelona Stelo» la Festo de la Libro; ĝi estis granda sukceso: parolis S-roj Grau, Alberich, Gili kaj kiel reprezentanto de K. E. F. S-ro J. Herp.

Ni ĝojas sciigi ke nia fervora samideano S-ro J. Gili estas denove en nia lando post longa forrestado. Koran bonvenon!

—S-ino Elisabeta Ith el Genevo, alvenis Barcelonon por kelkm-nata restado. Ŝi estas jam konata de kelkaj el niaj amikoj ĉeestintaj la kongreson en Edinburgo. Ankaŭ koran bonvenon!

Radio.—La 27^an de Decembro en Radio Barcelona faris paroladon en Esperanto pri la temo «Esperanto ne super ĉiuj aliaj idealoj, sed jes super ĉiuj aliaj lingvoj», S-ro Luis Santamarina.

KONTRAŬ ESPERANTO.—Antaŭ kelkaj monatoj S-ro Rosselló el Palma de Mallorca komencis maljustan kaj perfidan atakadon kontraŭ Esperanto en unu el la ĵurnaloj de la insulara ĉefurbo. Sekvis respondoj de S-ro M. Arbona el Sóller kiu tre ĝuste respondis la kritikojn de nia nuna kontraŭulo. Sajnas, tamen, ke la diritaj artikoloj kontraŭ nia lingvo ne multe plaĉis al la Redakcio de la ĵurnalo, ĉar ĉi tiu decidis ja meti finon al la polemiko. Ĉar laŭ propono de K. E. F. S-ro J. Rosselló estis elektita membro el la Lingva Komitato, ni turnis nin al S-ro Th. Cart, prezidanto de la Institucio, kun protesto kontraŭ la dirita ekssamideano kaj petante lian eksigon en la nomo de ĉiuj katalunaj esperantistoj. De S-ro Cart la Komitato de K. E. F. ricevis leteron, per kiu li sciigas ke li, kiel Prezidanto de la Akademio, nenion povas fari, ĉar S-ro Rosselló antaŭ kvin monatoj havis la bonan penson mem peti sian eksigon.

Ni tre bedaŭras ke S-ro Rosselló, kiu estis ĉiam bona esperantisto, falis en la malfortecon labori por nova solvo de lingvo internacia, kiu ja kiel montras antaŭaj spertoj, povas nur konduki al ĥaoso, sed tute ne al iu praktika solvo. Ankoraŭ pli kondamninda estas lia uzado de argumentoj, kiujn li nepre scias falsaj, kontraŭ la agado de D-ro Zamenhof; tion ne faras honesta persono.

Ni volas kredi ke tia erara stato de lia menso forpasos kaj ke iam li rekonos sian malpravecon.

Hispana Kongreso.—Ni ricevis cirkuleron de la Organiza Komitato de la Hispana Kongreso de Esperanto kiu okazos en Sevilla de la 5^a ĝis la 9^a de Novembro 1928^a; Pro troa longeco ni ne povas ĝin publikigi. Volonte ni donos pliajn detalojn pri ĝi, kiam ni ilin ricevos.

Monhelpo.—S-ro Ed. Jung, diversfoje premiito en la Internaciaj Floraj Ludoj sendis al ni dudek kvin pesetojn por la K. E. F. Plej koran dankon kaj la bona ekzemplo ricevu imitantojn.

Estatuts de la Federació Catalana d'Esperantistes

Article primer.—Amb el nom de «Federació Catalana d'Esperantistes» hom constitueix una federació d'esperantistes en terres de llengua catalana.

Art. segon.—L'objecte de la «F. C. d'E.» és la unió de tots els esperantistes en terres de llengua catalana per a la divulgació i propaganda de l'Esperanto, pels fins de la representació aconsellada en la reunió general del V Congrés Internacional d'Esperanto celebrat a Barcelona, per a complimentar tots els acords i resolucions, que afecten als esperantistes com a col·lectivitat, emanats dels Congressos Internacionals o dels nuclis directores de la llengua del Dr. Zamenhof.

Art. tercer.—Per a el millor compliment de l'article anterior, la «F. C. d'E.» publicarà una revista, l'organització de la qual serà determinada per un reglament especial interior publicat pel cos de redacció i prèvia acceptació del Comitè Directiu. El preu de l'abonament a la revista serà de sis pessetes anyals.

Art. quart.—La «F. C. d'E.» constarà de membres associats i de membres isolats; els primers seran federats per mitjà de l'entitat a la qual pertanyin i els altres directament i en caràcter particular.

Els diversos organismes pertanyents a la «F. C. d'E.» contribuiran el seu sosteniment amb la quota trimestral, pagada a la bestreta, de 0'40 ptes. almenys per cada soci i els individuals amb una quota mínima de 3'50 ptes. anuals, pagada a la bestreta.

Art. quint.—La «F. C. d'E.» serà regida per un Comitè Directiu, renovable cada any, compost de President, Vice-president, Secretari, Vice-secretari, Comptador, Caixer, Administrador i quatre Vocals.

Art. sisè.—El Comitè de la «F. C. d'E.» convocarà almenys una vegada a l'any, en diferents localitats, durant la primavera i en dia festiu, tots els federats, en Assemblea o Congrés general, en el qual, prèvia ordre del dia hom donarà compte als assistents dels treballs i gestions acomplerts pel referit Comitè Directiu durant el seu exercici, hom acordarà el lloc on deurà celebrar-se el vinent Congrés o Assemblea, hom nomenarà els individus que deuran constituir el Comitè el pròxim exercici, i hom discutirà les proposicions que hagin estat presentades abans de la sortida del número de la revista anunciant el Congrés o Assemblea, i anunciades en l'ordre del dia.

Art. setè.—El Comitè serà facultat per a crear les seccions que eregui més convenients per a la prosperitat de la «F. C. d'E.» i de l'Esperanto, les juntes de les quals seran renovades per cada Comitè de bell nou elegit.

Serà president nat de cada secció un individu del Comitè designat pel mateix.

Art. vuitè.—Tots els esperantistes pertanyents a organitzacions federades tindran veu i vot en les Assemblees anuals, però el seu vot serà delegable al president d'un grup o una altra persona qualificada, prèvia la presentació dels corresponents carnets de soci.

Art. novè.—Tots els acords de les Assemblees o Congressos seran presos per majoria absoluta de vots dels socis assistents. Les esmenes que puguin presentar-se a aquest reglament deuran ésser presentades amb la deguda antelació per tal d'incloure-les en l'ordre del dia i publicades en la seva totalitat, puix que només podran ésser discutides i aprovades en les Assemblees o Congressos generals.

Art. desè.—La llengua oficial de la «F. C. d'E.» serà l'Esperanto, podent també emprar-se la catalana en les Assemblees.

Art. onzè.—Aquesta «F. C. d'E.» podrà actuar mentre compti amb dues col·lectivitats organitzades o trenta membres isolats. En cas de dissolució, previ acord d'ella, l'actiu existent serà lliurat al caixer de la Constant Representació de les Societats Nacionals Esperantistes.

Art. transitori.—La «F. C. d'E.» serà domiciliada a Barcelona carrer València, 245.

Kataluna Antologio

KOMPILITA DE

Jaume Grau Casas

416 paĝoj 22 × 16

Aĉetebla ĉe la Barcelonaj Grupoj kaj ĉe «Kataluna Esperantisto». València, 245. je 12 ptoj.

Por la resto de la Iberia duoninsulo kaj eksterlando oni sin turnu al S-ro. Eduard Capdevila, Carders, 29, Barcelona.

Prezoj kun rekomendita poŝto enkalkulita: Por Iberio: 13 ptoj. Por eksterlando: 15 ptoj. 9 ŝilingoj, 11 svisaj frankoj aŭ 2 dolaroj.

Laŭ la juĝo de kompetentaj esperantistoj, la Kataluna Antologio estas unu el la plej valoraj en Esperanto.

Aĉetu baldaŭ la libron kaj diskonigu tra la tuta mondo la altan gradon de kulturo de la miljara kataluna lingvo.

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

FRAGMENT

El món adopta cada dia formes més i més internacionals. Una catàstrofe en lo mén pregón de l'Asia influeix en els mercats d'Europa i al revés. Una nova, bella peca de música en un mes ha donat la volta al món. Igual passa amb els bons films. Els murs, que separen els pobles ja comencen de trontollar. Aquells qui venen per això els seus interessos amenaçats, criden espantats, inciten a defensar-se, exigeixen lleis dictatorials i severes.

Però cada dia que passa va veient-se mes clar, que les noves muralles xineses amenacen d'enderrocar-se. Demà, passat demà, tant se val. Ja no representen cap paper defensiu, no més fan que ofegar el propi país. A banda i banda s'hi ha concentrat tanta força dinàmica, que busca sortida. La ciència, l'església, la tècnica, la moda, el capital, la indústria, el moviment agrari i treballista, tots a l'una, fan pressió damunt les velles pedres de l'arcaica i malmenada construcció... Ni conferències, ni convencions seran prou per a aturar en el moment decisiu la força d'aquest Niagara popular.

Els homes que no temen de mirar el pervindre cara a cara, aconsellen de preparar les vies per on pugui fluir amplament l'inundació. La llengua internacional es la més important, per la qual podrien normalment llançar-se els torrents populars contradictoris per a constituir la gran família humana única.

N. HOHLOV.

"KATALUNA ESPERANTISTO"

OFICIALA ORGANO DE
KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

Membra kotizaĵo: 3'50 p.; Grupoj: 1'20 por membro.

Jarabono: 6 p. enlande kaj 6 sv. fr. internacie, provekzemplero 2 respondkuponoj.

Federacia sidejo kaj redaktejo: carrer València, 245-BARCELONA

LA DEK DEVOJ DE LA ESPERANTISTO

1. Bone sciŭ la lingvon, traktu ĝin kun respekto, kaj lasu la versfaradon al poetoj.

2. Esperanton uzu parolante, studu legante kaj ne fuŝu skribante.

3. La plibonigistoj diskutu; vi Fundamenton sekvu kaj fide-la restu.

4. Propagandu ĉiam, ne ĉie; klarigu, ne prediku; rakontu faktojn, ne esperojn.

5. Kiŝn vi povas lerni nur en unu semajno, ne instruu en unu horo; el malgravaĵoj ne faru regulon, kaj el la regulo ne faru malgravaĵon.

6. Verkante en Esperanto, ne kredu interesa, kion naĉlingve neniu legus; ne imagu, ke preseraroj plibeligas libron, ne malesperu, se mankas aĉetantoj.

7. Al grupo aliĝu; la kunvenon vizitu; Esperanton parolu. Subtenu K. E. F.

8. Atentu, ke internacia lingvo vivos nur per uzado; memoru, ke tial internacia organizaĵo estas necesa, senlace varbu por U. E. A.

9. Legu gazeton, por ke vi konu faktojn; novajn abonu, por ke ĝi povu ekzisti; kunlaboru, por ke ĝi estu interesa.

10. Por Esperanto kiel movado agu; por ĝi kiel realaĵo pagu, kaj kiel altan idealon konservu ĝin en via koro.



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gutaro* Redakcio: Carrer València 245 BARCELONA

DIREKTORO: MARIAN SOLÁ

D-ro Josep M.^a Terricabras

Nia kara samideano, la unua prezidanto de K. E. F.. mortis en Vich la 9^an de Januaro 1928^a.

Tre estimata persono, kiu havis bonegan reputacion kiel kuracisto, li estis elektita prezidanto de nia K. E. F. en 1910^a, tio estas en la komencoj de nia agado, do en la plej malfacilaj tempoj. Kiel juĝanto li partoprenis ankaŭ en la Floraj Ludoj. Lia sola nomo estis en Vich bona kaj efika propagando por nia afero.

Al lia malĝojigita familio, precipe, al lia kuzo nia samideano S-ro Jacinto Comella ni esprimas en la nomo de ĉiuj kunfederacianoj nian plej sinceran kondolencon.

LA REDAKCIO.

Nova Patrujo

Nevidion, Blindulujon profunde malkovris al mi, al vi, niaj XIII^aj. Floraj Ludoj.

Efektive la ĉefa laŭreato florlduda estis patrujano, civitano de Nevidio, blindulo de vidiga kaj sentiga koro: D-ro. Bânó Miklós, hungaro, samnaciano de viduloj grandaj poetoj Baghy kaj Kalocsay, antaŭaj atingintoj de ĉefaj florldudaj premioj. La plej proksima konkursinto al Bânó por la Natura Floro de la Floraj Ludoj en 1927 estas Fino. Varma Jarvenpaa, blindulino el Finnujo, civitanino el Nevidio.

Multaj samideanoj petis de ni la eldiron pri la vera nomo de Ĉuvi Lovostan, jam fama aŭtoro de «Renkontigo». Kelkaj estis tute certaj ke Kalocsay sin kaŝis sub tiu anstataŭnomo. Kaj kiam ni respondis ke Ĉuvi Lovostan skribis al ni ke li estas blindulo, iuj kredis ke Kalocsay tion diris por devojigi la scivolemulojn pri la vera nomo de la plej alte premiita florldudinto en 1927.

La aŭtoro de «Renkontigo» fine kompleksis nin per rajtigo publike sciigi ke lia vera nomo estas Bânó Miklós, ke li estas sciencisto loĝanta kaj laboranta en la hungara ĉefurbo Budapest, VI, Délibáb - U. 23. La scivolemuloj estas do plene kontentigitaj, kaj la tuta esperantistaro ĝojas ke granda poeto aperis en nia Nova Mondo elveninta el Nevidio al la mondo de la Nova Sento, per klarigaj, lumigaj poemoj.

El letero ricevita de Dro. Bânó Miklós mi transkribas kelkajn vortojn kiuj iom sciigas pri Nevidio kaj ĝiaj aferoj:

«Kun danko mi ricevis viajn sciigojn antaŭ longe, kaj tuj skribis al Fino. Jarvenpaa kies respondo nun alvenis, kaj kies ĉefajon jen mi transkribas por vi laŭvorte.—

«Ho ve! Mi ne sciis, ke mi devis skribi al Sro. Dalmau pri la sendmaniero de la mono, ĉar mi havas neniun, kiu legus al mi esperantan nigran skribon, eĉ kelkaj vidulskribaj leteroj de la samideanoj estas treege malfacile klarigeblaj al mi».

Nun, kara Sinjoro, vi povas vidi la malfacilaĵojn kiujn blinduloj havas en la interrilatoj kun vidantoj.

Eble tiu letero eĉ komprenigos al vi la neceson, ke iu—nunjare mi—devis entrepreni la transkribadon de blindulaj konkursoj,—kaj ke ja estis grava paŝo el Nevidio, kiu nun alportis tamen iom da ĝojo kaj honoro por Blindolando.—Tial la estraro de UABE nun traktadas pri organizado de sciigoj pri ĉiusecaj

konkursoj, kiujn blinduloj povus partopreni.—Almenaŭ la Florajn Ludojn ni preferus ĉiam antaŭmeti al niaj samsortanoj, kiuj, vi povas legi, ne havas plej ofte eblecon, legigi por si la nigrepresajn aferojn.—Sed por ne esti «nur ricevdezirantoj», mi jam traktadis kun la estraro, ke eble UABE oferu ĉiujare 50 pesetan premion al la Florludinto *sen ia kondiĉo*, t. e. la Florluda estraro povu ĝin utilige tute laŭ sia bontrovo, ni nur petus ke nian estraron la personom, kiun ni nomos—vi sciigu pri la plena rezultato tuj, kiam ĝi estas publikigita, do plej poste tuj post la festo mem,—ke AUBE povu kontroli, ĉu estas blindulo inter la gajnintoj, por lin sciigi, kaj por pagi anstataŭ la gajninto prezon de la Diplomo, se ne estos mona premio».

Jen vortoj pensoj kaj agoj kun ĝentileco kaj justemo, kun dankemo kaj malavaremo. Ĉu Nevidio, ĉu blinduloj estas homaro pri bona ol vidantaro?

Multaj vidantaj premiitoj, ankoraŭ ne sciigis nin ke ili ricevis la monon. Multaj, pli multaj, tute ne legis, malgraŭ ke ili ricevis senpage la koncernan numeron de K. E. krom la premio, la florldudajn priskribojn, kaj senutile pligrandigas nian pure fervorecan okupegon pro la Floraj Ludoj. Multaj vidantoj konkursintoj kuraĝis atentigi kaj propagandi al ni personajn motivojn por gajni premiojn, eĉ multajn premiojn.

Ni dankegas vin, kara samideano blinda, kies senteblo, kies spirita vidado estas ekzempla por vidantoj kaj kuraĝiga, rekompeca por la organizantoj de la Internaciaj Floraj Ludoj. Vi vidigu al multaj avidaj ricevdezirantoj ke ili devos esti pli delikataj, pli bonvolaj, pli komprenemaj pri la plenumo de ĉiuj kondiĉoj kaj detaloj kiujn postulas bona funkciado de nia Institucio. Vi komprenigu al ĉiuj kapablaj, koncerneblaj samideanoj kaj samideanaroj, ke la katalunlingva esperantistaro ne povas daŭrigi senfine organizadon de Floraj Ludoj kun miloj da pesetoj por premioj sen helpo premia de aliaj esprantistaroj. Jam dektri jarojn ni tiel florldudigis nian internacion. Via ekzemplo estu imitota por ebligi nian daŭrigadon.

Danke, amike, kortuŝite salutas Nevidion,

DELFI DALMAU.

Skizo de Humanista Historio

Rimarkoj pri la ĝeneralaj principoj kaj praktikaj ekzemploj de humanista historio de la homa raso

ĜENERALAJ RIMARKOJ

En ĉiuj landoj de la Tero oni pli kaj pli parolas kaj skribas en niaj tagoj pri nova historia instruado, kiu forlasus la ĝis nun aplikatan, ĝenerale disvastiĝintan metodon. Sed oni ne bone scias ankoraŭ, kion oni donos en la manojn de la infanoj, lernantoj en mezaj lernejoj, anstataŭ la nun aplikataj manlibroj. Oni konsentas unuanime, ke la militoj, kiuj ne havis profundan influon al la evoluo de la mondo, devas esti forlasataj el la programo de la historia instruado; la paroloj, eĉ famaj, kiuj celas venĝon, rabon kaj murdon, devas esti ignorataj de la moderna pedagogo. Resume, oni pli aŭdas pri tio, kion oni devas forigi el la lerneja programo, ol pri tio, kion oni devas instrui. Nek per negativaj asertoj, nek per tro ĝeneralaj konsideroj ni sukcesos eduki la morgaŭan homaron. Ne sufiĉas rekoni la necesecon de klarigo pri evolucio, scienca kaj teknika progresoj, ekonomia interrilato kaj solidareco de la popoloj, subordigo de la ŝtata moralo al la interŝtata, ktp., sed por praktike realigi la programon jam akceptitan de la plimulto de modernaj pedagogoj, oni bezonas doni praktikan kaj tuj utiligeblan historilibron. Sed ni ja scias, ke tia libro neniam aperis ĝis nun. Tial estus malprudentaĵo. se mi verkus ĝin en kelkaj entuziasmaj horoj.

La celo de tiu ĉi disertacio estas skizi la enhavon de estonta pli kompleta kaj pli bona manlibro de humanista historio. Mi povus ĝin nomi skeleto de nova historio. Tiu ĉi historio, kiun mi skizos, estas destinata por la unuagrada historiinstruado de mezaj lernejoj de ĉiuj landoj de la Tero. Mi ne nur diros, kion tia universala historio devas instrui sed mi donos praktikajn ekzemplojn de tia instruado. Tio ja estas ĉefe afero de stilo kaj de pedagogia lerteco. Ni ne devas instrui la plej grandan kvanton de faktoj, nek ni celas severan sciencan ekzaktecon: ni nur volas doni al la infanoj facilajn, klarajn kaj interesajn klarigojn pri la plej gravaj faktoroj de la homa historio. La tasko de pli alta historia instruado estas poste pleniĝi la truojn kiujn ni lasas.

Mi rekonas, ke la infanoj devas ellerni la plej gravajn faktojn de la universala kaj de la nacia historioj. Ne estas eble ignori la Napoleonajn militojn kaj esti samtempe kulturita homo. Sed mi opinias, ke antaŭ ol lerni sian propran nacian historion kaj la pure politikan historion de la tuthomaro, oni devas ellerni la his-

torion de la komuna progreso de la homa raso. *Antaŭ ol ni ekkonas, kio nin dividas, ni ekkonu, kio nin kunigas! La kolektiva moralo devas esti ĉiam pli alta ol la individua.*

Elirante el tiu ĉi principo mi nur skizos tie ĉi la unuagradan historiinstruadon de mezaj lernejoj. Laŭ mia persona konvinko je tiu ĉi grado de la instruado oni zorge devas eviti ĉiujn politikajn okazajojn kaj ankaŭ pure kronologiajn faktojn. Tie ĉi ni devas instrui la *pure humanistan historion*, kiu ja estas la sola objekto de tiu ĉi disertacio.

Al la edukistaro: Edukistoj de la kvin kontinentoj, vi estas gardantoj de la animoj de la estonta generacio. Ĉu vi estas konsciaj pri viaj devoj? Ĉu vi konas la gravecon de viaj respondecoj? Vi devas aperi en la okuloj de viaj junaj disĉiploj justaj kaj perfektaj. Vi tion atingos per toleremo, pacienco kaj justeco. La infano posedas denature sanan moralan senton, ĝia juna animo kliniĝas al la bono simile al magneŭo. Estu potenciaj antenoj de humanismo al kiuj kliniĝu ĉiuj animoj de la infanaro de kvin kontinentoj! Vi parolos al ili kun entuziasmo kaj kun fervoro; vi ne ripetos laŭvorte miajn tekstojn, vi nur ĉerpos el ili inspiron. La infano ne devas aŭdi la saman aferon, kiun ĝi jam legis aŭ kiun ĝi legos en sia libro. Tio kredigus al ĝi, ke la instruisto estas malinteligenta. Neniu libro povas diri al vi, ho geedukistoj, kion vi devas instrui al viaj gelernantoj: via koro daktu al vi la parolojn!

HUMANISTA HISTORIO

Karaj infanoj! En tiu ĉi jaro ni ekkomencos la historiajn lecionojn. Eble vi jam konas diversajn aferojn el la historio. Vi forgesu tiujn aferojn momente. Ĉio, kion la homo lernas, utilas. Kiam la okazo venos, vi do profitos el viaj nunaj konoj. Sed ni konsideros, ke vi nenion scias kaj ni komencos ĉion en la ovo, en la origino, en la plej unua komenco. Se vi atente sekvos vian instruiston kaj se vi diligente lernos viajn lecionojn, neeble estas ke vi ne sukcesu. Ĉiu infano kiu atente aŭskultos, komprenos kaj se vi estos diligentaj la tuta klaso sen escepto povas ricevi la plej bonan noton.

Tiel vi enkondukos la instruadon, karaj geedukistoj. Necese estas ĉiam trankviligi la infanojn, vi devas sugesti al ili ke ili *estas kapablaj* ĉiuj je ricevo de plej bona moto. Vi superrigardu malgrandajn erarojn kaj vi tuj laŭdu, kiam estas malgranda progreso. Sed vi jam konas tiujn ĉi principojn de nova pedagogio kaj mi povas daŭrigi la historion.

I.^o lekcio. La origino de la homaro.

La nombro de la hodiaŭ vivantaj homoj sur la Tero estas tre granda. La statistikistoj kalkulis, ke ĝi estas ĉirkaŭe 1.660.000.000. Laŭ kontinentoj, la statistiko estas la sekvanta:

Europo:	450.000.000
Azio:	880.000.000
Afriko:	150.000.000
Ameriko:	180.000.000
Oceanio:	10.000.000

Tiuj ĉi statistikaj ciferoj ne devas esti kompreneble ekzakte ellernataj, sed ni notu ilin en niajn kajerojn kaj ĉiufoje, kiam ni rigardos ilin, ni meditu pri la loko, kiun havas la popoloj de Eŭropo en la oceano de la tuta homaro.

De kie venas tiu ĉi giganta aro da homoj? Laŭ la scienculoj, la homo apartenas al la *primata grupo de la mambestoj*, sed ĝi multe diferencigas de la bestoj. Jen kelkaj el la ĉefaj diferencoj: vertikala, rekta staturo, dupieda marŝo, granda cerbo (la cerbo de la homo pezas 1.360 gramojn kaj tiu de la plej grandaj goriloj nur pezas 360 gr.) Ni devas speciale akcenti la rolon de la *homa cerbo*. Per la potenco de sia intelekto, la homo, malforta kaj mizera mambesto—laŭ sia korpo—sukcese venkis la kreitaĵojn de la naturo kaj jungis la naturajn fortojn kiuj hodiaŭ laboras anstataŭ la tro malfortaj homaj muskoloj. Nur per la laborigo de naturaj fortoj la homaro estas granda. La arto, la religio, la manifestiĝoj de la homa intuitivo, unuvorte, ĉio, kio estas spirita kaj ĉio kio diferencigas la homon de la bestoj, estas la rezultato de la homa intelekto! Ni eliru el niaj loĝejoj, en nia moderna epoko: ni marŝu inter la uzinoj, sur la vojo trapasata konstante de mekanikaj veturiloj, super niaj kapoj la birdoj sidiĝas sur elektraj kaj sur telefonaj fadenoj, sur la kajo milo de feraj muskoloj, kiujn ni nomas levilegoj, deŝarĝas la sakojn kaj pakajojn venantajn de malproksimaj kontinentoj, pere de vaporŝipoj, hejtataj de karbo, kiu ja estas kondensita sunlumo... Mi povus daŭrigi la serion de tiu ĉi frazo sed vi ĉiuj scias, ĝis kia grado la homa aktiveco kreas nian bonfarton, nian vivon mem! Sen la inĝenieroj, la laboristoj, la maŝinistoj, nenia kulturo estas ebla en nia mondo, kie la nombro de la homoj tiel plimultiĝis, ke la ekhalto de tiu ĉi giganta mekanika progreso kaŭzus sen dubo la morton de milionoj de homoj, kiel tio okazis en antaŭaj tempoj, ekzemple en Hindujo.

La ĉefa faktoro en la historio de la homaro estas la progreso de la scienco kaj de la tekniko. Por kompreni la homan historion, ni devas ekzameni, kiamaniere la malforta homo sukcesis venki

la naturon. La historio de la homaro estas giganta batalo inter la homo kaj la kruelaj naturfortoj, kiuj estas *blindaj*. Mi diras, ke la naturfortoj estas blindaj, ĉar ili tute ne atentis pri la homo: ili estas kruelaj ĉar ili detruas ĉion, kio baras ilian vojon. La naturfortoj tamen estas ankaŭ grandaj kreantoj. La forto de la vento estas detrua forto por la remboato, sed ĝi estas bonvenigita de la maristoj, kies velboato naĝas sen movo sur trankvila oceano. La homo sciis utiligi la naturajn fortojn, kaj tial ĝi meritas la nomon, kiu diferencigas ĝin de la bestoj: *homo sapiens*.

Antaŭ ol ekzameni la evolucio de la homa gento tra la jar-miloj, ni devas fari iom da ĝenerala studo pri la deveno de la homo kaj pri la originoj de la homaj socioj. Pri ĉi ĉiuj aferoj ni lernos poste en aliaj fakoj, sed ni devas ilin mencii tamen ankaŭ tie ĉi por la kompreno de la vera objekto de niaj studoj.

Origino de la homo. La homo aperis sur la Tero jam en tre antikva epoko. La *arkeologoj*, kiuj fosis la internajon de la tero trovis multajn ostojn kaj ruinojn, laborilojn kaj armilojn de la t. n. *antaŭhistoriaj homoj*. La *geologoj*, estas tiuj scienculoj, kiuj okupiĝas pri la historio de la Tero kaj pri la teraj formoj, kiujn ni nomas tavoloj. Ili konkludis, ke la ostoj de la plej malnovaj homaj trovaĵoj kuŝas en tavoloj, kiuj datas de duonmiliono da jaroj antaŭ nia epoko. Ni povas do diri, ke la homo aperis jam antaŭ 500.000 jaroj sur la Tero sed estas eble, ke multe antaŭ tiu tempo. En tiu malproksima epoko Eŭropo estis kovrita de glacio kaj tial oni nomas ĝin *glaciepoko*. Depost tiam, kiel vi certe lernos en la elementoj de la astronomio, aŭ aliloke, la akso de la Tero ŝanĝis sian angulon kun la ekliptika ebena kaj dank' al tiu ŝanĝo la vivo reprenis sian kutiman aspekton sur la Tero. Sen tia ŝanĝo la homoj de la hodiaŭa Eŭropo aspektus ĉiuj kiel la Eskimoj de la nordpoluso. Niaj tutaj civilizacio kaj kulturo estus tiam neekzistantaj ĉar ni devas scii, ke *la klimato kaj la aspekto de la ĉirkaŭaĵo estas la decidaj faktoroj, kiuj determinas la kulturon de la popoloj*. La homoj de la varmegaj, tropikaj landoj povas vivi preskaŭ sen laboro. La naturo liveras al ili ĉion, kion ili bezonas. Bananoj kaj multegaj aliaj sukaj fruktoj estas je ilia dispono en ĉiuj partoj de la jaro kaj la sunlumo permesas al ili ne zorgi pri komplikaj vestaĵoj. Pro la boneco de la naturo, tiaj popoloj, vivantaj en tropikaj landoj ne multe progresas. Aliparte, la vivo de popolo vivanta inter glacio kaj sur malfekunda tero, elĉerpigas en eterna batalego por la ekzistado mem. Nek la indiĝenoj de la tropikoj kaj nek la Eskimoj por la polusoj povis do multe evoluadi. La klimato de Eŭropo kaj de Ameriko estas sole taŭgaj

por potenca homa evoluo. Ni do ne devas kredi, ke la civilizo estas ennaskita propreco de iuj popoloj. La naturo ne faris grandajn diferencojn inter la homoj, rilate al mensa vidpunkto. En ĉiuj homoj, mem en la plej humilaj, estas enkaŝitaj intelektaj trezoroj. Kio estas ebla al unu popolo, al unu individuo, tio estas ankaŭ ebla al alia popolo, al alia individuo. Per volo kaj per diligenta laboro ĉiu povas atingi belajn rezultatojn. Pro la sama motivo ĉiu lernanto povas atingi la plej bonan noton kaj mi esperas, ke en tiu ĉi bela fako, ĉiuj miaj lernantoj estos eminentaj.

Inter homoj estas diversaj tipoj. La diferencoj inter la diverskoloraj homoj estas sufiĉe grandaj, tamen estas hodiaŭ certe, ke ĉiuj koloraj homoj venas el la sama fonto. La homaro formas unu grandan rondon familian kaj la diferencoj inter ni estas malpli gravaj kaj rimarkindaj ol la similecoj. Antaŭe oni penis klasigi la homojn laŭ rasoj, la hodiaŭa scienco forlasis tiun ĉi klasigon, kiu neniam sukcesis perfekte kaj ni klasigos la homojn laŭ *popoloj*. Efektive la homoj de la kvin kontinentoj estas tute miksitaj. En la sango de ĉiuj popoloj estas jam miksitaj la sango de ĉiuj aliaj popoloj. Eble ŝajnos al vi strange, sed estas scienca fakto, ke en la sango de la sudeŭropanoj estas retrovebla la sango de la afrikanoj. Rezultas el tiuj ĉi supraj konsideroj, ke la homaro devas esti solidara komuneco de ĉiuj popoloj.


La klasigo de la homoj laŭ popoloj estas fondita sur la tie-nomita *etnikaj karakteroj* de la homoj. La koloro, la formo de kranio, la haroj, kaj aliaj korpaj diferencoj inter la homoj ne tiom gravas, kiom la komuneco de lingvoj, kulturoj, moroj kaj kutimoj, kiuj distingas la unuopajn popolojn de la tero. Efektive, la homo ne vivas izole, sed en komunecoj, kiuj estas nomataj *socioj*. Dum la daŭro de la historio la socioj ne restas ĉiam la samaj, ili evoluas kaj ili transformiĝas. La ŝanĝoj de la socioj ne estas revoluciaj sed evoluciaj, kiel ĉio en la naturo. Sed pri tio vi nepre aŭdos en aliaj fakoj, nome en la *sociologio*. Mi nur atentigas vin, ke en la historia studado oni devas konsideri la homon ne kiel solan sed kiel socian individuon, kies ĉiuj agoj kaj aktivecoj estas limigitaj de la sociaj leĝoj.

Kial la homoj formis sociojn kaj ili ne vivas izole, kiel la bestoj? La kialo de tiu ĉi afero estas la t. n. *ekonomia principo*. La ekonomia principo kreis la *metodon de la labordivido*, kiu sole ebligas la realigon de grandaj kaj *kollektivaj* laboroj. La unuopa homo estas malforta kaj pereema, sed la homaro de la Tero formas unu solan gigantan organismon, kies potenco estas grandega kaj kiu povas esti nomata eterna. La homoj spertis, ke ili multe

pli bone povas ekzisti, se ili kunigas kaj tiamaniere fondiĝis, jam en la aŭroro de la homaro, la *familio*, kiu restas por ĉiam la bazo de la socioj. Socio, en kiu ne plu estus familio, estas fortikaĵo de kartoj: je la unua potenca blovo de la vivo, ĝi falus en ruinoj! La sama principo de solidareco kreis ne nur la familion, sed ankaŭ la metiojn, la profesiojn, la kastojn, la industriajn kaj komercajn organizaĵojn, kiuj formas hodiaŭ nian socion.

Mil kaj mil demandoj formas unu grandan ĉenon de homa scio. Ni ne povas paroli tie ĉi pri la tuta ĉeno, nur pri kelkaj ĉeneroj. Sed tiu, en kiu animo loĝas, tiu, en kies psiko ardas flamo de lernemo, de scivolemo kaj de diligenco, tiu certe ekkonos dum sia vivo, la plej grandan parton de la ĉeno, kiu reprezentas la homan scion. Ĉar ni devas ĉiam memori, ke sole la scio diferencigas la homon de la besto. Post tiuj ĉi enkondukaj vortoj, ni ekkomenca nian propran studon pri la homa historio.

Antaŭ ol skizi la vojon, kiun faris la homaro de post la antikveco, mi devas fari kelkajn gravajn rimarkojn. La progreso de la homaro ne estas unu rekta linio, kiu penetras alten de la abismo. Bedaŭrinde la homaro ne kapablis progresi sen ĉeso. Sub diversaj cirkonstancoj, kiel invado de barbaroj, propraj eraroj, militoj, epidemioj kaj naturaj kataklismoj, la unuopaj homaj kulturoj neniĝis. Post triumfa kulturperiodo sekvis malsuprenfalo. Sed post la plej senesperaj mallumaj periodoj de la homa historio venis ree periodoj de progreso, kiuj ĉiufoge estis pli brilaj ol la antaŭaj progresoj. Ni povas reprezenti la marŝon de la homa kulturo per la sekvanta desegno:



En la unuopaj partoj de la progreso de la homaro la linio estas *kontinua*, t.e. la progreso estas *sen salto*. Se ni volas pli ekzakte reprezenti la homan progreson, ni devas rimarki, ke kelkfoje, nur tre malofte, sed tamen almenaŭ en kelkaj specialaj okazoj ekzistas salto en la homa progreso. La homo kiu per unu salto kapablas fari ian grandan aferon, kiun generacio ne povus fari en ordinaraj cirkonstancoj estas nomata *geniulo*. La plej grandaj artistoj kaj scienculoj, pri kiuj vi jam aŭdis aŭ aŭdos, estas tiaj geniuloj. Sed ni devas ĉiam memori, ke la geniuloj estas tre tre

maloftaj: eble en ĉiu jarcento estas nur unu aŭ eĉ neniu geniulo. Sekve ni neniam kredu, ke ni mem estas geniuloj. La karaktero de la geniulo estas ĝuste la modesteco. Ne ni mem sed la posteuloj devas juĝi pri ni aŭ pri niaj samepokanoj. Ni estu kontentaj alporti nian brikon al la potenca konstruaĵo de la homaro!

Rimarko por instruantoj: Oni rimarku, ke ĉiuj miaj frazoj estas preskaŭ sen escepte pedagogiaj tendencaj frazoj. Tiu ĉi teksto estas efektive nur resumo. Oni skribu sur tabulon la substrekitajn vortojn kaj oni eventuale daktu la resumon de la lekcio dum dek minutoj post la leciono. Dum la lekcio mem la lernantoj devas nur atenti.

(DAŬRIGOTA)

JOZEFO MAJOR.

Premiita en la XIII^aj Internaciaj Florludoj.

INTERNACIA LABOROFICEJO

Informservo

Altaj salajroj en Usono

La Internacia Laboroficejo ĵus eldonis raporton de ĝia Vicedirektoro, Sro. Butler, pri Industriaj Rilatoj en Usono.

Unu el la plej interesaj ĉapitroj en tiu libro pritraktas la doktrinon pri altaj salajroj. El la sciigoj kolektitaj Sro. Butler kalkulas, ke la valoro de la manufakturaĵoj de Usono pliiĝis je 149 procentoj dum la lastaj dek jaroj, sed ke salajroj pliiĝis eĉ plie (175 procentoj). La meza valoro produktita ĉiujare de ĉiu laboristo plialtiĝis de 3.447,84 dolaroj al 6.892,93 dolaroj, dum la meza jara salajro pliiĝis de 579,14 dolaroj al 1.253,93 dolaroj.

Plene kunkalkulinte la pliiĝon de la vivkosto dum la sama periodo, oni povas konkludi, ke la aĉetpovo de salajroj pliiĝis je 37,1 procentoj. Certe la vivnivelo de salajroj estas plej alta en la plej bone organizitaj metioj. Tamen estas sendube, ke okazis ĝenerala plialtiĝo de la prospero de la laboristaro en Usono kune kun pliiĝanta produktado.

Sro. Butler diras:

«Usonaj mastroj nun ĝenerale esprimas la opinion, ke altaj salajroj estas profitaj, kiel instigo al produktado, kiel kaŭzo de pli bonaj sentoj ĉe la laboristoj, kaj ankaŭ tial, ke ili kreas ĉe la salajruloj aĉetpovon, kiu nutras kaj subtenas prosperon. La pago de bonaj salarioj certe produktis tiujn rezultatojn, sed se oni imagus, ke la meza Usona mastro intence akceptis politikon favoran al altaj salajroj, tial ke li antaŭvidis tiujn rezultatojn, oni

supozus en li antaŭvidon, kiun li ne povus pretendi. Estas ja vero, ke Sro. Henry Ford starigis minimuman salajron de 5 dolaroj por okhora tago jam en Januaro 1913. Tiel farante, li radikale deflan-kiĝis de la tiam kutimaj salajroj kaj kaŭzis grandan maltrankvilecon kaj proteston ĉe liaj konkurantoj. Li faris tion, laŭ sia propra klarigo, tial ke li opiniis, ke ĝi estas bona negoco, kaj li trovis ĝin «unu el la plej bonaj kostmalpliigantaj procedoj, kiujn ni iam faris». Tamen lia ago estis escepta kaj ne estis ĝenerale imitita. Do la lasttempa pliigo de salajroj povas esti atribuita al la ekonomiaj kaŭzoj antaŭe priskribitaj, kaj ne al intencita politiko. Tamen, oni trovis, ke altaj salajroj kunportas kompensojn, kiujn oni ne konjektis. Estas sendube, ke ilia efiko kiel stimulo kaj al produktado kaj al konsumado estis plibone komprenita de la mastroj ol iam antaŭe. La fakto, ke multaj miloj da laboristoj posedas superreston super la nuraj vivnecesajoj signifas pliigitan postuladon por ĉiuspecaj komercaĵoj, alivorte, pli konstantan merkaton kaj stimulon al plia produktado. Pro tiuj motivoj, la principo estas nun larĝe akceptita ĉe Usonaj mastroj, ke estas bona politiko eviti laŭeble la malpliigon de salajroj, ke laŭpeca salajro por la sama laboro devas ne esti malaltigita, kaj ke oni devas serĉi ŝparrimedojn ĉie alie, antaŭ ol tuŝi salajrojn.

Bibliografio

WIESBADEN-GERMANUJO. Eldonita de Städtisches Verkehrsbüro en Wiesbaden. Havebla senpage per poŝtkartmendo al la Urba Oficejo por Trafiko en Wiesbaden (Städtisches Verkehrsbüro).

Bela broŝuro kun priskribo de la resanigaj kvalitoj de la akvo de tiu fama banloko. Bonegaj bildoj ilustras la raporton pri la banloko, kies akvoj estis jam konataj de la romanoj en antikvaj tempoj. Ĉu niaj enlandaj banlokoj atendos ankoraŭ longe por uzi esperanton en la servo de sia propagando? Ili konstata la belan ekzemplon de Wiesbaden. M. S.

KATALOGO DE LINGVOJ.—Eldonis Universala Esperanto Asocio, 12 Boulevard du Theatre, Geneve. Prezo 2 sv. frankoj. Paĝoj, 19.

La verko enhavas antaŭparolon pri la lingvoj de la homaro, kies nombro plej laste atingas 3.600. Poste venas listo de la plej

ĉefaj kulturlingvoj kaj de tiuj kiuj apartenas al malvastaj landoj, kun statistiko de la nombroj de iliaj parolantoj. Alia ĉapitro temas pri la lingvo internacia kaj enhavas ankaŭ statistikon pri la multnombraj projektoj de artefaritaj lingvoj, kiuj klare montras kiel la problemo de universala lingvo interesis ĉiam la homaron. Ni rekomendas varme la aĉeton de la broŝuro, kiu povas esti tre taŭga armilo en la manoj de bona propagandisto.

ZAMENHOF-RADIKARO.—Eugen Wüster. Eldonis Ferdinand Hirt & Sohn en Leipzig. Paĝoj 84.

Ĝi estas eltirajo el la granda materialo necesa por la preparado de la granda Enciklopedia Vortaro de la sama aŭtoro, kiu estas jam ekpublikigita de la sama firmo. Ĝi enhavas la kompletan liston de ĉiuj Zamenhofaj vortoj uzataj de la majstro en siaj verkoj, kaj kiuj ne enestas en la oficiala radikaro. Ankaŭ oni povas en ĝi legi la opinion de la aŭtoro pri la esperantigo de la propraj nomoj. Tre interesa kolekto da vortoj kiuj venis al nia lingvo sub la alta patronado de Zamenhof kaj kiuj iam certe estos oficialigataj. M. S.

ESPERANTA KATALOGO.—De la firmo Rudolf Mosse.

Samideanoj bonvolu peti ĝin de la fama firmo, kiu nun favorigas nian movadon per la publikigo de multaj kaj interesaj libroj. Turnu vin al Firmo Rudolf Mosse, Esperanto-Abteilung, SW 19, Jerusalemer Str. 46-49, Berlin.

CIES.—Internacia Esperanta Stenografio. Aĉetebla ĉe la aŭtoro, Dyba, gimnazia profesoro, Berlin-Niederschonhausen, Moltkestr. 4.

Nova projekto de stenografio aplikita al la esperanta lingvo. Interesatoj turnu sin al la supra adreso.

PRI LANDNOMOJ, La Sistemo de D-ro Zamenhof.—Aŭtoro S-ro Th. Cart. Paĝoj 16. Prezo 0,40 sv. frankoj.

Perfekta raporto pri la sistemo de D-ro Zamenhof por la nomoj de la landoj. Mi aprobas entute la konkludojn de la Prezidanto de nia Akademio, kaj profitas tiun okazon por konstati ke en Katalunujo neniam iu samideano deapartiĝis de la sistemo Zamenhofa kaj en tiu ĉi gazeto mem oni protestis kontraŭ la uzo de tute nenecesa *io*. Mi ne komprenas kion oni povas riproĉi kontraŭ ujo, kaj se ni devus ŝanĝi sufikson nur tial ke ĝi malbele sonas en la oreloj de tiu aŭ alia nacio, ni troviĝus ĉiam en konstanta flikado de la lingvo. Tiuj kiuj ne ŝatas *ujo'n* rajtas ja uzi la finiĝon *lando* kiu por mi estas ja pli belsona ol *io kaj ujo*. M. S.

GVIDFOLIO PRI DORDRECHT.—Eldonita de la komunuma

estraro sub aŭspicioj de Ŭ. E. A. Petu ĝin senpage al Gemeentebestuur, Dordrecht, Nederlando.

AUSTRALIO, Lando kaj Popolo. Originale verkita de A. Del-sudo kaj Lauri Laiho. Kun 31 ilustraĵoj kaj landkarto. Eldonis Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig. Paĝoj 94. Prezo: luksa tolbindaĵo 6,50 R. M.

En amaso da verkoj por recenzo, tiu restis en angulo pro la temo, geografio, kiu ŝajne povas esti iom enuiga. Kiam ĝi, tamen, atingis sian vicon mi konstatis mian eraron: la verko certe meritis esti el la unuaj. Kiu volas koni iom pri la malproksima vasta kontinento tie certe trovos la plej kompletan kaj precipe fidelan raporton de la vivokondiĉoj en Aŭstralio. En diversaj ĉapitroj, ni ne povus diri kiu estas la plej interesa ' la aŭtoroj priskribas ĉion kio koncernas la originojn de la lando, la enloĝadon de la brita gento, la urbojn tie kreskintajn post cento da jaroj, la fervojojn, la industriojn la ŝancojn de enmigrantoj, la arton kaj eĉ la malvirtaĵojn de la popolo. La lingvo estas tre korekta kaj meritas nenian riproĉon. M. S.

XIV^a; INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Eksterordinaraj Premioj

N.^o I.—Premio de S-ro NARCIS BOFILL: 50 ptoj. Libervola Temo.

N.^o II.—Id. de P-tro J. FONT GIRALT: 50 ptoj. Libervola Temo.

N.^o III.—Id. de Esperantista Grupo «LUMON» el Terrassa: 50 ptoj. Libervola Temo.

N.^o IV.—Id. de S-ro Delfi DALMAU, Prezidanto de K. E. F.: 50 ptoj. Libervola Temo.

N.^o V.—Id. de S-ro Marian SOLA, Direktoro de Kataluna Esperantisto: 50 ptoj. Libervola Temo.

N.^o VI.—Id. de S-ro SEBASTIA ALBERICH: 50 ptoj. Libervola Temo.

N.^o VII.—Id. de Grupo Esperantista «PACO KAJ AMO»: 50 ptoj. Temo Libervola.

Pliaj premioj kaj temoj sekvos en ceteraj numeroj de nia gazeto.

La Sekretario de la Juĝantaro.

Barcelono la 31^an Januaro 1928^a

Simile al la mar'...

Simile al la mar'
 Animo mia revas,
 Se la krepusko de l' vesper'
 Forviŝas ĉion for de l' ter'
 Kaj lun' sin alte levas...

Simile al la mar'
 Animo mia luktas
 Se de l' ventego vemuĝad'
 Al mi parolas pri plendad'
 Kaj ondoj forte bruas...

Simile al la mar'
 Animo mia luktas
 Movante kaj ŝanĝante sin
 Animo! mi ne konas vin
 Mistera, ho, vi restas.

Sino. Catharina J. RÖSKES-DIRKSEN. Premiita en la XIII^a Internaciaj Floraj Ludoj.

Pri la Movado

Kara Sinjoro Redaktoro.

D-ro Privat parolas en la Januara numero de «Esperanto» pri « eminentuloj », kiuj ian tagon povus perfidi. Ĉu eble? Mi tre dubas. Se vere, mi povas certigi, ke inter la eminentaj perfidontoj (?) troviĝas neniu Akademiano. Ĉiuj estas kaj restos fidelaj; ankaŭ kiam post multaj, multaj jaroj—kiujn apenaŭ kelkaj verŝajne ĝisvivos—la Registaroj oficialigos Esperanton ili tiam fidele sekvos la vojon montritan de D-ro Zamenhof en la Washington'a Kongreso; ili opinias kiel li, ke, se «iam registare starigota komitato «traktos sian taskon serioze, la postkomitata Esperanto restos «tute la sama lingvo, kiel la Esperanto antaŭkomitata» kaj ke «nur eble kelkaj nunaj formoj fariĝos arĥaismoj, neniel rom-pante la kontinuecon de la lingvo kaj neniel ruinigante la valoron de tio, kion ni ĝis nun akiris».

Ni ne ŝanceliĝis hieraŭ, ne ŝanceliĝas hodiaŭ, ne ŝanceliĝos morgaŭ; firme kaj tute trankvile ni daŭrigu nian poresperantan laboron!

Kun kora saluto

TH. CART

Prezidanto de la Lingva Komitato.

—P. S. Ni kredas ke la komunikaĵo de S-ro Cart kiun ni presas ĉitie estas tre prava kaj ni devas ankoraŭ aldoni ke ni neniam havis eĉ dubeton pri lia fideleco al la pure Zamenhofa lingvo. La artikolo de S-ro Privat en la lasta numero de «Esperanto» estas certe ofenda por ĉiuj samideanoj kiuj malaprobas, kiel ni mem, la uzadon tute arbitran de la sufikso *jo*. Kion celas per tio la pioniroj de U. E. A.? Ĉu ili eble volas malgrandigi la simpatian kaj kelson kiun ĝis nun la esperantistaro donis al ili? Se ili daŭrigas sian argumentadon per tia stilo ili nur atingos krei malamikajn rilatojn inter la samideanaro.

LA REDAKCIO.

Radio.—La 23^a de Januaro paroladis pri la temo «La beleco de Esperanto» antaŭ la mikrofono de Radio Barcelona nia samideano S-ro Sebastia Alberich Jofré.

Vinaroç.—La urbaj ĵurnaloj publikigis diversajn sciigojn pri la venonta kongreso de K. E. F. La ĵurnalo «Heraldo de Vinaroç» malfermos esperantan fakon kiu ĉiusemajne raportos pri esperanto.

Terrasa.—La grupo esperantista «Lumon» havis sian ĉiujaran kunvenon en la 23^a de januaro. Nova komitato estas elektita: Prez. S. Chaler, Vicpr. N. Casamada, Sekr. E. Anglarill, Klasisto A. Marsa, Vicsek. J. Escursell, Voĉdon. Cortés, Solanilla.

Rubi.—En Centro Democràtic okazis parolado por propagando de Esperanto. Oratoro S-ro M. Solà. Grandnombra publiko ĉeestis.

Vich.—La esperantistoj organizas nekrologian solenaĵon memore al D-ro J. Terricabras (P. L. R.). La dato ne estas ankoraŭ decidita.

Fideleco.—S-ro MONTAGU C. BUTLER sendis al ni proteston kontraŭ la lastaj artikoloj en «Esperanto» de U. E. A., kiujn aludas ankaŭ S-ro Cart en alia paĝo de ni gazeto. Jam nia redakcio donis sian opinion tie.

Barcelona.—La laborema grupo Barcelona Stelo malfermis kun sukceso novan kurson de Esperanto sub la gvidado de S-ro Navarra. Ĝi komenciĝis la 2^a de Januaro.

En sia lasta ĝenerala kunsido la sama grupo elektis la jenan direktan komitaton:

Prezidanto, A. Valdepeñas; Vicprezidanto, M. Palomeras; Sekretario, Jaume Navarra; Vicsekretario, Jaume Pruna; Kasisto, Josep Cantó; Kalkulisto, Andreu Lopez; Bibliotekisto, Vicens Andrés; Voĉdonantoj: Joan Gili Norta, Manuel Rodellar, P. Guillemot kaj Jaume Pellicer.

Al ili ni sendas niajn gratulojn kaj deziras plej grandan sukceson en iliaj taskoj.

La Barcelona Esperantistaro antaŭ la venonta Internacia Ekspozicio.—Kunvokita de samideanoj Grau—Alberich—Gili el Barcelono, okazis lastan 5an. de Febrauro, grava kunsido de la barcelonaj esperantistoj ĉe Liceu Dalmau.

Prezidis nia amiko Gili kiu detale skizis la laborojn farotajn okaze de la venonta Internacia Ekspozicio en Barcelono en la jaro 1929^a, celantajn la propagandon de nia urbo kaj Esperanton. Ĉefece oni devas klopodi interesigi la tutmondan samideanaron viziti la urbon kaj ekspozicion.

Entuziasme la multnombra ĉeestintaro akceptis la ideon kaj promesis ĉian helpon.

Por entrepreni la laborojn oni elektis la Organizan Komitaton. Krom samideanoj Jaume Grau Casas, S. Alberich Jofré kaj Joan Gili Norta, oni decidis ke ĉiu Barcelona Societo sendos unu reprezentanton kunhelpi la taskojn de la Komitato.

K. E. F. gratulas la iniciatintojn kaj deziras plej grandan sukceson al ilia entrepreno.

Volonte ni metas la paĝojn de K. E. al ilia dispono kaj ni esperas tre ofte sciigi niajn legantojn pri la raportoj kaj rezolucioj de la ĵus elektita Komitato.

Foiro de Lyon.—Okaze de la Foiro de Lyon, famekonata en la tuta mondo, kiu okazos en Marto proksima, estas organizitaj Komercaj Esperanto-Tagoj por la 17 kaj 18 de Marto. Estas eldonita tre bela broŝuro en Esperanto pri la foiro. La fervojoj konsentas rabaton al opaj ekskursantoj kaj komercistoj.

Nekrologio.—La 1an. de Februaro mortis en Terrassa en la aĝo de 85 jaroj S-ro MIGUEL MARSA ARNELLA patro de nia kunkomitatano S-ro Ramon MARSA. Bonvolu nia bona amiko akcepti la esprimon de nia sincera kondolenco.

Estatuts de la Federació Catalana d'Esperantistes

Article primer.—Amb el nom de «Federació Catalana d'Esperantistes» hom constitueix una federació d'esperantistes en terres de llengua catalana.

Art. segon.—L'objecte de la «F. C. d'E.» és la unió de tots els esperantistes en terres de llengua catalana per a la divulgació i propaganda de l'Esperanto, pels fins de la representació aconsellada en la reunió general del V Congrés Internacional d'Esperanto celebrat a Barcelona, per a complimentar tots els acords i resolucions, que afecten als esperantistes com a col·lectivitat, emanats dels Congressos Internacionals o dels nuclis directores de la llengua del Dr. Zamenhof.

Art. tercer.—Per a el millor compliment de l'article anterior, la «F. C. d'E.» publicarà una revista, l'organització de la qual serà determinada per un reglament especial interior publicat pel cos de redacció i prèvia acceptació del Comitè Directiu. El preu de l'abonament a la revista serà de sis pessetes anyals.

Art. quart.—La «F. C. d'E.» constarà de membres associats i de membres isolats; els primers seran federats per mitjà de l'entitat a la qual pertanyin i els altres directament i en caràcter particular.

Els diversos organismes pertanyents a la «F. C. d'E.» contribuiran el seu sosteniment amb la quota trimestral, pagada a la bestreta, de 0'40 ptes. almenys per cada soci i els individuals amb una quota mínima de 3'50 ptes. anuals, pagada a la bestreta.

Art. quint.—La «F. C. d'E.» serà regida per un Comitè Directiu, renovable cada any, compost de President, Vice-president, Secretari, Vice-secretari, Comptador, Caixer, Administrador i quatre Vocals.

Art. sisè.—El Comitè de la «F. C. d'E.» convocarà almenys una vegada a l'any, en diferents localitats, durant la primavera i en dia festiu, tots els federats, en Assemblea o Congrés general, en el qual, prèvia ordre del dia hom donarà compte als assistents dels treballs i gestions acomplerts pel referit Comitè Directiu durant el seu exercici, hom acordarà el lloc on deurà celebrar-se el vinent Congrés o Assemblea, hom nomenarà els individus que deuran constituir el Comitè el pròxim exercici, i hom discutirà les proposicions que hagin estat presentades abans de la sortida del número de la revista anunciant el Congrés o Assemblea, i anunciades en l'ordre del dia.

Art. setè.—El Comitè serà facultat per a crear les seccions que cregui més convenientes per a la prosperitat de la «F. C. d'E.» i de l'Esperanto, les juntes de les quals seran renovades per cada Comitè de bell nou elegit.

Serà president nat de cada secció un individu del Comitè designat pel mateix.

Art. vuitè.—Tots els esperantistes pertanyents a organitzacions federades tindran veu i vot en les Assemblees anuals, però el seu vot serà delegable al president d'un grup o una altra persona qualificada, prèvia la presentació dels corresponents carnets de soci.

Art. novè.—Tots els acords de les Assemblees o Congressos seran presos per majoria absoluta de vots dels socis assistents. Les esmenes que puguin presentar-se a aquest reglament deuran ésser presentades amb la deguda antelació per tal d'incloure-les en l'ordre del dia i publicades en la seva totalitat, puix que només podran ésser discutides i aprovades en les Assemblees o Congressos generals.

Art. desè.—La llengua oficial de la «F. C. d'E.» serà l'Esperanto, podent també emprar-se la catalana en les Assemblees.

Art. onzè.—Aquesta «F. C. d'E.» podrà actuar mentre compti amb dues col·lectivitats organitzades o trenta membres isolats. En cas de dissolució, previ acord d'ella, l'actiu existent serà lliurat al caixer de la Constant Representació de les Societats Nacionals Esperantistes.

Art. transitori.—La «F. C. d'E.» serà domiciliada a Barcelona carrer València, 245.

Noves edicions

AUSTRALIO, Lando kaj popolo (Delsudo-Laiho).

31 il·lustracions i un mapa. 96 planes de text. Enquadernat luxosament amb tela. Preu: 9'75 pessetes.

HISTORIO DE LA LINGVO ESPERANTO. 1.^a part (Privat) 1887-1900. 74 planes. En rústica 2'40 pessetes i en tela 5'25 ptes.

II.^a part 1900-1927. 199 planes. Luxosament enquadernat en tela. Preu: 9 pessetes.

LA SANKTA BIBLIO. L'Antic Testament traduït de l'hebreu pel Dr. Zamenhof, junt amb el Nou Testament, tot en un sol llibre.

Amb paper sense cos, enquadernat amb tela 9 pessetes

Amb paper prim i amb or enquad. amb tela 12'75 id.

Enquadernat amb tela granet fosc 18'75 id.

Enquadernat amb pell amb puntes reforçades 30'00 id.

Nota: Cal afegir el 5 per cent dels preus senyalats, per les despeses de correu, en cas d'ésser els llibres enviats fora de Barcelona. Cal que l'adreça sigui ben clara.

Dirigir-se a Ferd. MONTSERRAT, Villarroel, 107, 2.^o, 2.^a Barcelona. IBERIA ESPERANTO SERVO.

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

El nou President de la Cambra de Comerç de París

El Sr. ANDREU BAUDET ha estat elevat a la presidència de la important corporació parisenca. Ell mateix explica com va fer-se esperantista:

Fou en l'octubre de 1920. El president de la Cambra era llavors el Sr. Pascalis...

Aquest senyor va trametre'ns a la comissió d'instrucció una sol·licitud del Grup Esperantista de París, per a que fos introduïda l'ensenyança de l'Esperanto en les nostres escoles comercials.

Un cert escepticisme era ben visible en els rostres dels membres de la comissió, i no tindrè jo la covardia de fer suposar ni per un moment que no em trovés entre els escèptics; hi era i... feia la mitja rialleta com els demés.

El nostre president, sabent prou bé quines torres de Babel no son els congressos internacionals, senzillament va dir-nos: No sorariguéu, volguts col·legues, jo d'Esperanto no en sé gens, però potser hi hagi en ell una idea, que podria ser digna de la nostra atenció, com ho seria també de la Lliga de Nacions.

De resultes d'aquesta intervenció fou decidit d'estudiar la qüestió. I per això van elegir-me els meus col·legues com a *rappor-teur*.

Vaig obrir els meus documents: surtí una gramàtica i vaig llegir-la pensant que era lo millor que podia fer per a informar-me i informar als meus col·legues.

La primera sorpresa fou, de poguer-la llegir amb fruïció—perquè no crec expressar-me amb exageració si dic que generalment res es mes aburrit que la lectura d'una gramàtica. En aquest cas, pel contrari, em fou un plaer. Al cap de deu hores ja havia enllestit tots els exercicis continguts en el llibret.

(La Movado).

"KATALUNA ESPERANTISTO"

OFICIALA ORGANO DE
KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

Membra kotizajo: 3'50 p.; Grupoj: 1'20 por membro.

Jarabono: 6 p. enlande kaj 6 sv. fr. internacie, provokzemplero 2 respondkuponoj.

Federacia sidejo kaj redaktejo: carrer València, 245-BARCELONA

LA DEK DEVOJ DE LA ESPERANTISTO

1. Bone sciu la lingvon, traktu ĝin kun respekto, kaj lasu la versfaradon al poetoj.
2. Esperanton uzu parolante, studu legante kaj ne fuŝu skribante.
3. La plibonigistoj diskutu; vi Fundamenton sekvu kaj fide-la restu.
4. Propagandu ĉiam, ne ĉie; klarigu, ne prediku; rakontu faktojn, ne esperojn.
5. Kion vi povas lerni nur en unu semajno, ne instru en unu horo; el malgravajtoj ne faru regulon, kaj el la regulo ne faru malgravajton.
6. Verkante en Esperanto, ne kreu interesa, kion nacilingve neniu legus; ne imagu, ke preseraroj plibeligas libron, ne malesperu, se mankas aĉetantoj.
7. Al grupo aliĝu; la kunvenon vizitu; Esperanton parolu. Subtenu K. E. F.
8. Atentu, ke internacia lingvo vivos nur per uzado; memoru, ke tial internacia organizajo estas necesa, senlace varbu por U. E. A.
9. Legu gazeton, por ke vi konu faktojn; novajn abonu, por ke ĝi povu ekzisti; kunlaboru, por ke ĝi estu interesa.
10. Por Esperanto kiel movado agu; por ĝi kiel realajo pagu, kaj kiel altan idealon konservu ĝin en via koro.



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gataro* Redakcio: *Carrer València 245 BARCELONA*

DIREKTORO: MARIAN SOLÁ

Pri lingvaj aferoj

La polemiko naskita de la fama artikolo de D-ro Privat en la gazeto «Esperanto» ne ĉesis ankoraŭ; daŭras eble kun pli da vi-
gleco. En la februara numero de nia organo ni jam raportis pri
la letero de la Prezidanto de la Akademio kaj pri cirkulero de
S-ro Butler en Londono. Antaŭ kelkaj tagoj ni ricevis ankoraŭ
cirkuleron de S-ro Delanoue, ĉefdelegito de U. E. A. en Parizo kiu
ankaŭ tre prave protestas kontraŭ la enmiksado de tiu societo
en la lingvajn aferojn. D-ro Privat sendis ankaŭ cirkuleron en kiu
li esprimas ke per sia artikolo li tute ne celis iun akademianon
kaj prezentas al S-ro Cart sian projekton por la aranĝo de la afero
pri landnomoj. La tuta esperantistaro certe ĝojos ke tiu deman-
do ne plu malkvietigos la samideanojn kaj tion certe ni deziras
tutkore.

Sed ni rimarkas en la cirkulero de U. E. A., ke tiu societo
devas voĉdoni pri la decido de la Akademio, kaj ni pensas ke tio
estas erara vojo. U. E. A. laŭ siaj statutoj estas societo por la
aplikado de la lingvo Esperanto, sed la kontroladon de la lingvo
havas sur sin nur la Lingva Komitato kaj la Akademio.

Ni estas rajtigataj aserti ke tiu estas la opinio de la delegitoj
de U. E. A. en nia lando kaj eĉ de la plej multaj ĝiaj membroj.

Marian SOLA.

La Urbo de nia XX.^a

Antverpeno, la Reĝino de la Skeldo

Niaj praavoj, Germanoj de Saksa sango, estis ekloĝintaj sur la dekstra Skeldobordo, verŝajne en la 6^a aŭ 7^a jarcento kaj tie konstruis enŝipiĝejon. De tiu lasta vorto en Flandra lingvo «Werp» devenus la nomo «Antwerpen» (aent 't—Andwerf, Antwerp—ĉe la enŝipiĝejo). Pli populara estas la legendo pri giganto Druon Antigoon, kiu forhakis la manon (Flandre; «Hand») de ŝipistoj rifuzintaj pagi imposton, por ĵeti (Flandre: «werpen») ĝin en la Skeldon. Kuriozaĵo estas, ke en la blanzono de Antverpeno ankoraŭ troviĝas du manoj.

La fortikigita kastelo, kiu estis la naskejo de la urbo, estis deŝruinta de la Normanoj, tiel ke en la deka, j.c. la historio pri ĝi ne plu parolas. Malrapide tamen ĝi releviĝis en la 12^a j.c.; vivis ĉi tie jam ampleksa loĝantaro de komercistoj.

La komerco ja kaŭzis la floradon de Antverpeno. Precipe en la 16^a j.c., pro la defalo de Bruĝo, Antverpeno iĝis la plej grava komerca centro de Eŭropo.

Fidinda atestanto pri tiu tempo estas la italo Ludovico Guicciardini, kiu travojaĝis la Nederlandojn, pri kiuj li donis priskribon eldonitan en 1567 en la fama Antverpena presejo de Kristoforo Plantin, la reĝo de la tipografoj de sia tempo. Lia plej interesa domo kun laborejo kaj butikoj estas konservata ĝis nun en sia originala stato, kaj vizitebla de la publiko.

Guicciardini taksas la nombron de fremdaj komercistoj en Antverpeno je mil kaj la loĝantaro je 100.000 ĝis 150.000 okaze de la foiroj. Kelkfoje oni vidis sur la Skeldo ĝis 2.500 ŝipoj, inter kiuj multaj devis atendi de du ĝis tri semajnoj antaŭ ol ili povis malŝarĝiĝi.

Krom la komerca prospero la industrio plene floradis. Ekzistis multaj fabrikejoj de drapo kaj ĉiuspecaj silkoj. La Antverpena veluro estis ĉie konata. De 1415 oni teksis tapiŝojn. La veturilfarado kaj vitropentrado okupis multajn en Antverpeno, kie eĉ estis troveblaj kanonfandadoj.

Plie ekzistis potencaj gildoj aŭ korporacioj kaj inter ili tiuj de la bierfaristoj, kun 200 membroj, la «Gerstenbier» (hordea biero) estis tre ŝatata kaj eksportata eksterlanden. Antverpeno ankaŭ de tiam famiĝis pro siaj diamantpolurejoj, laŭ metodo, kiun la Bruĝano Ludoviko Van Berkem eltrovis. Estus tre interese por la kongresanoj, viziti modernan diamantlaborejon.

Antverpeno estis la metropolo de la Flandra arto. Alberto Dürer, kiu loĝis tie ĉi en 1520 konfesis, ke li ne vidis en Germanujo tiajn fieregajn palacojn kiel en la Skeldurbo. En 1518 la belega katedralo gotika kun sia gracia turo, 123 metrojn alta, estis finekonstruita post du jarcentoj da laboro. Laŭ Schiller ĝi estas la plej bela preĝejo de la Kristaneco post tiu de Sankta Petro en Romo.

La riĉeco de Antverpeno bedaŭrinde pereis pro la religia batalado dum la Hispana regado kaj en 1648 la fermo de la Skeldo, pro la kontrakto de Munster donis la mortigan baton.

La denaska artema naturo de la Antverpenano tamen glore riveliĝis en tiu tempo de malprosperado. Heredintoj de la famo de Quinten Matsys, la lasta reprezentanto de la Gotika Flandra pentroskolo aperis figuroj kiel Rubens, Van Dyck, Jordaens, Teniers, Quellin kaj aliaj pentristoj kaj skulptistoj, kiuj por eterne fiksis la prestiĝon de la Flandra pentrarto. En muzeoj kaj preĝejoj iliaj ĉefverkoj estas admirataj.

La Skeldo, tiu fonto de riĉeco de Antverpeno kaj de la tuta Belgujo estis denove malfermita por la ŝipveturado, de la unua Franca Respubliko en 1792 kaj precipe dum la regado de Napoleono I, la komerco ree ekfloris kaj poste daŭre prosperis, precipe kiam en 1863 la impostoj, kiuj devis esti pagataj al Holando estis forigitaj.

La haventraŭko post 1900 triobligis (en 1926: 11 599 ŝipoj—22 794 855 t.). La regule al Antverpeno veturantaj ŝiplinioj nombriĝas ĝis 200. Fakto nemiriga, kiam oni konas la favoran situacion de nia haveno, ĝiajn bonegajn instalajojn kaj ilaron kaj ĝian malmultekostecon. Novaj gravaj laboroj estas komencitaj kaj post 1930 la tuta dokaro havos surfacon de almenaŭ 550 Ha.—Vizito al la haveno estos organizata dum la proksima universala kongreso.

La moderna Antverpeno same kiel la haveno ĉiam plivastiĝas. Ĝi estas la plej granda urbo de Belgujo (300.000 da enloĝantoj—500.000 kun la antaŭurboj). Plej gravaj estas ĝiaj industriaj institucioj, inter aliaj bierfarejoj, distilejoj, sukerrafinejo, cigarfabrikejoj, tanejoj, sapfabrikejoj, maŝin—, aŭtomobil—kaj ŝipkonstruejoj; tre potencaj estas la industrioj de telefonaparatoj kaj fotografaj produktoj, krom tiu de la diamantfacetado.

Je ĉiu vidpunkto Antverpeno estas vizitinda. La Reĝino de la Skeldo, kiu tiel gastame akceptis la Esperantistojn dum la 7.^a Kongreso en 1911, sin pretigas por agrabliĝi kaj plej interesigi la viziton de kelkaj miloj da kongresanoj en la venonta monato Aŭgusto.

Je ĝia nomo la gesamideanoj el la tuta mondo estas kore invitataj!

H. Vermuyten (Antverpeno).

Skizo de Humanista Historio

(2.^a Lekcio)

La homa evolucio. Ni klasigos la evolucion de la tuta homaro en kvar klasojn:

- 1.) Paleolito aŭ Malnova ŝtonepoko.
- 2.) Neolito aŭ Nova ŝtonepoko.
- 3.) Eneolito aŭ ĵusa ŝtonepoko.
- 4.) Historio.

La tri unuaj vortoj venas de la greka lingvo kaj ni povas kompreni ilin, kiam ni scias, ke *lithos* signifas ŝtono.

<i>paleos</i>	»	<i>malnova.</i>
<i>neos</i>	»	<i>nova.</i>
<i>eneos</i>	»	<i>ĵusa.</i>

Tiuj ĉi tri unuaj grupoj nomiĝas kune *antaŭhistoria epoko*. Per la unuaj *skribaj dokumentoj* komenciĝas la homa historio.

La *paleolito* etendiĝas ĝis la 20^a jarmilo antaŭ Kristo. Dum tiu ĉi periodo la instrumentoj de la homo estis farataj el ligno, ostoj, ŝtono. La primitivaj armiloj, kiujn oni elfosis el tiu ĉi epoko estas nur krude prilaboritaj. La tiamaj homoj estis vestitaj per bestaj feloj kaj ili loĝis en kavernoj. Ili subtenis sian vivon per ĉasado kaj per kolekto de nature kreskantaj fruktoj. La ŝtona epoko estas samtempe la epoko de la t.n. *primitiva ekonomio*.

La Neolito. Tiu ĉi estas la epoko de la *polurita ŝtono*. La instrumentoj estas nun pli perfektaj ol en la antaŭa periodo. La homoj loĝas nun ne plu en kavernoj, sed ili konstruas vilaĝojn sur lagoj, konstruante la primitivajn domojn sur enfositaj arbotrunkoj. Tiamaniere ili sukcesas pli bone sin defendi kontraŭ bestaj kaj homaj malamikoj kaj ili ankaŭ ekkonis jam la fiŝkaptadon, kiu fariĝis unu el la plejgravaj ekonomiaj faktoroj de tiu ĉi epoko. Bovo, hundo, ŝafo, kapro kaj aliaj bestoj estas jam malsovaĝigitaj kaj vivas kun la homoj. Cerealoj kaj legomoj estas jam kulturitaj per primitivaj iloj. La plugilo ne ankoraŭ estas konata, oni prilaboras la teron per lignaj stangoj. Potoj, boatoj kaj vestaĵoj estas jam fabrikataj de profesiuloj. La vestaĵoj estas zorge kudritaj el lino kaj lano. La kotono estas jam ankaŭ konata, kiun oni tinkturas per okro, kiu similas la koloron de la tero kaj estas speciale taŭga por ĉasistoj. Ĉi ĉiuj teknikaj progresoj permesis la vekigon de la spirita vivo; en tiu ĉi epoko oni konstruis la unuajn primitivajn preĝejojn.

La Eneolito: Tiu ĉi epoko ne estas ŝtona epoko, kvankam la nomo tion diras: sed ni povas konsideri, ke la metaloj venas de

ŝtonoj, de la mineraloj kaj tiam ni povas konservi la jam konatan vorton: *eneolito*.

Ni povas dividi la Eneoliton en du periodojn: La *bronza epoko* kaj la *fera epoko*. La bronza epoko siavice dividiĝas en du subepokojn: la *kupra epoko* kaj la *epoko de kupro miksitaj kun stano* (t. e. *bronzo*).

La epokoj, kiujn ni menciis, ne povas esti ekzakte limigitaj, la progreso de unu al la alia estas malrapida kaj la limoj ne estas klaraj. Krome, la epokoj ne komenciĝas en ĉiuj partoj de la Tero en la sama tempo. Ni nur konsideru la plej lastan, la plej gravan epokon kaj ni diru:

En Kaldeujo kaj en Egiptujo la Eneolito komenciĝis dum la 6^a jarmilo antaŭ Kristo; en Grekujo kaj en Ĉinujo ĝi datas de la XXV.^a jarcento a.K.; en Skandinavujo de la XX.^a j.c. a.K.; En Finnlando de la III.^a j.c. a.K.; en Australio kaj Afriko tiu ĉi periodo komenciĝis nur antaŭ kelkaj jaroj; ĉe kelkaj popoloj ĝi tute ne ankoraŭ komenciĝis. (Afriko, Oceanio).

La civilizacio eliris el la Sudo (Egiptujo) kaj marŝis norden. Sed ni ne devas forgesi, ke samtempe kun la Eŭropa civilizacio floris alia ne malpli granda civilizacio en Ĉinujo sed kiu, atinginte certan nivelon, ne plu evoluis dum jarmiloj. La kaŭzo de tiu ĉi estas la izoleco. Ne nur la Ĉinoj mem izolis sin volonte per la granda ĉina muro, kiu servis kontraŭ la invadoj de la mongoloj sed la naturo mem izolis la ĉinan imperion per maroj kaj dezertoj. *Neniu popolo izola povas evolui en la mondo.*

La historia periodo. Kiel ni jam diris, tiu ĉi periodo komenciĝas per la unuaj skribaj dokumentoj. La invento de la skribado sole ebligis la veran grandstilan progreson de la homaro. Per la skribado la spertoj de la generacioj flksiĝas kaj la estontaj generacioj alproprigas al si la spertojn de la antaŭuloj per la *lernado*. Ni ellernas dank' al la modestaj literoj, la spertojn de la tuta homaro.

La unuaj skribaj dokumentoj datas de 4 ĝis 5 mil jaroj antaŭ Kristo. Ili devenas de Kaldeujo kaj de Egiptujo. En Ĉinujo la unuaj skribaj dokumentoj datas de 2 mil jaroj a.K., en Ameriko ĝepost nur 1492 post Kristo kaj en Afriko nur ĝepost 60 jaroj. Ni ree vidas, kiom la homa evoluo estas malsama en la diversaj partoj de la Tero!

Ni jam menciis en la pasinta leciono, ke la homoj ne vivas aparte, sed en socioj. Ni nun ekzameni do la evoluon de la socioj. Oni ĝenerale distingas inter *agrikulturaj* kaj *nomadaj popoloj*. La nomadoj vivtenas sin per ĉasado kaj per paŝtado de bestaroj kaj la agronomoj vivtenas sin per agrikulturo kaj bestbredado. La primitiva formo de la homa ekonomio estas la nomadismo kaj la dua

evoluo estas la agrikulturo. Sed ni devas menciigi kelkajn esceptojn, kiel ekzemple en norda Afriko, kie la malriĉiĝintaj nomadoj estas devigataj vendi siajn bestojn kaj dungiti sin en farmoj.

La nomadoj posedas tre simplan industrion de instrumentoj kaj ili fabrikas nur laktajn produktojn kaj felojn. La agrikulturistoj pri-laboras la teron per feraj stangoj en la komenco, per plugiloj poste. La sklavoj estas anstataŭigataj per dombestoj nur en la relative lasta tempo, ĉar la antikvaj homoj ne sciis, kiel jungi la bestojn al la plugiloj. La *geniulo*, kiu inventis tiun ĉi jungmanieron hodiaŭ ankoraŭ ĝenerale uzatan, estis la bonfaranto de milionoj da homoj... La agrikulturaj popoloj kreis la arkitekturon: la nomadoj kontentiĝis kun tendoj. La artaj palacoj evoluis el la primitivaj ŝtonaj domoj de la prauloj. Nomadoj kaj agrikulturistoj ofte interŝanĝadis siajn produktojn kaj posedaĵojn. Tiamaniere evoluis la *komerco*. Komence ekzistis nur senpera interŝanĝo de objektoj, poste oni eltrovis la *monon*, kiu sole ebligas la hodiaŭan potencon *ekonomian riron*.

Kaj nun ni havas ĉiujn necesajn konojn por la kompreno de la historio, kiun ni komencos en la proksima leciono. Mi nur menciis la plej necesajn elementojn, kiujn ĉiu inteligenta homo devas scii. Tial mi rekomendas en via propra intereso bone enĉizi en vian kapon la aŭditajn aferojn.

Rimarkoj por la instruantoj: Tiu ĉi lekcio estas intence farita malpli longa ol la alia por ebligi demandojn kaj diktadon de resumo. Oni ne iru pli antaŭen, ĝis tiu ĉi fundamenta parto estas perfekte komprenata de la lernantoj. Nur sur fortan bazon oni povas altenlevi longedaŭran konstruaĵon!

Kelkaj notoj.

Post la ĝeneralaj pritraktoj nepre necesas pripensi, kio devas esti la materio de la humanista historio. Mi povas respondi, ke ĉio, kio influis la homan progreson. Sed la materio tiamaniere estus multe pli vasta ol la programo de nia lerneja historio-instruado povus permesi. Estas evidente, ke ni devas fari elekton. Ni devas do elekti la plej gravajn aferojn kaj ni devas grupigi ilin. Je tiu ĉi grado de historio-instruado, la lernantoj havas ankoraŭ nur malmultajn aŭ eble neniamajn konojn pri la ĝenerala historio. Estas do konsilinde dediĉi unu aŭ du lecionojn al la skizo de la ĝenerala historio de la grandaj kulturoj. Oni klarigos, ke ni dividas la homan historion en *antikva*, *meza* kaj *nova* epokoj kaj oni karakterizos la unuopajn epokojn. Sed ĉar ni konsideras la humanistan historion kiel la unuan ŝtupon de historia instruado, ni ne devas pasigi tie ĉi multe da tempo kun aferoj,

kiujn la lernantoj poste pli bone ekkonos. La tempo dediĉita por nia fako estas tro kara, ni profitu el ĝi.

La unua afero, pri kiu ni devas paroli kaj kiu tre interesas ia lernantojn, estas la historio de la ekkono de la Terglobo. Tia studo estas tre utila kaj estas sendube sekvata kun grandaj intereso kaj atentemo. Du, eĉ tri lecionoj povas esti dediĉitaj al tiu ĉi temo. Bedaŭrinde mankas al mi la tempo kaj la loko tie ĉi por ellabori tiun ĉi grupon de la materio. Ĝi estas sufiĉe konata materio kaj ĉiu bona instruisto povas ĝin prezenti al siaj lernantoj.

La vera objekto de la humanista historio estas la skizo de la progresoj sur scienca kaj sur teknika kampoj. *Tia instruado ĝis nun okazas en nenia lernejo.* En la moderna instruado de la estonta lernejo, *tia instruado estos vaste praktikata.* La metodoj aplikotaj en tiu ĉi fako estas ne ankoraŭ konataj. Oni ĝenerale pezas, ke la materio estas tro giganta por esti resumata por infanoj. Tio estas granda eraro. Ĉiu historia materio estas giganta. Ni ne bezonas esti science ekzaktaj, ni ne devas paroli pri ĉio: sufiĉas, ke ni donu al niaj lernantoj *harmonian trarigardon* pri la tuta evoluo.

La unua lekcio pri la evoluo de la homaj scienco kaj tekniko devas kompreneble temi pri la komencoj. Tiu ĉi materio estas speciale nekonata kaj ne instruata. Tial mi pritraktos ĝin kun granda zorgo kaj iom pli detale. Ni nepre devas komprenigi al niaj lernantoj, ke la plej simplaj unuaj eltrovoj estas pli gravaj, pli utilaj kaj ofte pli *geniaj* ol la grandaj modernaj eltrovoj. Ni ankaŭ devas komprenigi la diferencon inter *eltrovo* kaj *invento*: Kolumbo eltrovis Amerikon (pli bone *ekkonis, malkovris*), Roentgen *inventis* la radiojn X.

(3.^a Lekcio)

La ekkono de la naturfortoj

En la malluma nokto de la prahistoria vivo, la malfortaj homoj estis kruele subpremataj kaj ofte eksterminataj de la fortuloj. La unuaj socioj estis konstruataj sur la maljustecon, sur la brutan forton. Per la forto de la pugno kaj de la armiloj, kelkaj homaj grupoj subpremis aliajn kaj laborigis ilin kiel sklavojn. La malfortaj homoj defendis sin kiel ili povis. La ruzeco, la venĝemeco, ne estas belaj karakteroj, sed ili estas pardoneblaj kontraŭ la maljusta forto. La unuaj inventoj, la unuaj eltrovoj estas verŝajne la verko de tiuj subpremitaj homoj, kiuj tiamaniere volis liberiĝi de la malsaĝaj sed fortaj subpremantoj. La sama forto cetere laboris

en la homaj cerboj kontraŭ la fortaj bestoj kaj kontraŭ la naturo mem. *La homa evoluo estas verko de la malfortuloj.* Kio restis el la armeoj de subpremantoj tra la jarmiloj? La polvo de la iamaj fortuloj, fieraj kaj vantaj sinjoroj, estas jam dissendita per la ventoj de kvin kontineutoj, dum la eltrovoj de la malfortaj sklavo vivas eterne en la civilizacio. La unuaj scienculoj men estis tiuj, kiuj estante malfortaj laŭ siaj muskoloj, devis perlabori sian vivon per la potenco de la menso. Verdire la historio de la homaro sen la eltrovoj de la malfortuloj estus simpla serio de interbuĉadoj. La scienculoj kaj la artistoj beligas solaj la homan historion.

Granda naturscienculo Darwin observis la samajn karakterojn kiujn ni nun menciis sur la homoj, sur la bestoj. Li nomas tion *sinaplika kapablo*. La besto unue luktas per sia fizika forto kontraŭ la naturo kaj kontraŭ la kontraŭuloj. Se tio ne sukcesas, ĝi *sin adaptas* al la ĉirkaŭaĵo: kelkaj bestoj prenas la koloron de la folioj, por ne esti vidataj de la birdoj, kelkaj papilioj aspektas kiel aliaj papilioj malŝatataj de la birdoj, la kato kurbigas sian dorson por timigi la hundon, la meleagro disjetas siajn plumojn por kredigi al aliaj bestoj aŭ homo, ke ĝi estas pli granda, ktp. La sama sinadapta forto aŭ pli bone instinkto ekzistas en la homo kaj ĝi estas unu el la kreantaj faktoroj de la homa civilizacio.

Kie komenciĝis nia civilizacio? La scienculoj kredas, ke la unuaj grandaj eltrovoj aŭ pli ĝuste inventoj okazis en tropikaj aŭ almenaŭ en varmaj landoj. Ĉar ni devas rimarki, ke la unuaj inventoj, kiuj ŝajnas al ni hodiaŭ la plej simplaj, estas la plej *geniaj*. Tiamaniere la invento de la fajro estas *epokfaranta* en la homa civilizacio. Kiamaniere la homo inventis la estigon de la fajro? La prahomo vidis la fajron de la arbo, bruligita de fulmo kaj alirante al la natura fajro, li prenis pecon de la brulanta arbo. La familianoj gardis poste la flamon kaj nutris ĝin. Fajro estis tiutempe granda trezoro ĉar oni pli frue uzis la fajron ol oni sciis, kiamaniere ĝi povas esti farata!

Ekzistas tre simpla maniero por estiĝi fajron: oni nur devas kunfroti sufiĉe longe du pecojn da bambuo (tropika arbo). Estas tute verŝajne, ke tiamaniere la indiĝenoj de Afriko kaj de Ameriko estas la unuaj inventistoj de la fajro-estiĝo.

La unuaj homaj domoj estis ankaŭ konstruitaj inter la altaj arboj de tropikaj arbaregoj. La materialo de la domkonstruado estis la molaj branĉoj de la arboj. Baldaŭ evoluigis tiamaniere la unua metio, tiu de la *teksado de la branĉoj*. La sama prahomo konis la fabrikadon de *lignaj lancoj*, per kiuj li ĉasis kaj li havis jam *lignajn tranĉilojn* per kiuj li distranĉis la mortigitajn bestojn. La viando iom poste estis kuirita per fajro. La inventoj de la *sago* kaj de la *pafarko* estas ankaŭ tre tre malnovaj.

Ĉi ĉiuj eltrovoj estas tiom malnovaj, ke oni havas nenian historian fakton pri ili. Ili estas ankaŭ tiom necesaj, ke ni ne devas plue insisti pri la utileco. Sed antaŭ ol daŭrigi la historion de la inventoj, ni ekhaltu momente en nia studo kaj ni respondu la interesan demandon: *kiamaniere la homo ekkonis la fortojn de la naturo?*

La prahomo jam vidis, ke la pomo falas de la arbo kaj ĉiuj homoj vidis la saman fenomenon. Newton, le fondinto de la fiziko, estis la unua homo, kiu demandis, kial la pomo falas de la arbo? La falo de la korpoj ŝajnis jam al la prahomo simplega fenomeno, natura afero, kiu ne bezonas plian klarigon. Devis veni genia scienculo por klarigi tiun ĉi simplan fenomenon. El ĉi ĉio rezultas, ke eĉ la plej simplaj naturaj fenomenoj estas en si mem komplikaj. La vojo, kiun la homaro transiris en la ekkono de la naturfortoj estas senfina linio kaj ni staras en iu punkto de tiu ĉi linio. Malantaŭ ni troviĝas-konsiderinda parto de tiuĉi rekto sed antaŭ ni troviĝas la infinito, ĉar la homa progreso ne konas limojn. Depost la pratempoj la homo observas la naturon. Per granda pacienco ĝi ekkonis la fenomenojn de la naturo, imitis ilin en la laboratorioj, ekkonis la leĝojn, kiuj regas la naturajn fortojn kaj per genia lerteco, la homo sukcesis jungi la fortojn de la naturo kiuj hodiaŭ laboras anstataŭ ni. Ni esperas, ke en la estonto la laborigo de la naturaj fortoj anstataŭ la homaj muskoloj fariĝos ĉiam pli kaj pli ĝenerala kaj ke la homaro tiamaniere disponos je pli da libera tempo por la evoluigado de la *kulturo*. Ĉar ni devas scii, ke la civilizacio ne estas la kulturo:

jen estas du gravegaj defnicioj, kiujn ni neniam forgesu:

kulturo estas spirita afero: arto, religio, filozofio, kantoj, mo-
roj, ktp. formas la kulturon

civilizacio estas la eterna penado de la homo ekkoni kaj labori-
gi la fortojn de la naturo.

La *scienco* estas la regiono de la kulturo kaj la *tekniko* estas la regiono de la civilizacio. La civilizacio permesas al la homoj dediĉi sian tempon al kulturaj aferoj, sed la kulturo siavice evoluigas la sciencan. Sed ni ne devas forgesi, ke la tekniko evoluas ĝuste per la rezultatoj de la scienco. Ni vidas do, ke en la realeco la kulturo kaj civilizacio estas unu harmonia tutaĵo, sed la unua ŝtupo estas tamen la civilizacio. En tiu ĉi jarono okupiĝos pri la homa civilizado. Pri la kulturo diversaj aliaj fakoj vin instruos sed *por kompreni la kulturon, oni nepre devas unue kompreni la civilizacion.*

Ni vane serĉas, kiu popolo ekkonis la *unuan fojon* kelkajn le-
ĝojn de la naturo. Ni ankaŭ ne scias, kiu popolo aŭ homa grupo faris la unuajn grandajn inventojn, pri kiuj ni tuj parolos. Sed tiu ĉi afero ne estas grava: ĉiuj inventoj, kiujn la homaro faris

antaŭ kaj post la eltrovo de la skribado, apartenas hodiaŭ al la komunaj trezoroj de la tuta homa gento.

Platon kaj *Aristoto* estis la unuaj du grandaj grekaj filozofoj, kiu resumis en siaj verkoj la tutan konon de la tiutempa homaro. Tiu ĉi kono estas verdire la rezultato de ĉiuj konoj de la homaro, kiuj transmetiĝis de generacio al generacio, unue per buŝaj paroloj poste per skribado. Ni scias el tiuj ĉi filozofaj verkoj, ke en la epoko de *Platon* kaj *Aristoto* la fiziko kaj la kemio estis jam sufiĉe progresintaj kaj la konoj de la greka homaro estis jam tre konsiderindaj. La popoloj antaŭ la grekoj jam konis multon el la fiziko kaj el la kemio kaj la unua kulturita lando, kiun ni konas el la historio estas *Egiptujo*. De la prahomo ĝis la imperio de la faraonoj estas nenia skriba monumento. Ni ne povas sekvi la progreson deĉst la origino ĝis la stato de la egipta civilizacio. Ni devas do kontentiĝi skizante la civilizacion de la Egiptanoj.

Egiptujo. Egiptujo estas la lando de la Nilo. Tiu ĉi riverego elverŝas siajn akvojn dufoje en la jaro kaj fekundigas la sablodezerton kiu etendiĝas oriente kaj okcidente de la Nilo. Tiu ĉi lando estis speciala taŭga por la evoluo de la homaj konoj. Se la superakvo de la Nilo ne estis sufiĉa, la popolo mortis pro malsato kaj se ĝi estis troa, la popolo multe suferis pro la detruoj de la akvo. Oni baldaŭ vidis, ke konstruado de cisternoj kaj kanaloj estas necesa. Sed tia laboro devas esti kolektiva, farata sub centra komando kaj per la partopreno de la tuta popolo. Jen estas la kaŭzo de la elformiĝo de la potenca Egiptujo sub la ceptro de la faraono. La faraonoj konstruigis per siaj sennombraj sklavoj kanalojn, digojn, cisternojn kaj la piramidoj, kiuj estas la tomboj de la faraonoj, ĝis niaj tagoj elokvente parolas al ni pri la unua homa civilizacio. La konoj de la Egiptanoj ne ankoraŭ estis kompreneble sistemaj, sed ili estis jam tre vastaj. En la potenca imperio estis vera kultura vivo. Se la sociaj kondiĉoj estis ankoraŭ tre maljustaj, la artoj kaj la teknikoj jam komencis plibonigi la homan vivon.

Por kompreni la signifon de la Egiptaj piramidoj, ni devas menci, ke la modernaj inĝenieroj de arkitekturo konsideras ilin kiel majstroverkojn. Ekzemple ni prenu la piramidon de Kheops: ĝiaj kvar flankoj montras tute ekzakte la kvar direktojn de la mondo. La bazo de la piramido, sur kiu alten levigas la tuta giganta monumento, estas farata el granitaj ŝtonoj kaj la nivelo de la bazo estas tiel ekzakte horizontale, ke la hodiaŭaj inĝenieroj sin demandas, kiajn bonegajn metodojn la Egiptanoj konis por determini la horizontalan direkton, por konstrui tiel ekzaktan kaj solidan monumenton?!

Sed pli grava ol la monumentoj estas la teknikaj konoj de Egiptaj metiistoj kaj kuracistoj. Multaj el la Egiptaj eltrovaĵoj perdi-

ĝis, ĉar la profesiuloj konsideris siajn konojn kiel sekretojn. Tiamaniere ni ne konas la kunmetadon de la balzamoj, per kiuj ili preparis siajn «mumiojn» kaj nek tiun de la koloroj (farboj) per kiuj ili pentris siajn monumentojn, kiuj ĝis niaj tagoj ne perdis sian koloron, en kelkaj lokoj. Ankaŭ ni ne konas—ĉar neniu teknika desegnaĵo restis—kiajn ĝigantajn levilojn la Egiptanoj havis por konstruo de siaj piramidoj kaj aliaj palacoj kaj monumentoj. El la grandeco de la faritaj laboroj ni tamen povas konkludi al la vasteco de iliaj teknikaj konoj.

Ni vidu nun tion, kion ni konas, post kiam ni vidis tion, kio perdiĝis kaj kion ni nur povas diveni! Kio koncernas la ekzaktajn sciencojn kaj speciale la matematikon, ni scias, ke la Egiptanoj konis jam 3000 jarojn antaŭ Kristo la ciferon «pi» (greka) kiu servas ĝis niaj tagoj al la determino de la periferio kaj de la areo de la cirklo kaj al multaj aliaj kalkuloj. La matematiko de nia kulturo ekkonis tiun ĉi ciferon nur en la XVI. a jarcento post Kristo! Entute la Egiptanoj havis multajn matematikajn konojn. Efektive iliaj geometroj ĉiujare devis mezuri la terojn ĉar la superakvoj ofte reniĝis la limojn de la unuopaj terposedaĵoj kaj terenoj. *Eŭklido*, la granda greka geometro formis el iliaj kalkuloj la harmonian tutaĵon de la geometrio, kion vi nuntempe lernas.

Estas eble nekredibla sed tamen scienca fakto, ke la Egiptanoj jam konis la atmosferan elektron: jam en la XV. a jarcento antaŭ Kristo la Egiptaj monumentoj estis muntitaj de fulmoforigiloj. La Egiptanoj jam sciis, ke la metaloj estas la plej bonaj elektraj kondukiloj. Oni estas tute konsternita, se oni pripensas, ĝis kiu grado la homaro forĝis la konojn de la Egiptanoj: efektive, tiuj konoj estis longan tempon forĝesitaj. Post la falo de la Egipta imperio la mondo eĉ forĝis legi la Egiptajn paperusojn. Antaŭ ol nia moderna epoko ree trovis la ŝlosilon de la egiptaj hieroglifoj, niaj scienculoj ankaŭ ree inventis la mirindajn eltrovojn de la malproksimaj Egiptanoj!

Por fini nian hodiaŭan lekcion, ni nur menciu ankoraŭ, ke la Egiptanoj jam konis la fabrikadon de la *vitro* kaj tiun de la paperuso aŭ *pergamento*. En tomboj de faraonoj oni retrovis kolorajn vitrojn datantaj de pli ol 4000 jaroj. La Egiptanoj havis jam ĉiuspecajn botelojn el vitro, en kiuj ili metis medikamentojn, alkoholaĵojn, trinkaĵojn, tualetaĵojn, artiklojn por la virinoj, k.a. La *keramiko* evoluis pli ol X jarcentojn a.k. La Egiptanoj jam fabrikis brikojn, ĉar en la Biblio ni legas, ke ili devigis la judojn fabrikii brikojn por la konstruaĵoj de la faraonoj. Speciale grava estas la fakto, ke la Egiptanoj lerte fabrikis la paperuson el la kreskaĵo «paperuso». Ili tiel lerte kunĝuis la foliojn de tiu ĉi kreskaĵo ke la ruĵaĵoj de paperuso ofte atingas eĉ 20 metran longecon. La metodo,

kiun ili aplikis por tiu ĉi industrio estas hodiaŭ ne ankoraŭ konata. Ĝis la nova epoko la egipta paperuso estis la plej bona papero. La Egiptanoj notis siajn konojn kaj historion sur rulaĵojn faritajn el paperuso. Ĉio, kion ni scias pri la Egiptanoj estis deĉifrita de tiuj ĉi paperusoj, kiujn oni nur antaŭ nelonge sukcesis kompreni. Ni scias ankoraŭ, ke la Egiptanoj estis mallertaj en la metalurgio; ili interŝanĝis siajn metalaĵojn kun la eksterlando. Kontraŭe la Egiptanoj estis tre lertaj en la teksado; iliaj virinoj portis bone teksitajn kaj arte tinkturitajn vestaĵojn.

Ni vidas do, ke la Egipta civilizacio estis jam tute evoluita. Bedaŭrinde la historio ne konas la antaŭ Egiptajn eltrovojn kaj inventojn. Sed tamen ni povas diri, kio estas la bazo mem de ĉiu teknika progreso. Pri tiuj ĉi aferoj ni reparolos en la proksima lekcio.

Noto por instruantoj: Tiu ĉi lekcio pri la Egiptanoj estas iom longa. Oni ja povas forlasi kelkajn aferojn, se tempo mankas. Sed laŭbezone oni ankaŭ povas aldoni, ĉar la Egipta kulturo estas tiel vasta, ke temo ne mankas tie ĉi. Oni konsultu tiurilate la konatajn verkojn de Egiptologio. Mi intence montris antaŭe la florantaj civilizacion kaj nur poste, en la sekvanta linio la fundamentajn eltrovojn, kiuj estas la bazo mem de ĉiu posta progreso. Oni rimarku, ke mi aplikas la induktivan metodon de la natursciencoj al la historio: antaŭ ol dedukti leĝon, mi montras la faktojn. Oni ankaŭ rimarku, ke ĉie mi nomas la fontojn de la historiaj scioj kaj ke mi severe diferencigas inter historia kaj antaŭhistoria konoj kaj faktoj.

(Daŭros).

Josefo MAJOR.

XIV. ^aj Internaciaj Floraj Ludoj

JUGANTARO: Jen la listo de la elektitaj membroj por la Jugantaro de la XIV^aj. Internaciaj Floraj Ludoj. Pastro JOAN FONT GIRALT el Girona—Prezidanto; S-ro JOAN GILI NORTA el Barcelona—SEKRETARIO; Membroj: S-ro S. ALBERICH JOFRE el Barcelona; JAN VAN SCHOOOR el Antwerpeno (Belgujo); S-ro H. J. BULTHUIS el Hago (Nederlando); S-ro ED. JUNG el Strasburgo (Francujo).

N.^o VIII.—Premio de Esperantista Grupo «Barcelona Stelo»: 50 ptoj. Libervola Temo.

N.^o IX.—Premio de S-ro JOAN GILI NORTA: 50 ptoj. Libervola Temo.

Pliaj premioj kaj temoj estas anoncituraj kaj sekvos en venontaj numeroj de nia Gazeto.

VERKOJ RICEVITAJ (ĝis la 1.^a de marto): UNUA LISTO.

1—Pri junaj kaj maljunaj virinetoj—devizo: Tiele parolis Zaratuŝtra; 2—La prokrastita ekzekuto—Devizo: Malnova ideo—en nova originala vesto; 3—Koro de patrineto—Devizo: Per nur dek du linietoj; 4—Jida gramatiko kaj reformo de jida lingvo, devizo: Dokumento por la Esperantistaro; 5—Apud la Algadins'a abruptaĵo, devizo: Amo, Amo, Amo.; 6—Apud l'Algadins'a abruptaĵo, devizo: Lumo; 7—Al bela esperantistino, devizo: Progreso; 8—Defendo de la nescio, devizo: Nescio; 9—Puccini, devizo: Puccini.

JOAN GILI NORTA, *Sekretario.*

Homo, kaptu, la feliĉon...

Homo, kaptu la feliĉon,
Se ĝi estas apud vi,
Ne serĉadu aliloke
Efemera estas ĝi.

Homo, kaptu la feliĉon,
Vivo estas kiel flor'.
Vi, mallonge sur la tero
Flegu ĝin en via kor'.

Homo, kaptu la feliĉon,
Estu, saĝa, sciu vi
Se vi restas malatenta
Tiam hom', forflugos ĝi.

Catharina J. ROSKES' DIRKSEN.

Premiita en la XIII^aj Internaciaj Floraj Ludoj.

Bibliografio

SAKUNTALA, rakonto el malnova Hindujo laŭ la konata dramo de fama hinda poeto Kalidasa. 4.^a kajero de «ILUSTRITA BIBLIOTEKO» eldonita de «HEROLDO DE ESPERANTO» Horrembei Koln (Germanujo) 1927.

Kiel diras la antaŭparolo de la *Postrakontinto*, la verketo «ne estas traduko de la dramo mem, ser nur postrakonto, farita laŭ la dramo, por konatigi kun ĝi la esperantistaron. Trideknaŭ paĝoj da interesa legado, montras la talenton de la hinda poeto, vivinta

en la sesa jarcento post J. K. La teksto bone fluas kaj la scenoj revivigas la antikvan hindan vivadon de la geasketoj, reĝoj kaj iliajn travivaĵojn. Ni ne dubas rekomendi ĝin al literaturamantoj, ĉar ĝi estas bona specimeno de la antikva literaturo kaj ankaŭ leginda el gramatika vidpunkto. Kiel la ceteraj kajeroj de la «ILUSTRITA BIBLIOTEKO» enhavas titolbildo de F. Dücker kaj estas ilustrita de Ilse Hofmann.—*Kodo*.

MIL KAJ UNU NOKTOJ.—«Ilustrita biblioteko» n.º 5.^a Jen broŝuro enhavanta tri rakontojn el la mondfama araba verko, Ili estas: «Serazado», «Tadmora, la reĝino de la dezerto» aŭ «La karavano al la kupra urbo» kaj «Abul Hasan Alhali, la ŝercfripono». La unua estas kvazaŭ antaŭparolo kaj la aliaj estas du nemulte konataj rakontoj. Entute 31 paĝoj tre agrablaj por legado en la familia rondo aŭ en amuzvespero. «Tadmora, la reĝino de la dezerto» estas unu el tiuj terurantaj, fabelaj rakontoj, kaj la alia, «Abul Hasan Alhali» estas ridiga, ŝerca. La eldonejo eble en sekvantaj volumetoj aperigos aliajn pli konatajn rakontojn el «Milkaj unu noktoj» kiel «Aladin kaj la Mirakla Lampo». «Ali-Baba kaj la kvardek rabistoj», «La serĉa ĉevalo» kaj «Sinbad la maristo». Ni estas certaj ke se ĝi tion faros, la esperantistaro estos al ĝi dankema, ĉar tiuj rakontoj naivaj, preskaŭ infanaj, estas indaj konatiĝadi kun la tuta internacia publiko. La teksto bona, la ilustraĵoj agrablaj kaj konvenaj.—*Kodo*.

HISTORIO DE SAIDJAH KAJ ADINDA KAJ ALIAJ VERKETOJ de Multatuli.—El la holanda lingvo tradukis Liem Tjong Hie. Eldono de la tradukinto en Samarang (Java). 60 pĝ. Prezo: bindita 1,75 sv. frankoj.

Verketo kiu enhavas pli da belajo ol la unua aspekto de la libro promesas; precipe la ĉefa rakonto kiu donas la nom al la libro estas tre leginda kaj emociiga romantikaĵo. Pli bela kaj pensiga ankoraŭ estas, laŭ mia gusto, kompreneble, la dua rakonto: Alparolo al la estroj de Lebak. En la tuta verko oni konstatas la respekton kontraŭ la indiĝenoj kiu flamigis la aŭtoron kaj kiu devigis lin ekŝiĝi el sia kolonia posteno, kiel la antaŭparolo konigas al ni. Ĉu esperantisto povus ne simpatii kun tiuj ĉarmaj karakteroj indiĝenaj? Kiel prave kaj korsiĝe sonas tiu frazo de la aŭtoro: Tiu javano estas *homo*, leganto!

Bedaŭrinde mankas en la libro la supersignitaj literoj, kio kaŭzas ĉe la komenco de la legado iom da malfacilaĵo, kiu ja ne daŭras longe. Ofte, tre ofte, mi renkontis erarojn en la ĝusta uzo de la posesivaj pronomoj. Malgraŭ tiuj makuletoj kiuj povas facile

esti korektitaj en nova eldono, la verko donas efektivan plezuron. M. S.

LITERATURA INFORMILO de la Esperanto-Fako ĉe la eldonejo Hirt & Sohn en Leipzig. C 1, Salomonstrasse 15.

Ĝi enhavas tre interesan artikolon de S-ro H. Hohlov okaze de la 40^a jubileo de nia lingvo, la statutojn de la Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko kaj katalogon de la eldonaĵoj de la fama librofirmao.

ILUSTRITAJ RAKONTETOJ.—Originale verkis A. Kenngott. A. M. Eldonis la Belga Esperanto Instituto Kleine Hondstraat 11, rue du Petit Chien. Antverpeno (Belgujo). Paĝoj 48. Prezo: 1,25 sv. frankoj.

Ĝi estas kolekto de 18 rakontetoj pri simplaj temoj, kun ilustraĵoj, kiuj povas tre bone taŭgi por la lernantoj de esperanto. La rakontoj estas plej diversaj tiamaniere ili metas antaŭ la lernanto grandan nombron da vortoj kaj krome ĉiun rakonteton sekvas demandaro. Tre bona kaj praktika ekzercaro por progresigi la buŝan uzadon de la lingvo. M. S.

ENKONDUKILO en la fundamentajn regulojn de la mondlingvo Esperanto.—Eldonis Esperanto-Junularo, A. Neupert, Wedellstr. 17, Leipzig N 23, Germanujo. Prezo por 2 ekz 1 resp. kup., 10 ekz. 4 resp. kup., 50 ekz. 16 resp. kup. Paĝoj 23.

En malgranda broŝureto troviĝas la tuta gramatiko de Esperanto. Taŭga libreto por propagando kaj por lernado.

INTERNACIA DIALOGARO.—Diverslandaj aŭtoroj. Eldonis Belga Esperanto Instituto Kleine Hondstraat, 11, Rue du Petit Chien, Antverpeno, Belgujo, Paĝoj 59. Prezo 1,25 sv. frankoj.

Tio estas ankaŭ tre bona ekzercaro por la praktikado de la lingvo. La teksto estas tre korekta kaj la stilo tre internacia, ĉar oni komisiis al diverslandaj esperantistoj la redaktadon de la diversaj dialogoj. Multe da vortoj kaj precipe da bonaj frazoj povas estis facile lernataj per la trastudado de tiu ĉi verketo, kiun prave oni povas rekomendi al la instruistoj de esperanto. M. S.

Pri la Movado

Barcelona.—En Centre Cultural Vinarocenc (Abaixadors, 10 pral.) ĵus fondiĝis nova grupo dank'al nia senlaca kamarado S-ro Chaler, kiu ankaŭ malfermis tie kurson por siaj samurbanoj. Tiu okazas ĉiusabate de la 10.^a ĝis 12.^a vespere kaj multaj lernantoj in-

tencas veturi al nia kongreso en Vinaroç. Ni kore salutas la novan grupon.

Rubi.—La kursoj daŭras kun sukceso: 18 fraŭlinoj kaj 25 sinjoroj lernas la lingvon.

Terrassa.—Kursoj daŭras kun sukceso en tiu urbo. Oni intencas eldoni ĉiudumonatan bultenon por propagando.

Alcanar.—Nia kunkomitatano S-ro Chaler vizitis tiun mirindan urbeton kaj faris en ĝi propagandon pri Esperanto kaj nia venonta kongreso. Poetino F-ino Fina Mar kaj literaturisto S-ro Valls interesigis pri nia afero kaj promesis lerni nian lingvon.

Vinaroç.—La 13.^a de Januaro, delegite de la Komitato de K. E. F., nia amiko S-ro Chaler veturis al la urbo de nia kongreso por helpi la aranĝon de tiu esperantista festo. Okazis kunveno en la urbodomo de prezidantoj de la diversaj societoj de la urbo por elekti la lokan komitaton de la kongreso. Du urbkonsilantoj estas elektitaj en tiun komitaton. En la urbo granda intereso vekigis por nia afero. Lokaj ĵurnaloj ĉiusemajne raportas pri Esperanto.

Oni organizis paroladon en Centro Republicano kaj tuj poste kurson kun 30 lernantoj.

Benicarló.—Tio estas najbara urbo al Vinaroç. Iamaj lernantoj de Valenciaj pioniroj Ayza kaj Jimenez Loira estas pretaj repreni la lernadon.

Tarragona.—La movado ne ĉesis en tiu urbo. Samideanoj Obiol kaj Garcia Lorente revivigas la grupon.

Nekrologio.—Kun granda ĉagreno ni informiĝis pri la morto de nia maljuna samideano S-ro JOSEP MAYMI SABATE el Girona, la simpatia onklo de nia senlaca amikino Carme Maymí. Li partoprenis diversajn federaciajn kongresojn elpruvinte sian simpatian por nia afero.

Al lia maĝojigita familio kaj speciale al F-ino Carme Maymí ni esprimas nian plej sinceran kondolencon.

Ankaŭ ni ĵus estas informitaj pri la morto de nia kunfederaciano S-ro Marian VILARDELL en Manlleu; en Terrassa mortis ankaŭ la patrino de nia samideano S-ro A. VERGES kaj la edzino ĉe S-ro Viçens BUFI.

Al ĉiuj nian plej sinceran kaj amikan kondolencon.

La Redakcio.

Estatuts de la Federació Catalana d'Esperantistes

Article primer.—Amb el nom de «Federació Catalana d'Esperantistes» hom constitueix una federació d'esperantistes en terres de llengua catalana.

Art. segon.—L'objecte de la «F. C. d'E.» és la unió de tots els esperantistes en terres de llengua catalana per a la divulgació i propaganda de l'Esperanto, pels fins de la representació aconsellada en la reunió general del V Congrés Internacional d'Esperanto celebrat a Barcelona, per a complimentar tots els acords i resolucions, que afecten als esperantistes com a col·lectivitat, emanats dels Congressos Internacionals o dels nuclis directores de la llengua del Dr. Zamenhof.

Art. tercer.—Per a el millor compliment de l'article anterior, la «F. C. d'E.» publicarà una revista, l'organització de la qual serà determinada per un reglament especial interior publicat pel cos de redacció i prèvia acceptació del Comitè Directiu. El preu de l'abonament a la revista serà de sis pessetes anyals.

Art. quart.—La «F. C. d'E.» constarà de membres associats i de membres isolats; els primers seran federats per mitjà de l'entitat a la qual pertanyin i els altres directament i en caràcter particular.

Els diversos organismes pertanyents a la «F. C. d'E.» contribuiran el seu sosteniment amb la quota trimestral, pagada a la bestreta, de 0'40 ptes. almenys per cada soci i els individuals amb una quota mínima de 3'50 ptes. anuals, pagada a la bestreta.

Art. quint.—La «F. C. d'E.» serà regida per un Comitè Directiu, renovable cada any, compost de President, Vice-president, Secretari, Vice-secretari, Comptador, Caixer, Administrador i quatre Vocals.

Art. sisè.—El Comitè de la «F. C. d'E.» convocarà almenys una vegada a l'any, en diferents localitats, durant la primavera i en dia festiu, tots els federats, en Assemblea o Congrés general, en el qual, prèvia ordre del dia hom donarà compte als assistents dels treballs i gestions acomplerts pel referit Comitè Directiu durant el seu exercici, hom acordarà el lloc on deurà celebrar-se el vinent Congrés o Assemblea, hom nomenarà els individus que deurán constituir el Comitè el pròxim exercici, i hom discutirà les proposicions que hagin estat presentades abans de la sortida del número de la revista anunciant el Congrés o Assemblea, i anunciades en l'ordre del dia.

Art. setè.—El Comitè serà facultat per a crear les seccions que cregui més convenients per a la prosperitat de la «F. C. d'E.» i de l'Esperanto, les juntes de les quals seran renovades per cada Comitè de bell nou elegit.

Serà president nat de cada secció un individu del Comitè designat pel mateix.

Art. vuitè.—Tots els esperantistes pertanyents a organitzacions federades tindran veu i vot en les Assemblees anuals, però el seu vot serà delegable al president d'un grup o una altra persona qualificada, prèvia la presentació dels corresponents carnets de soci.

Art. novè.—Tots els acords de les Assemblees o Congressos seran presos per majoria absoluta de vots dels socis assistents. Les esmenes que puguin presentar-se a aquest reglament deurán ésser presentades amb la deguda antelació per tal d'incloure-les en l'ordre del dia i publicades en la seva totalitat, puix que només podran ésser discutides i aprovades en les Assemblees o Congressos generals.

Art. desè.—La llengua oficial de la «F. C. d'E.» serà l'Esperanto, podent també emprar-se la catalana en les Assemblees.

Art. onzè.—Aquesta «F. C. d'E.» podrà actuar mentre compti amb dues col·lectivitats organitzades o trenta membres isolats. En cas de dissolució, previ acord d'ella, l'actiu existent serà lliurat al caixer de la Constant Representació de les Societats Nacionals Esperantistes.

Art. transitori.—La «F. C. d'E.» serà domiciliada a Barcelona carrer València, 245.

Noves edicions

AUSTRALIO, Lando kaj popolo (Delsudo-Laiho).

31 il·lustracions i un mapa. 96 planes de text. Enquadernat luxosament amb tela. Preu: 9'75 pessetes.

HISTORIO DE LA LINGVO ESPERANTO. 1.^a part (Privat) 1887-1900. 74 planes. En rústica 2'40 pessetes i en tela 5'25 ptes.

II.^a part 1900-1927. 199 planes. Luxosament enquadernat en tela. Preu: 9 pessetes.

LA SANKTA BIBLIO. L'Antic Testament traduït de l'hebreu pel Dr. Zamenhof, junt amb el Nou Testament, tot en un sol llibre.

Amb paper sense cos, enquadernat amb tela 9 pessetes

Amb paper prim i amb or enquad. amb tela 12'75 id.

Enquadernat amb tela granet fosc 18'75 id.

Enquadernat amb pell amb puntes reforçades 30'00 id.

Nota: Cal afegir el 5 per cent dels preus senyalats, per les despeses de correu, en cas d'ésser els llibres enviats fora de Barcelona. Cal que l'adreça sigui ben clara.

Dirigir-se a Ferd. MONTSERRAT, Villarroel, 107, 2.^o, 2.^a Barcelona. IBERIA ESPERANTO SERVO.

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

NO FEU TARD

En un mes havem pogut llegir en els diaris:

Que l'esperantista japonès Adatci ha estat nomenat ambaixador del Japó a París, Adatci és també el representant oficial del Japó a la Lliga de Nacions, i s'ha reunit aquests dies amb Briand, Stresemann, Scialoja i Chamberlain per tal de tractar les qüestions més importants actualment a resoldre per l'organisme internacional de Ginebra.

Que Eug. d'Ors, que tant ha escrit a favor de l'esperanto, passa a representar Espanya a l'Institut de Cooperació Intel·lectual de la Lliga de Nacions.

Que Andréu Baudet, esperantista militant de París, ha estat elegit President de la Cambra de Comerç oficial de la Capital de França.

Que entre les quatre llengües a emprar en la Conferència sobre Bilingüisme, figura l'Esperanto.

Que ha estat elegit per a ocupar la vacant del Doctor Carracido a l'Acadèmia de Ciències Físiques i Químiques de Madrid, el tinent coronel Vicents Ingiada, esperantista militant de fa molts anys, il·lustre valencià, traductor de «La Vaca Cega» de Maragall a l'Esperanto, traducció que fou premiada en Jocs Florals Internacionals.

Savis i polítics de Catalunya—l'Esperanto us interessa!

DELFI DALMAU.

"KATALUNA ESPERANTISTO"

OFICIALA ORGANO DE
KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

Membra kotizaĵo: 3'50 p.; Grupoj: 1'20 por membro.

Jarabono: 6 p. enlande kaj 6 sv. fr. internacie, provokzemplero 2 respondkuponoj.

Federacia sidejo kaj redaktejo: carrer València, 245-BARCELONA

LA DEK DEVOJ DE LA ESPERANTISTO

1. Bone sciu la lingvon, traktu ĝin kun respekto, kaj lasu la versfaradon al poetoj.
2. Esperanton uzu parolante, studu legante kaj ne fuŝu skribante.
3. La plibonigistoj diskutu; vi Fundamenton sekvu kaj fide-la restu.
4. Propagandu ĉiam, ne ĉie; klarigu, ne prediku; rakontu faktojn, ne esperojn.
5. Kion vi povas lerni nur en unu semajno, ne instru en unu horo; el malgravaĵoj ne faru regulon, kaj el la regulo ne faru malgravajon.
6. Verkante en Esperanto, ne kedu interesa, kion nacilingve neniu legus; ne imagu, ke preseraroj plibeligas libron, ne malesperu, se mankas aĉetantoj.
7. Al grupo aliĝu; la kunvenon vizitu; Esperanton parolu. Subtenu K. E. F.
8. Atentu, ke internacia lingvo vivos nur per uzado; memoru, ke tial internacia organizaĵo estas necesa, senlace varbu por U. E. A.
9. Legu gazeton, por ke vi konu faktojn; novajn abonu, por ke ĝi povu ekzisti; kunlaboru, por ke ĝi estu interesa.
10. Por Esperanto kiel movado agu; por ĝi kiel realaĵo pagu, kaj kiel altan idealon konservu ĝin en via koro.



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gutaro* Redakcio: *Carver València 245 BARCELONA*

DIREKTORO: MARIAN SOLÁ

La Urbo de la XV.^a Kongreso de K. E. F. kaj de la XIV.^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj Vinaroç: Deveno kaj disvolviĝo

La pratempa roma geografo, Rufo Festo Avenio, priskribante la hispanan mediteranean bordon raportas tiel: Poste aperas la alta pinto de Kaprasia, internanta sin en la maron kaj la cetera bordo etendiĝas dezerte ĝis la nelogata teritorio de la malgaja Kersoneso (nun Penýscola) kiu kuŝas en la limo de la lago Naccareos (Sant Carlos de la Rápita) tiel nomata laŭ malnova kutimo. En ĝia mezo kuŝas fruktodona insulo plena de olivarboj, kaj tial dediĉita al diino Minerva. En tiu lando troviĝis multaj urboj, kiel Hylactes, Histra, Sarna kaj la nobla Tyrichos, nomoj kiuj devenas de plej malproksima antikveco. La plej famaj loĝantoj de tiuj marbordoj estis la grekoj, kiuj pro la po-edo de fekunda tero, grandnombra brutaro kaj vinberkampoj transportis siajn komercaĵojn tra la Ibero (Ebro) ĝis en la internon de la lando.

Ni povas aldoni ke tiu ĉi lando, etendiganta de la pinto de Kaprasia ĝis la lago Naccareos, ĉefa parto de la malnova Ibercaona regiono de la Ibero, kiu ampleksis de la rivero Uduba ĝis la Ibero, estas la lulilo de nia amata popolo. Kaj sendube unu el tiuj cititaj praurboj, eble la nobla Tyrichos, estas la malnova sidejo de la nuna Vinaroç.

Ne devenas la urbo el la greka enloĝado, kiel iu supozis, sed de pli malnova dato ol tiu kiam la fama popolo enmigris en nian landon.

Laŭ la atestoj kiuj ĝisvivis nin, ni povas scii ke post malapero de la malnovaj urboj ĉi-supre menciitaj, staris sur monteto antaŭ nuna preĝejo dediĉita al Virgulino de Kompato kaj Sankta Sebastiano

vilaĝeto nomita Intibilis jam antaŭ la roma okupado de la lando; restaĵoj estas trovitaj en elfosadoj.

Flanke de tiu monteto troviĝas la malnova vojo kiu trairente la riveron Servol estis utiligita de Anibal por traveturi kun sia armeo al Italujo; vojo ankoraŭ nun ekzistanta kaj konata sub la nomo «Chivert», ĝi venas el Cartagena kaj iras ĝis la roma ĉefurbo tra Francujo.

Same ni scias ke kiam la araboj okupis Hispanujon, post kuraĝa defendo la vilaĝeto estis devigata cedi antaŭ la potenco de la maŭroj; dum longaj jaroj ĝi restis sub tiu regado ĝis kiam la triumfantaj armeoj de Jakobo I^a liberigis la vilaĝon de la longa perforta okupado.

Forpelitaj la mahometanoj el la lando kaj kun ili la popolo loĝinta en la monteto Puig restis en la vilaĝo nur kelkaj mizeraj kabanoj de fiŝkaptistoj apud la marbordo. La reĝo Jakobo I^a cedis ilin feŭde al Raimond d' Alós, unu el la kavaliroj kiuj akompanis la reĝon dum la al militado de Valencio; ĝis kiam pro pligrandigo oni disigis ĝin de Penyiscola el kiu urbo ĝi estis dependanta en la tempo de la Montesa Ordeno al kiu ĝi apartenis.

Dum tiu ĉi tempo oni konstruis fortikajon en «El Puig» el kiu restas nur la «Torreta dels moros» (Tureto de la Maŭroj) tiel nomata kvankam ĝi ne estis konstruita de la maŭroj sed de la kristanaj enloĝantoj por defendi sin kontraŭ la pirataj berberaj atakantoj.

DANIEL D. DELMAS.

(Daŭrigota)

Trad. S. CHALER.

XIV.^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj

NOVAJ PREMIOJ:

X.—Premio de S-ro Teo JUNG, Direktoro de «Heroldo de Esperanto»: 5 jara abono al «Heroldo de Esperanto» 1929-1933; temo: libervola.

XI.—Premio de Universala Asocio de Blindaj Esperantistoj; 50 Ptoj.; temo: libervola.

VERKOJ RICEVITAJ (ĝis la 1.^a de Aprilo): DUA LISTO.

10—Majorko, devizo: Revo 11—Oliver Goldsmith, devizo: Trinovantum 12—Post mortem, devizo: Legu, knabino, kiam plu mi estos. 13—Fragmento Ama Kanto, devizo: Ĝojo, maĝojo de la viv' nutraĵo: 14—La edzino de Petro, devizo: El Oriento venos lum'radia: 15—Androklezo kaj la Elefanto, devizo: Bilardo, 16—Sistemo, devizo: Originale verkita dum la jaroj 1924-28: 17—Venko de l'koro, devizo (?). 18—Vazo rompita, devizo (?). 19—Kleopa, devizo (?). 20—Stelara voĉo, devizo: Excelsior. 21—Vintro kaj Somero, devizo: Amo estas suno. 22—Vulzio, devizo: Ĉagreno. 23—Amo patrina, devizo: Koro. 24—Bopatrino, devizo: Paco I. 25—Edukado, devizo Paco II. 26—La juniga fonto, devizo Paco III. 27—Gardstaranto, devizo: Paco IV.

JOAN GILI NORTA, *Sekretario*.

XV.^a Kongreso de Kataluna Esperantita Federa- racio. Vinaroç Septembro 1928

Ni povas hodiaŭ publikigi la liston de la personoj kiuj prenis sur sin la organizadon de nia nunjara festo en la valencia urbo Vinaroç; tiu listo estas sendube la plej grava elmonro de la intereso kun kiu la urbo de Vinaroç atendas nian kongreson.

KOMITATO DE LA XV.^o KONGRESO DE K. E. F.

HONORAJ MEMBROJ

Lia Provincestra Moŝto
 Lia Episkopa Moŝto
 La Prezidanto de la Provinca Deputitaro
 Markizo de Benicarló
 La Prezidanto de la Loka Ruĝa Kruco

LABORAJ MEMBROJ

Prezidanto: Lia Urbestra Moŝto
 Vicprezidanto: S-ro Daniel Delmas
 Sekretario: S-ro Manuel Foguet
 Kasisto: S-ro Antonio Torres
 Meritmembroj: S-roj Delfi Dalmau kaj Sebastià Chaler
 Voĉdonantoj: S-roj Juan Ribera, Emilio Felip, Vicente Segarra, Daniel Saez, Luis del Castillo, José Sanchiz.

FAKOJ

FESTOJ: S-roj Juan Ribera, Manuel Roda, Joaquin Llasat, Agustin Ribera, Emilio Felip, José Mira, Juan Antonio Cervera, Paquito Vaquer, Bernardino Mercader, Paulino Caballero, Antonio Batiste, Agustín Arnau.

PROPAGANDO: «Patria Nueva» M. Espert, «San Sebastián» M. Llatser, Vicente Segarra, Joaquin Vidal, Daniel Saez, «Heraldo de Vinaroz» Sebastián Juan, Ramon Adell.

AKCEPTO: S-roj Luis del Castillo, José Sanchiz, Francisco Tosca, Juan Bta. Sendra, Emilio Boix, Bautista Marzá, Agustín Monllau, Francisco Borràs.

La Arĝenta Ponto

En bela vespero ĉe l' bordo de l' maro
 Mi staras, direktas rigardon trans ĝi.
 Ho, tie post akvoj, post vasta ondaro
 Ekzistas la lando de l' songoj por mi—
 La manojn trans ondojn mi arde etendas,
 Salutojn en vento post maron mi sendas,—
 Ho, tien ja volus mi iri!
 Sed penu mi naĝi, la fortoj laciĝus—
 Kaj provu mi paŝi: mi dron—enakviĝus—
 Ha, kiel la landon akiri!
 Sed vidu, jen luno arĝenta leviĝas,
 Ĝi ĵetas radiojn sur ondojn de l' mar',
 Kaj ponto arĝenta subite kreiĝas
 Sur maro grandega, sur vasta ondar',
 La koro bategas en mia estajo,
 «Ho, bela miraklo! Benata kreaĵo!
 Ho, lando de l' revo beleĝa!
 Kaj princo de songoj!»,
 Mi ĝoje murmuris,
 Al ponto arĝenta rapide ekkuras,
 Mi estas feliĉa, gajega.
 Kaj Li proksimiĝas, Li arde amata,
 Venante en brilo de l' stela ĉiel',
 Ho, Li, kavaliro, reĝid' sopirata,
 La nobla heroo de bela fabel'!
 Kaj tiam okazas feliĉa renkonto:
 La mano en mano ni staras sur ponto
 Ni staras ekstaze, ĝojante.
 Ĉiaman solecon ne nun mi memoras,
 Pro kora feliĉo mi preskaŭ ckploras
 La manon amatan premante.
 Sed tiam ventego subite ekbiovas,
 La manon ĝi puŝas for el mia man',
 La ponton arĝentan nenie mi trovas—
 Ĝin tute disigis la nokturagan'
 Ve lando, ve mia surtera ĉielo!
 Kaj kara reĝido el bela fabelo!
 Mi kial ne povis Vin havi?
 Ĉu povas la ponto ankoraŭ kreiĝi?!
 Ĉu princo fabela al mi proksimiĝi?!
 Kaj mian feliĉon resavi?!

Varma Järvenpää.

Menciita en la XIII^aj Internaciaj Floraj Ludoj.

Pri la unuaj teknikaj inventoj

(4.^a Lekcio)

En la elementa fiziko (mekaniko) ni lernas, ke ĉiuj maŝinoj povas esti reduktitaj je kunmetaĵoj de la kvin simplaj maŝinoj, kiuj estas la sekvantaj

1. levilo
2. deklivo
3. kojno
4. pulio (rul-bloko)
6. kranko (cilindro-rado)

Kiuj eltrovis tiujn ĉi simplajn maŝinojn, ni ne scias; ĉiuokaze, la homo, kiu eltrovis nur unu el ili, estis geniulo kaj granda inventisto. Por kompreni la signifon de tiuj ĉi eltrovoj, ni konsideru la sekvantaĵojn:

Antaŭ la eltrovo de la rado, la movigo de pezaj objektoj estis tre malfacila tasko. La eltrovo de la rado permesis sole la konstruadon de veturiloj, kiuj siavice ebligis transportadon de pli multaj posedaĵoj. La komerco ankaŭ evoluis pere de la veturiloj. Ni vidas do sen pluraj similaj ekzemploj ke la simplaj maŝinoj ebligas multegajn aliajn progresojn.

La plej simplaj maŝinoj estas la sekvantaj objektoj: tranĉilo estas praktika apliko de la kojno, foŝilo tiu de la levilo, per pulio oni povas levi grandan pezon malrapide, per krankomekanismo oni povas facile ĉerpi akvon el puto kaj per deklivo oni povas meti pezan objekton sur veturilon, ktp. La martelo, la ĉizilo, la borilo kaj unuvorte ĉiuj instrumentoj kaj laboriloj estas ja simplaj maŝinoj. La plej moderna vaporturbino ne estas alia afero ol kombinaĵo kaj scienca kunmetaĵo de la simplaj maŝinoj.

Sed ni devas fiksi unu punkton, kiu estas gravega: per la uzado de la simplaj maŝinoj ni neniam gajnas forton aŭ laboron: la simplaj maŝinoj ĉiam postulas la homan aŭ eventuale la bestan laborojn kaj ili nur malrapide akumulas aŭ transformas la direkton de la muskolaj fortoj. Ni lernos pri ĉi ĉio en mekaniko, se ni ne ankoraŭ sciis, ni devas ĝis tiam kredi, tiujn ĉi sciencajn faktojn. Se la homaro ne estus plue evoluinta ol la kombinaĵoj de la 5 simplaj maŝinoj, ni ankoraŭ hodiaŭ vivus en socio simila al la Egipta. La homaj fortoj estas malgrandaj, eĉ la bestaj fortoj ne sufiĉas. La homo jam depost longa tempo observis la gigantajn fortojn, kiuj laboras en la naturo, kaj tiu ĉi fierega homo konceptis la ideon, jungi tiujn ĉi naturfortojn kaj laborigi ilin. Kaj ĝuste en tio konsistas la grandeco de la homo kaj la potenco de la homa tekniko. Ni nun okupiĝos pri *la utiligo de la naturaj fortoj*.

En la naturo agas multegaj fortoj, sed ĉiuj ne estas samgrade

utiligeblaj por niaj celoj. El tiuj, kiuj povas esti relative facile utiligataj, ni povas formi tri grandajn grupojn:

- akvoforto 1.
- ventoforto 2.
- suno-forto 3.

Jam la plej antikvaj homoj konis la *ŝipveturadon* sur riveroj. Ili havis boatojn kaj flosojn, kiuj estis kelkfoje grandaj naĝantaj kolonioj, sur grandaj riveroj. Oni aplikis la simplan maŝinon «levilo» kiel remilojn kaj direktilon. La akvoforto estas tie ĉi aplikata por la transporto de homoj kaj komercaĵoj. Alia apliko de tiu ĉi natura forto konsistas el la konstruo de *riveraj mueliloj*. La fluanta akvo turnas tie ĉi grandajn muelŝtonojn, kiuj kunpremas kaj muelas la grenojn kaj faras el ili farunon. En la epoko, kiam oni ne ankoraŭ konis tiun ĉi instaladon, oni fabrikis la panon ĉu el nerompitaj grenoj, ĉu el faruno muelita inter du ŝtonoj interfrotataj per la mano. La Egiptanoj, kiuj estis tiel lertaj en akva tekniko, mirinde ne pensis pri akva muelejo kaj fabrikis panon per la jam dirita primitiva metodo. La unuaj riveraj muelejoj datas de la meza epoko.

Hodiaŭ ni scias utiligi la fortojn de la akvo multe pli efike. Unue ni utiligas ne plu la malnovajn akvoradojn sed la tielnomatajn turbinojn por la movigo de niaj akvaj instalaĵoj. La turbino havas la avantaĝon je la akvorado, ke ne nur la kinetika energio sed ankaŭ la pezo de la falanta akvo efikas je ĝi. Ni estas kapablaj fabrikati elektran fluon el la kinetika energio (movenergio) de la riveroj kaj transporti la tiel gajnitan senpagan energion je kia ajn distanco, kie ĝi povas fari kian ajn laboron. Kaj ne nur la movo de la riveroj sed ankaŭ la multspecaj movoj de lagoj kaj maroj estos baldaŭ praktike utiligataj. En la lasta tempo en diversaj landoj scienculoj pripensas utiligon de la maraj ondoj, de la alfluo kaj deflue kaj de la temperaturdiferenco inter suprajaj kaj profundaj akvotavoloj. La akvo kaŝas en si tre grandan energion, kiun la homaro devas profiti por siaj celoj.

La energio de la ventoj trovas depost la antikveco sian praktikan aplikon en la *velboatoj*. La homoj rimarkis nur en la mezepoko, ke la boatoj kaj ŝipoj povas uzi la energion de la vento anstataŭ la muskolforton de la alĉenigitaj sklavoĵoj. La teknika apliko de la ventoforto ne nur liberigis la grandan nombron de tiuj malfeliĉuloj, sed ĝi ankaŭ permesis grandan evoluon de la navigado, vigligon de la interkontinenta komerco kaj ĉefe la grandajn vojaĝojn de la malkovraĵoj. Per velŝipoj oni ekkonis Amerikon, oni ĉirkaŭvojaĝis la Teron. La sekvoj de tiu ĉi eltrovo estas vere grandegaj kaj vastegaj. En nia epoko la uzado de velŝipoj estas preskaŭ sensignifa kontraŭ la potenca vapornavigado. Sed sur ventaj maroj, kiel la Pacifiko kaj por la transportado de neurgaj kaj

pezaj materialoj, la velŝipado estas ankoraŭ ĝis nun la plej malmultekosta kaj la plej taŭga maniero.

Alia apliko de la ventenergio estas la *ventomueliloj*. Depost la mezepoko en ventaj landoj, kiel ekzemple la holandaj, la hungaraj kaj aliaj grandaj ebenajoj oni utiligas la energion de la vento per grandaj ventmueliloj. En nia epoko oni anstataŭigis la ne multe efikantajn primitivajn ventmuelilojn per ventturbinoj, kiuj pli efike utiligas la energion de la vento. Oni povas tiamaniere uzi la ventoforton ĉu por pumpado de akvo el puto, ĉu por estigo de elektra fluo, ktp. Tial tiu ĉi formo de energio-aplikado nur povas esti rekomendata por ventoriĉaj landoj.

La antaŭ nelonge famaj aerostatoj kaj balonoj estis alia apliko de la ventoforto. Ili estis tamen tre malsekuraj kaj baldaŭ oni muntis ilin per motoroj. La direktebla balono kaj la aviadilo ne plu estas aplikoj de la ventoforto, ili ofte eĉ laboras kontraŭ la vento.

Eble la plej grava afero en la historio de la homaro estas la aplikado de la suna energio. Efektive ni devas scii, ke la karbo ne estas alio ol dum jarmiloj akumuliginta suna energio. Kiel la karbo fariĝis? Antaŭ multaj jarmiloj fekunda vegetaĵaro kovris la teran surfacon. Arbaregoj post arbaregoj kreskadis kaj vulkanaj irupcioj enterigis ilin. Kun la vegetaĵoj kompreneble estis enterigitaj animaloj kaj ĉiuspecaj specimenoj de la prahistoria faŭno. Dum la jarmiloj la enterigitaj vegetaĵoj kunpremiĝis kaj rezultis la karbon kaj ankaŭ la petrolon. Depost la ekspluato de la karbminejoj la homaro hejtas per la sunlumoj de la pratempoj. Ni moviĝas niajn maŝinojn per la sama materialo. Entute nia tuta tekniko estas bazita sur la ŝtonkarbon kaj sur la feron. La metalurgio mem aplikas la karbon. Verdire la Suno estas la eterna fonto de la tera vivo kaj tial ni ne devas miri, ke antikvaj popoloj konsideris ĝin kiel veran Dion (sunadorado). Sed ĉiu grandeco devas finiĝi. Baldaŭ la karbminejoj malpleniĝos. Pro tio ni ankaŭ ne devas timi. La akvoforto disponigos al ni sufiĉe da elektro por anstataŭigi la varmoenergion de brulanta karbo. Ŝajnas, ke la homaro nenion devas timi por multaj milionoj da jarcentoj dum la energio de la Suno subtenos la teran vivon.

La varmoenergio de la Suno ne nur estas utiligata pere de la petrolo kaj karbo sed ankaŭ direkte. Oni jam delonge konstruis instalaĵojn kie la sunlumo estas kolektata per konveksaj speguloj en fokuson de lenso, de kie ĝi falas sur la fulgizitan vandon de kaldrono. Tiamaniere oni havas tute originalan vapormaŝinon movigitan ne per la sunlumo kiu brilis en la pratempoj sed per la aktualaj sunradioj. Aliparte oni eksperimentis per ŝipoj movigitaj de suna varmeco kaj de ventoturbino. Ni devas rimarki, ke tiuj ĉi novaj eksperimentoj ne prezentas ankoraŭ grandan praktikan

valoron sed ili atestas, ke la inventa spirito de la homo ĉiumaniere sciopovas jungi la fortojn de la naturo.

NOTOJ POR INSTRUANTOJ: Nia epoko estas prave kvalifikata epoko de tekniko. La historio-instruado, kiu baziĝas sur la klasikismo de pasintaj jarcentoj prefere ignoras tiun ĉi fakton. Ni devas kontraŭagi tiun ĉi tendencon insistante tute speciale pri la graveco de la tekniko. Ni malpli longe pritraktis tiun ĉi ĉapitron, ĉar ni scias, ke tiu ĉi materio estas malfacila por la lernantoj. La instruisto devas tie ĉi multe klarigi kaj fari plurajn klarigajn desegnaĵojn sur la nigra tabulon, kiujn la lernantoj nature zorge kopiu. Teknika desegnaĵo baldaŭ estos tiel necesa kiel leterskribado!

LA METODO KAJ LA PROGRAMO DE LA HUMANISTA HISTORIO

Jam mi atingis la tri kvaronojn de mia disertacio kaj mi bedaŭras, ke mi apenaŭ enkondukis mian programon. La leganto bonvolu rememori, ke mia celo ne estas ellaboro de plena humanista historio; mi nur intencas iniciati la instruistojn pri la metodoj kaj programo de tia historio. Nun mi diru kelkajn pli precizajn vortojn por klarigi mian metodon. Eble la afabla leganto jam deduktis el miaj tekstoj (4 lekcio) la esencon de mia metodo, kiun mi resumos en la sekvantaj punktoj:

1.) La instruado kontentigu la du postulojn ĝenerale necesajn en ĉiu elementa kaj eĉ supera instruado: *scienceco* kaj *intereseco*. Pri tio ne plu necesas insisti; tiu ĉi estas aksiomo de ĉiu instruado.

2.) Oni apogu la parolon per desegnaĵoj mem faritaj sur la tabulon. La lernantoj kopiu la desegnaĵojn en siajn kajerojn. Oni lasu sufiĉe da tempo por tiu ĉi laboro kaj oni kontrolo, ke la lernantoj zorge kopias. Laŭokaze oni desegnu per la lernantoj la samajn skizojn sur la tabulon.

3.) Je la fino de ĉiu lekcio oni resumu la plej gravajn faktojn menciitajn dum la lekcio kaj oni daktu tiun tekston al la lernantoj. La diktado estu sufiĉe malrapida, sed oni malpermesu al la lernantoj rekopi hejme la skribaĵojn faritajn en la lernejo. Oni devas instrui al la infanoj *tuj bone fari*.

4.) Kelkfoje mi metas en la lecion iom da entuziasmo, iom da sentimento. Efektive, mi kredas, ke tio estas la kerno de tia humanista historio. La instruantoj bone faros, se ili imitos tiun ĉi stilon. Sed mi rekomendas, ke ili nur demandu la lernantojn pri la faktoj mem, neniam oni devigu ilin al ripeto de tiaj entuziasmaj kaj homaranaj frazoj. Se oni tion farus, oni metus en la konscion kaj ne en la intuitivon de la infanoj tiujn ĉi gravajn ideojn. Kaj ni devas scii, ke la intuitivo estas la vera trezorejo de la eterne konservindaj konoj!

Post tiuj kelkaj *konsiloj* pri la metodo, mi diru kelkajn rimarkojn pri la programo de la humanista historio. Ĝis nun mi enkondukis la materion sufiĉe detale. Se oni ne disponas je sufiĉe da tempo, oni povas instrui tute same la kvar lekcion. Nun du vojoj staras antaŭ mi: ĉu mi resumos la programon de la tuta plua instruado, por liveri al la instruistoj la krudan materion, kiun ili devos ellabori, ĉu mi simple donos la temojn, kiuj laŭ mia kredo devas esti nepre instruataj, lasante al la instruistoj plenan liberecon pri la prezentmaniero. Mi elektos la duan metodon. En la sekvantaj linioj mi donos la plenan programon de la humanista historio. Kiam mi havos pli da tempo kaj kiam la okazo sin prezentos, mi volonte ellaboros—kun ĉiuj bonvolaj kelpantoj—la plenan programon. Sed ĉar en la ĝisnunaj lekcionoj mi nur donis ekzemplojn de lekcionoj pri antikvaj aferoj, mi opinias, ke mi bone faros, se mi ellaboros du plurajn lekcionojn. Unu el tiuj temoj pri la *meza epoko de la scienco*, en kiu mi priparolos la aŭroron de la kemio, kirurgio kaj higieno, en la dua mi priparolos la inventon kaj la aplikon de la elektreco. La unua el tiuj ĉi du lastaj lekcionoj temas pri aferoj, kiuj estas tre gravaj kaj interesaj por la ĝenerala inteligenteco kaj kiujn mirinde neniu lernejo hodiaŭ instruas. Oni devigas la lernantojn je ellerno de komplikajn matematikajn formulojn, kiuj vere necesos por la estontaj inĝenieroj kaj profesoroj sed oni preskaŭ tute silentas pri la kuracista scienco kaj pri higieno. Kaj ni tamen ne devas nei, ke tiuj ĉi aferoj estas nepre necesaj ne nur por la estontaj kuracistoj sed ankaŭ por ĉiu pura kulturhomo. La dua kaj la lasta lekcio de tiu ĉi disertacio estos la invento kaj la praktika apliko de la elektreco. Ĉiu rekonas la gravecon kaj ankaŭ la necescon de tia lekcio sed eble kelkaj opinios, ke mi traktas tiun ĉi materion iom tro malfacile por junaj lernantoj. Oni ne kredis, ke la modernaj infanoj estas tiom naivaj. Antaŭ kelkaj jaroj nur paroli pri senfadena telefonado ŝajnis neebla al infanoj. Sed hodiaŭ la plej modesta familio povas facile havi tian instalaĵon kaj oni ne povas lasi, ke la infanoj ne sciu la principon de tia ĉiutaga afero. Oni do neniam timu klarigi la aferojn ĉar post kelkaj jaroj la hodiaŭ ŝajne malfacilaj problemoj povos esti ĉiutagaj.

Mi proponas sekvantan programon de la humanista historio:

PROGRAMO DE UNUJARA INSTRUADO:

Enkonduko: la kvar antaŭaj lekcionoj.

La ekkono de la Tero.

- 1.) Orientaj popoloj
- 2.) Grekoj kaj komerco (el geografia vidpunkto)
- 3.) Kulturo kaj komerco en la antikva epoko
- 4.) La Mezepoko (ĝenerala karakterizo)

- 5.) Portugaloj kaj Italoj (grandaj vojaĝantoj)
- 6.) La malkaŝo de Ameriko
- 7.) Angloj kaj Francoj (ekspedicioj)
- 8.) La plej lastaj vojaĝoj (ĝis Amundsen)

La ekkono de la naturfortoj.

- 1.) La konoj de la grekoj (Arkimedo, Eŭklido, Platon)
- 2.) La tekniko de la Romanoj (vojoj, kanaloj)
- 3.) La mezepoka alkemio
- 4.) Kemio kaj kirurgio
- 5.) La progreso de la fiziko
- 6.) La leĝoj de la aerpremo
- 7.) La organa kemio kaj Lavoisier
- 8.) La invento de la vapormaŝino
- 9.) La invento de la elektreco

La moderna epoko. Enkonduko: akcenti, ke ni konsideras ĉiun modernan inventon, kiel la rezulton de la longa evoluo. Homoj estas koraloj de unu koralmonto aŭ formikoj de unu formikejo. Oni pritraktu ĉiun modernan aferon el historia vidpunkto, komparante ĝin al la antaŭaj primitivaj rimedoj. Tiel oni atingos du celojn en sama tempo: oni instruos historion kaj oni konigos la necesajn konojn pri la moderna tekniko.

Jen kelkaj temoj por tiu ĉi *dua parto de la kurso*:

La fervojo kaj la vaporŝipo (kun ĝeneralaj konsideroj pri la evoluo de la transporto)

- 1.) La lokomotivo
- 2.) La fervoja trafiko
- 3.) La vaporŝipo
- 4.) Turbinaj ŝipoj, submaraj boatoj, mara trafiko

La elektrotekniko.

- 1.) Lumigado kaj hejtado
- 2.) Telegrafado per fadenoj kaj sen fadenoj
- 3.) La telefonado. Telefonsistemoj, trafiko.

La Sunradioj.

- 1.) La fotografado (necesa instruo por ĉiu infano, kiu tutverŝajne iam fotografos)
- 2.) La kinematografo
- 3.) Teleskopoj kaj astronomio

La aero.

- 1.) La likvigita aero kaj la glaciigo de la viando
- 2.) La aviado

La akvo.

- 1.) Niagara
- 2.) Nilo
- 3.) Panama kaj Manchester

La interkomuniko.

- 1.) Motoroj kaj aŭtomobiloj
- 2.) Modernaj transmaraj ŝipegoj
- 3.) La transkontinentaj fervojoj (Siberio, Ameriko)
- 4.) La tuneloj (Simplon, k.a.)

Minejoj kaj metalurgio.

- 1.) Salo, sulfuro, kupro, plumbo, k.a.
- 2.) Oro, arĝento, platino
- 3.) Fermineraloj kaj fandado
- 4.) Ŝtonkarbo, briketo, koakso, gaso

Naturaj brulmaterialoj.

- 1.) Petroloj kaj la produkto de la ĉistilado (benzino, k.a.)
- 2.) La perspektivoj de la sintezaj bruligiloj
- 3.) Naturaj gasfontoj (metano, k.a.)

La moderna manufakturo.

- 1.) Teksado kaj tinkurado
- 2.) La papero
- 3.) Presado kaj linotipo
- 4.) La presteĥniko (trikolora preso, k.a.)

Grava rimarko: ĉiufoje oni eliru el la primitiva metodo kaj oni skizu la progreson, alvenante al la moderna metodo, kiun oni klariĝu tiel ekzakte, kiel estas eble je la grado de la instruado.

Tiu ĉi programo ne estas neŝanĝebla, mi nur ĝin proponas. Mi alvokas al la legantoj, ke ili kritiku ĝin. Oni aldonu kaj forigu, sed oni ĉefe ellaboru la unuopajn lekcionojn. La homa scio estas kolektivaĵo, la instruado pri la evoluo de la homa scio devas esti ankaŭ kolektiva laboro de la edukistoj kaj de la edukemuloj!

Kaj nun mi donos la du lastajn lekcionojn. Mi aldonos neniamajn komentariojn, ĉar mi jam diris, kio estas necesa pri ili.

La Blinda Knabo

de J. J. L. Ten Kate.

Panjo, restu apud mi,
Diru, kiel floras flor',
Diru, kiel la kampar'
Brilas en bril' de l' aŭror'!

Bela estas la floret',
Oni diras, kaj la land',
La rozet' kun sia kron'
Kaj la bird' kun sia kant'!

Ĉie vagas mi, ho ve!
Tra malluma land' sen lim'.
Panjo, restu apud mi:
Sola min ekkaptas tim'!

Panjo, ŝatus vidi mi
Ĉion ĉirkaŭanta min:
sed unue ŝatus mi
unufoje vidi vin!

Bele sonas via voĉ'
Kiel kant' de najtingal'.
Ĉu pli bela povas do
Esti sunobril' en val'?

Kiam kantas vi, patrin',
Laŭ anĝela melodi':
Paradizon, en sunbril'
Sin bananta, vidas mi.

Panjo, ŝatus vidi mi
Ĉion ĉirkaŭanta min:
Sed unue ŝatus mi
Unufoje vidi vin!

El la nederlanda tradukis.

JAN VAN SCHOOR.

Bibliografio

FABIOLA, romano pri la katakomboj de Kardinalo WISEMAN, el angla lingvo tradukita de RAMO, dua eldono reviziita de Em. ROBERT. 15x20 cm., 440 paĝoj, 8 luksaj ekster—kaj multaj entekstaj ilustraĵoj. Prezo, afrankite: 35 fr. «Espero Katolika», 55, rue de Vaugirard, Paris-VI.

Vere bona, laŭ kristana vidpunkto tutmonde fama ĉefverko, el Esperanta vidpunkto granda alportajo al nia internacia literaturo. —Montru al kristano tiun esperantaĵon kaj vi silentigos lin, se li parolas malrespekte pri nia lingvo, pri nia movado. Dubanto fariĝos simpatianto. Nova esperantisto ellernos avide por ĝui la dolĉan spiritaĵon de la kristana literaturo. Ellerninto avide legas kaj bedaŭros la finon.

Bonega estas «Fabiola» kiel kristana literaturajo kaj kiel esperanta traduko. Ramo kaj Robert meritas dankemon de la esperantistoj kaj de la kristanoj el la tuta mondo.

Nekristanoj vere komprenos post lego de «Fabiola» la religion de la granda angla Kardinalo Ĉefepiskopo de Westminster en la XIX jarcento, kaj se ili ne fariĝos samideanoj de Wiseman, ili seios ami lian religion, ĉar ili konos ĝian bonan ĉelon, ĝian grandan senton.

Ni konigu per bonaj esperantaj verkoj ĉiujn, ĉiajn diajn kaj homajn civilizajojn, kaj ni atingos ĉion respektigi, dion amigi de ĉiuj, kaj la vera frataro estiĝos kiel miraklo de la kulturo.

«Espero Katolika» eldoninto de «Fabiola», trafe montras la vojon al la aliaj «Espero...j». —Allogaj verkoj pri ĉiu afero, bonaj aŭtoroj por klarigaj verkoj, kaj fariĝos klareco, lumo, ordo, kaj konkordo.—*D'ido.*

ROBINSONO KRUSO. Legolibro por geknaboj laŭ Campe, kompilita kaj tradukita de H. J. Bulthuis. Eldonita de W. J. Thieme i Cie.—Zutphen. 1928. 128 pĝ. 22 1/2 15 1/2 Prezo: ne montrita.

La literaturamantoj jam havas plenan ideon pri la ŝatinda stilo de Bulthuis kaj tiuj, kiuj ne havas tiun ideon, povas ĝin facile konstati ĉe lia nova traduko, tiel malpeza, tiel eleganta. La konata verko de Defoe, lerte mallongigita, donas al la junaj lernantoj, precipe holandanoj, tre utilan materialon por la praktika ekzercigado de esperanto.

Ĉe la komenco de la libro mallongaj gramatikaj klarigoj donas en holanda lingvo ideon pri la facileco kaj simpleco de Esperanto, kaj post 83 paĝoj da teksto sekvas vortareto por ĉiu ĉapitro kaj demandaro en Esperanto, ankaŭ por ĉiu ĉapitro.

La libro, bele prezentita kun multaj ilustraĵoj, estas tre taŭga

por holandandlingvaj lernantoj kaj ankaŭ alilingvaj kursanoj povas ĉerpi el la libro tre utilan profiton.—*Saljo*.

GALERIO DE ZAMENHOFOJ.—Kolektita de Eduardo Wiensfeld.L.K.—Libreto el 40 paĝoj 12x17, 19 portretoj kaj skemo enhavanta la genealogian arbon de la familio Zamenhof.

Verketo tre utila por ĉiu esperantisto kaj kiu, laŭ la kolekto, estas komplemento de «Vivo de Zamenhof» (Edmond Privat) kaj «La lastaj tagoj de D-ro Zamenhof» (Jung kaj Oberrotman), kaj vere tiel estas. Per la libreto oni povas konatiĝi kun la Zamenhofaj personoj: kun la gepatroj de nia Majstro, kun liaj gefratoj kaj gefratoj, kun lia edzino, gefiloj kaj bofilino. La portretoj, kun familia bildo, estas faritaj laŭ originalaj fotografajoj, kaj la genealogia arbo estas certe interesa. Ankaŭ estas oportuna, post la artikolo dediĉata al D-ro Zamenhof la kronologio de la vivo de nia Majstro. La kolekto aperis jam antaŭ kelka tempo sur Heroldo de Esperanto kaj la sama eldonejo aperigis la libreton. Korekta stilo, tute laŭfundamenta, bona preso kaj klaraj bildoj, igas ĝin tre plaĉa kaj agrabla.—*Kodo*.

«**ILUSTRITA BIBLIOTEKO**».—N^oj 1-2: DEVI ANGRENI kaj MAK MIAH.—Du rakontoj el Javo originale en Esperanto, verkitaj de P. W. van del Brock. Verketo el 63 paĝoj 13x19, 5.

Per tiu ĉi duobla broŝuro staras antaŭ la esperanta legantaro nova biblioteko eldonata de «Heroldo de Esperanto» el Horrem bei Koln (Germanujo). La eldonejo prezentas la aŭtoron en la antaŭparoloj, «kiu vivis pli ol tridek jarojn en Javo, kaj kiu elfunde konas la landon kaj popolon, ĝian lingvon kaj ĝian literaturon», kaj ankaŭ diras ke la libreto estas «la unua en serio de espereblaj multaj sekvontaj».

DEVI ENGRENENI, estas ĉarma rakonto pri la amo de princo al filino de veziro tiel nomata, kiu estas mortigata de ŝia duonfrato je instigo de monaĥina onklino, pro helpo al lia patro kiu volus edzigi lin al princino.

MAK MIAH, estas interesa historio de javanino edziniĝinta al anglo kiu pro superŝtira penso post kelkaj jaroj, forlasas ŝiajn edzon kaj filinon, tiamnte «ke ŝia edziniĝo kun viro el alia raso minacas la tutan familion per granda malfeliĉo». Kaj laŭ konsiloj de fripona «dukuno» kiu celas ŝiajn riĉaĵojn, ŝi forlasas ilin kaj fine estas mortigata de tiu krimulo. La agrabla legado, la bona preso, kaj la oportunaj ilustraĵoj kaj titolbildo de Ilse Hofmann kaj F. Dücker, iras la libreton tre ĉarma kaj rekomendinda. Pro tio ni ĝojas pri la apero de «Ilustrita Biblioteko» kaj al ĝi deziras vivadon.—*Kodo*.

LANDOJ DE L' FANTAZIO.—Romano originale verkitaj en Esperanto de TEO JUNG. Ilustrita de Geo Schmidt kun titola bildo

de F. Dücker. Eldonita de Heroldo de Esperanto en Horrem bei Köln. (Germanujo). Paĝoj 323. Prezo: Broŝ. 3,20 M. bind. 4,80 M.

Mi devas danki al S-ro Jung por la agrabla legado kiun lia originalo verke proponis al mi. En nekonata regiono loĝas malnova popolo tute izolita, kun siaj propraj moroj kaj civilizacio; legendoj ekzistas pri malproksimaj transdezertaj fantaziaj landoj kie la homoj faras mirindajojn. Unu tagon aviadilo kun du pasaĝeroj alteriĝas en tiun landon; ili estas akceptataj amike de la reĝa familio kaj montras al la popolo kelkajn modernajn instrumentojn kiuj por ili estas kvazaŭ mirakloj. La reĝido deziris jam de longe veturi al la landoj de l' fantazio, t.e. Eŭropo kaj Ameriko kaj nun kun la aeroplano li trovis la manieron plenumi sian revon; kun estonta ŝia bofrato li ekveturas kaj post multaj malfeliĉaĵoj atingas sian celon. Mi ne rakontos iliajn aventurojn, kiuj estas tre legindaj, ĉar mi ne volas malgrandigi la intereson de via propra legado. Samtempe vigla intrigo malvolviĝas en la izola lando kiu havas sian decan finon kiam, jam perditaj ĉiuj esperoj, revenas la forvojaĝintoj kun nova aeroplano kaj ricevas konvenan punon la malbonuloj. Tre ĉarma estas la fino de tiu romano de aventuroj.

El ĉiuj originalaj romanoj kiujn ni havas en esperanta lingvo tiu estas certe unu el la plej belaj, se ne la plej bela, kaj unu el tiuj romanoj kiujn oni ne lasas ĝis la fino kiam oni eklegis dekon da paĝoj.

La lingvo estas tre korekta kiel decas por verko de esperanta redaktoro, kaj la plej konvinkiga argumento kontraŭ la opinio erra de S-ro Jung koncerne la perfektecon de Esperanto estas ĝuste lia propra bonega verko. Mi tre ĝojos se S-ro Jung forlasos pri lingvajn diskutojn kaj klopodos labori en la kampo de la lingvo per verkado de tiel interesaj libroj.—M. S.

Pri la Movado

Barcelona.—Jam de longe en la ĵurnalo «Las Noticias» aperas esperanta rubriko redaktata de S-ro R. S. Rocamora; ni aplaŭdas ke oni faras propagandon por nia lingvo, sed ni ne povas aprobi ke en sia raporto pri la movado esperantista en nia lando la aŭtoro sisteme kaj intence ignoras la longan kaj persistan laboradon de la Kataluna Federacio kiu kunigas la plej grandan nombron da enlandaj samideanoj.

Por ke la publiko estu ĝuste informita pri la stato de nia afero, samideano kiu sin kaŝas sub la pseŭdonimo «Simplemulo» malfermis ankaŭ esperantan rubrikon en la ĵurnalo «El Progreso». Ni dankas al tiu anonima samideano por lia bonvola tasko kaj rekomendas al ĝiaj legantoj sendi dankan leteron al la redakcio.

Nova Grupo.—En la societo Centre Cultural Vinarocenc ĵus fon-

diĝis nova grupo sub la nomo Nova Stelo; ĝi tuj aliĝis al K. E. F. La komitato konsistas el S-roj Sebastià Chaler, prezidanto, Fr. Cardona, sekretario, J. Ginesta, kasisto, J. Pastor, M. Estiller, A. Juan, voĉdonantoj. Ĝia adreso estas «Nova Stelo», Abaixadors 10 pral. Barcelona. Ni deziras al la nova grupo prosperan kaj longan vivon.

Terrassa.—Post la baldaŭa finiĝo de la vintra kurso oni aranĝos someran ĉar sufiĉa nombro da lernantoj anoncis sin por tio. La urba konsilantaro donacis al la grupo «Lumon» monhelpon da 100 pesetoj.

Rubí.—La kurso finiĝis kun 40 novaj esperantistoj. Dankojn al S-ro Ratés, Escayol kaj Chaler al kiuj oni ŝuldas la revekigon la de movado.

Radio Barcelona.—S-ro S. Alberich faris esperantan paroladon la unuan lundon de Aprilo en tiu ĉi radio-stacio. En la gazeto International Language kiu aperas en Londono oni povas legi raporton pri la bona aŭdado de tiuj ĉi paroladoj.

Vizito.—La 31^an de Marto, la komitato de K. E. F. vizitis la novan grupon Nova Stelo kaj estis kore akceptita de la Komitato de Centre Vinarocenc. Oni longe parolis pri la organizo de la Kongreso en ilia urbo kaj pri la signifo de Esperanto. Ni aŭdis ke multaj membroj de la societo deziras akomponi nin al Vinaroĉ okaze de nia ĉiujara festo.

Datreveno.—Proksiman 14^an de Aprilo la grupo «Barcelona Stelo» festos la XIX^an datrevenon de ĝia fondiĝo. Oni organizas teatran prezentadon, kantojn, k.c. En nia venonta numero de nia gazeto ni detale priskribos la feston al kiu ni deziras plej grandan sukceson. Okaze de tiu festo ni sendas al la simpatia grupo «Barcelona Stelo» niajn sincerajn salutojn.

Soller.—En la gazeto «Soller» nia amiko S-ro A. Arbona publikigas ĉiusemajne lecionon de Esperanto. Ni gratulas lin por la bona propagando, ĉar oni povas diri ke kelkfoje la legado de la simpla kaj logika gramatiko de Esperanto estas pli varbiga ol propaganda artikolo.

Nekrologio

La 6^an de Marto 1928 mortis en Reus S-ro Pere AGUADE SAMORA, la patro de nia samideano, eksprezidanto de K. E. F. kaj organizinto de la kongreso en Reus, S-ro Enric AGUADE.

Al nia kara amiko ni sendas la esprimon de nia kondolenco.

La Redakcio.

Estatuts de la Federació Catalana d'Esperantistes

Article primer.—Amb el nom de «Federació Catalana d'Esperantistes» hom constitueix una federació d'esperantistes en terres de llengua catalana.

Art. segon.—L'objecte de la «F. C. d'E.» és la unió de tots els esperantistes en terres de llengua catalana per a la divulgació i propaganda de l'Esperanto, pels fins de la representació aconsellada en la reunió general del V Congrés Internacional d'Esperanto celebrat a Barcelona, per a complimentar tots els acords i resolucions, que afecten als esperantistes com a col·lectivitat, emanats dels Congressos Internacionals o dels nuclis directors de la llengua del Dr. Zamenhof.

Art. tercer.—Per a el millor compliment de l'article anterior, la «F. C. d'E.» publicarà una revista, l'organització de la qual serà determinada per un reglament especial interior publicat pel cos de redacció i prèvia acceptació del Comitè Directiu. El preu de l'abonament a la revista serà de sis pessetes anyals.

Art. quart.—La «F. C. d'E.» constarà de membres associats i de membres isolats; els primers seran federats per mitjà de l'entitat a la qual pertanyin i els altres directament i en caràcter particular.

Els diversos organismes pertanyents a la «F. C. d'E.» contribuiran el seu sosteniment amb la quota trimestral, pagada a la bestreta, de 0'40 ptes. almenys per cada soci i els individuals amb una quota mínima de 3'50 ptes. anuals, pagada a la bestreta.

Art. quint.—La «F. C. d'E.» serà regida per un Comitè Directiu, renovable cada any, compost de President, Vice-president, Secretari, Vice-secretari, Comptador, Caixer, Administrador i quatre Vocals.

Art. sisè.—El Comitè de la «F. C. d'E.» convocarà almenys una vegada a l'any, en diferents localitats, durant la primavera i en dia festiu, tots els federats, en Assemblea o Congrés general, en el qual, prèvia ordre del dia hom donarà compte als assistents dels treballs i gestions acomplerts pel referit Comitè Directiu durant el seu exercici, hom acordarà el lloc on deurà celebrar-se el vinent Congrés o Assemblea, hom nomenarà els individus que deuran constituir el Comitè el pròxim exercici, i hom discutirà les proposicions que hagin estat presentades abans de la sortida del número de la revista anunciant el Congrés o Assemblea, i anunciades en l'ordre del dia.

Art. setè.—El Comitè serà facultat per a crear les seccions que cregui més convenientes per a la prosperitat de la «F. C. d'E.» i de l'Esperanto, les juntes de les quals seran renovades per cada Comitè de bell nou elegit.

Serà president nat de cada secció un individu del Comitè designat pel mateix.

Art. vuitè.—Tots els esperantistes pertanyents a organitzacions federades tindran veu i vot en les Assemblees anuals, però el seu vot serà delegable al president d'un grup o una altra persona qualificada, prèvia la presentació dels corresponents carnets de soci.

Art. novè.—Tots els acords de les Assemblees o Congressos seran presos per majoria absoluta de vots dels socis assistents. Les esmenes que puguin presentar-se a aquest reglament deuran ésser presentades amb la deguda antelació per tal d'incloure-les en l'ordre del dia i publicades en la seva totalitat, puix que només podran ésser discutides i aprovades en les Assemblees o Congressos generals.

Art. desè.—La llengua oficial de la «F. C. d'E.» serà l'Esperanto, podent també emprar-se la catalana en les Assemblees.

Art. onzè.—Aquesta «F. C. d'E.» podrà actuar mentre compti amb dues col·lectivitats organitzades o trenta membres isolats. En cas de dissolució, previ acord d'ella, l'actiu existent serà lliurat al caixer de la Constant Representació de les Societats Nacionals Esperantistes.

Art. transitori.—La «F. C. d'E.» serà domiciliada a Barcelona carrer València, 245.

Noves edicions

AUSTRALIO, Lando kaj popolo (Delsudo-Laiho).

31 il·lustracions i un mapa. 96 planes de text. Enquadernat luxosament amb tela. Preu: 9'75 pessetes.

HISTORIO DE LA LINGVO ESPERANTO. 1.^a part (Privat) 1887-1900. 74 planes. En rústica 2'40 pessetes i en tela 5'25 ptes.

II.^a part 1900-1927. 199 planes. Luxosament enquadernat en tela. Preu: 9 pessetes.

LA SANKTA BIBLIO. L'Antic Testament traduït de l'hebreu pel Dr. Zamenhof, junt amb el Nou Testament, tot en un sol llibre.

Amb paper sense cos, enquadernat amb tela 9 pessetes

Amb paper prim i amb or enquad. amb tela 12'75 id.

Enquadernat amb tela granet fosc 18'75 id.

Enquadernat amb pell amb puntes reforçades 30'00 id.

Nota: Cal afegir el 5 per cent dels preus senyalats, per les despeses de correu, en cas d'ésser els llibres enviats fora de Barcelona. Cal que l'adreça sigui ben clara.

Dirigir-se a Ferd. MONTSERRAT, Villarroel, 107, 2.^o, 2.^a Barcelona. IBERIA ESPERANTO SERVO.

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA ESPERANTISTA
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

L' Esperanto i les parles estrangeres

Un francès i un alemany conversen en anglès, un rus i un húngar en francès, un italià i un japonés en alemany. Com funciona llavors la llengua estrangera comparant-la amb l'Esperanto? Malament, molt malament en la major part dels casos. Com a excepcions evidents deixem per exemple als diplomàtics qui han passat potser deu anys a París, Berlín o bé Londres. Però ni aixís i tot, la qualitat no es perfecta. I dels mil els 999 exemples son mes aviat depriments. Els interlocutors han après la llengua en alguna escola o tal vegada passant alguns mesos a l'estranger.

La qualitat de la conversa es migrada: la molèstia, la confusió, la por d'equivocarse, l'emprament inadequat de expressions nacionals, la diferència de pronunciació (sobretot notable en la llengua anglesa). Mentres dura la conversa, els interlocutors es veuen dominats per la llengua emprada amb les seves tradicions, característiques, idiotismes i irregularitats.

Quan es conversa en Esperanto, passa al revés: l'home domina el seu instrument de conversa i ja no se sent esclau de la parla. Al contrari, el seu pensament crea i disposa constantment les frases que necessita. Vertaderament seü damunt la cadira i no pas la cadira damunt seu. Aquesta és la diferència principal, i no cal dir-ho, essencial.

EDMOND PRIVAT.

"KATALUNA ESPERANTISTO"

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTISTA FEDERACIO

Membra kotizajo: 3'50 p.; Grupoj: 1'20 por membro.

Jarabono: 6 p. enlande kaj 6 sv. fr. internacie, provekzemplero 2 respondkuponoj.

Federacia sidejo kaj redaktejo: carrer València, 245-BARCELONA

LA DEK DEVOJ DE LA ESPERANTISTO

1. Bone sciu la lingvon, traktu ĝin kun respekto, kaj lasu la versfaradon al poetoj.

2. Esperanton uzu parolante, studu legante kaj ne fuŝu skribante.

3. La plibonigistoj diskutu; vi Fundamenton sekvu kaj fide-la restu.

4. Propagandu ĉiam, ne ĉie; klarigu, ne prediku; rakontu faktojn, ne esperojn.

5. Kion vi povas lerni nur en unu semajno, ne instruu en unu horo; el malgravajoj ne faru regulon, kaj el la regulo ne faru malgravajon.

6. Verkante en Esperanto, ne kredis interesa, kion nacilingve neniu legus; ne imagu, ke preseraroj plibeligas libron, ne malesperu, se mankas aĉetantoj.

7. Al grupo aliĝu; la kunvenon vizitu; Esperanton parolu. Subtenu K. E. F.

8. Atentu, ke internacia lingvo vivos nur per uzado; memoru, ke tial internacia organizaĵo estas necesa, senlace varbu por U. E. A.

9. Legu gazeton, por ke vi konu faktojn; novajn abonu, por ke ĝi povu ekzisti; kunlaboru, por ke ĝi estu interesa.

10. Por Esperanto kiel movado agu; por ĝi kiel realaĵo pagu, kaj kiel altan idealon konservu ĝin en via koro.



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA ESPERANTISTA FEDERACIO
KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gitaro* Redakcio: *Carrer València 245 BARCELONA*

DIREKTORO: MARIAN SOLÁ

La Urbo de la XV^a. Kongreso de la K. E. F. kaj de la XIV.^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj Vinaroç: Deveno kaj disvolviĝo

(Daŭrigo)

De tiu dato ni povas diri ke la moderna urbo Vinaroç ekestis.

Denove la pratempa ilearkona spirito de ĝiaj loĝantoj amantaj la landon, renaskiĝas; kaj pro ĝia senlaca kaj progresema puŝo nia vilaĝo disvolviĝadaŝ ankaŭ favorita de ĝia enviata topografia situacio, milda klimato, fruktoĉona grundo kaj kvieta maro; tiel same kiel elkrekas la plej malforta planto pro la favoranta helpo de taŭga kulturado malavare kunaganta kun la suma varmo kaj la bonfaranta pluvo kiu proponas la abundan malsekecon por ĝia suko...

Jen kiel, la malgranda kabanaro rapide ŝanĝiĝis en ĉarma urbo konsistanta el la nuna Ĉefa Strato kaj apudaj stratoj, formantaj perfektan kvarangulon ĉirkauitan de potencaj muroj kaj kun fortikaj turoj en siaj anguloj por defendo kaj du pordegoj, unu antaŭ la maro, de kiu devenas ĝia nomo kaj alia en kontraŭa flanko kaj nomita de la Suno.

Poste, kun la jaroj ĝi pligrandiĝis per konstruado de diversaj kvartaloj: pli poste malaperis la unua murcirklo, ĝis kiam iom post iom progresante ĝi atingis la nunan staton kiun nia rapida priskribo ne permesas al ni pli detale preparoli.

RIMARKINDAJ FAKTOJ

Kiel rememorindaj faktoj en la historio de Vinaroç ni povas citi la jenajn:

La alveno de Pimentel, grafo de Benavente, al nia marbordo, cedante al ni bonvole la adoratan relikvon de Sankta Sebastiano, kiu poste fariĝis nia amata Patrono.

Tio okazis kun granda pompo kaj solenaĵo, kaj kiel rememoro de tiu festo troviĝas en la ermitejo granda olepentraĵo.

La diversaj vizitoj de la papo Benedikto XIII^a (Pedro de Luna) al nia vilaĝo kaj al la ermitejo de la Virgulino de Kompato; unu okazis en la festo de Sankta Sebastiano kaj li akompanis kun granda pompo la procesion.

Kiel memorajo estas konservata ankoraŭ en la ermitejo la seĝo en kiu li sidiĝis, konata kiel la «Seĝo de la papo Luna».

La partopreno en la Kompromiso de Caspe pro la elekto de reĝo de Aragono, per la perado de Sankta Vicens Ferrer, deputito de nia urbo kaj gravega persono en tiu historia afero. La rezultato de tiu Kompromiso estis la elekto de Fernando de Antequera kandidato de Sankta Vicens.

En la batalo de Las Germanias, partoprenis ankaŭ Vinaroĉ por la imperiestro; unu el ĝiaj militfaktoj estis la atako kiun ĝiaj militistoj kune kun tiuj el Benicarló, Traiguera kaj Morella entreprenis kontraŭ la vilaĝo San Mateo, pro la mortigo de provincestro Zaera.

Citinda estas ankaŭ la fakto ke la senmorta Cervantes enŝipiĝis en tiu ĉi marbordo por partopreni la batalon de Lepanto.

En Marto 1599 elŝipiĝis tie-ĉi kun ĉeesto de granda rondo da ŝipoj, ŝia moŝto la princino Margarita de Austria por edziniĝi al la reĝo Filipo III^a.

Pro tio la Kortego kaj granda nombro da prelatoj kaj gravaj personoj venis en nian urbon.

Ĝi batalis poste kontraŭ la berberoj kiuj denove infektis la Mediteraneon, kaj rabis la marbordojn de Katalunujo, Valencio kaj Andaluzio. En tiu tempo Vinaroĉ posedas urban militistaron kun infanterio, kavalerio kaj artilerio, krom militfregaton nomitan Vinaroĉ kaj ceterajn pli malgrandajn ŝipojn kiuj armiĝis por helpo kiam la nombro de malamikaj ŝipoj estis granda.

Kiam oni forpelis la maŭridojn el la Valencía regno, por ilia enŝipigo estis destinitaj la havenoj de Alicante, Denia, Grao de Valencio kaj Vinaroĉ; ilia nombro en nia haveno atingis pli ol dudek mil.

Ankaŭ partoprenis Vinaroĉ en la milito por la trono de Hispa-

nujo kaj favore al Filipo V^a.; kaj en tiu ĉi urbo kie loĝis la stabo mortis la generalestro Duko de Vendome; lia kadavro kuŝas en tombo interne de nia paroĥa templo.

Pli poste Vinaroĉ batalis en ĉiuj enlandaj militoj por la libereco; gloron ĝi atingis sur la kampoj de Alcanar kontraŭ la ribeluloj de Cabrera kaj defendante la loĝantojn de tiu urbo. En tiu memorinda okazo mortis noblaj urbanoj, martiroj pro la libereco, kies nomoj por eterna memoro estis gravuritaj en la granda salono de nia Urbestrejo.

Daniel D. DELMAS.

Trad. S. CHALER.

La konfeso de l' sonoriloj de Henri Barbusse

La printempo floris sur la maro.

Verdire, ne estis jam printempo, sed nur la unua el la belaj tagoj, kiuj sin riskas dum la vintro, kiel aperaĵoj, por anonci, ke la belega sezono revenos, kaj ke oni malpravis dubante pri ĝia reveno.

De la sonorileja altaĵo, la sonorigisto rigardis la mirindan promeson de tiu mateno, ankoraŭ kaptita en la grizaj tagoj. Sed la viro restis indiferenta antaŭ la spektaklo de la facetoplana maro, kovrita de revoforoj kaj malpezaj steloj. Ĉu la plibeligo de la naturo ankoraŭ gravis por li!... Li estis la malriĉa koro por kiu tiu riĉeco ne plu ekzistas.

Vane la maro sin miksis kun la ĉielo, kaj penis malvolvi ĉiun el siaj ondoŝtofoj, kaj provi rapidege ĉiujn ornamaĵojn, kiujn al ŝi donis la suno... La rigardojn de Beppo trudokupis neforigebla ombro: tiu, kiun lasis Bianca, la plej bela el la pasantinoj, kiu pasis kaj foriris. Kaj, kvankam la malgranda superbela promenantino de lia vivo malaperis, ŝia ombro restis inter li kaj ĉiu aĵo, pli granda ol l'Adriatiko, pli granda ol la estonteco, — tiel granda kiel la tombo.

Jam de tri jaroj komenciĝis la disiĝo, kiu neniam plu finiĝos, — tri jaroj de kiam la oranĝkolora velo de la barko tro kara plimalgrandiĝis, ĝis ĝi nur aspektis kiel mortinta folio, droninta en la distancojn de la maro.

Kaj certe estis, ke ŝi neniam plu revenos. Ŝia foresto estis pli terura ol la morto: Ŝi amis alian viron, kun nomo malbenita. Estis pro iu alia, ke ŝi estis tiel koketema kaj tiel bela, kun sia freŝa buŝo, kiu brilis kelkfoje tiom, kiom ŝiaj okuloj. Estis al iu alia, ke ŝi oferis siajn ĉagrenojn kaj larmojn; estis al iu alia, ke li vidis ŝin ridi, tiel kruele por la ceteraj viroj, iun vesperon, en la paradizo de malgranda kampo.

Beppo estis el la raso de tiuj, kiuj ne kapablas krei sian doloron, kiuj ne povas plendi, kaj kiuj tro bone scias plori... Li sopiris, deturnis siajn okulojn, vunditajn pro la brilego, pro la logo de tiu mateno, kiu pruvis la nepran revenon de la somero. Poste, ĉar la nigra linio kiu promenas, kvazaŭ maldika fingro, sur la ciferplato de la sunhorloĝo alkroĉita ĉe la kruta muro de la sonorilejo, montris la horon, Beppo sin levis, kaj iris sonorigi la sonorilojn.

Li sonorigis diligente, pro tio, ke estas lia laboro kaj la privilegio de lia ekzisto. Kiel oni devige rediras frazon, kiun oni ne aŭ ne plu komprenas, li paroligis la gigantojn pendantajn tie supre, grande malfermitajn kiel kupoloj en la kupolo de lazuro. Elrevigita, li dissendis plenumon l'esperon en la dolĉan malproksimecon.

Sed, forirantaj de li, la grandaj batoj ricevis ian melankolion. Kontraŭvole, lia rezignacio aŭdiĝis en la sonorado, kiun li vivigis. Liaj sonoriloj vibris pli malgaje ol la aliaj sonoriloj. Estis kvazaŭ li, la silentema, la muta, estus laŭte parolinta; kvazaŭ li estus krinita la DE PROFUNDIS de sia neutiligita amemo, de sia juneco, kiu al nenies feliĉo profitus, —kaj kiu tamen sanktan amon estus doninta, se la dia pasantino estus ĝin elaudinta!... Neeble estis, ke li ne ĵetu al la vento, kun la vasta alvoko, iom el la cindroj de sia koro.

La ceteron de la tago, —inter la sonoradoj,— li silentis, profunde. Li preskaŭ ne rilatis kun la homoj. Lokita en la altaĵo de la sonorilaro, li estis la gardisto de lumturo tre malnova, tre pridiskutata, al kiu la tervojaĝantoj ne plu fidis. Kaj, tia kia la gardistoj de nealireblaj lumturoj, li vivis apartigita de la vivo kaj vivantoj, kiujn li timis, preskaŭ ne moviĝante en sia niĉo, kies spaco formis unu el la muroj. —kaj neniam forlasis la preĝejon. Apenaŭ, de tempo al tempo, la malliberulo, punita ĉar li tiom amis, trovis la okazon paroli kun la vilaĝestra Moŝto, lia reĝo, kaj kun la pastra Moŝto, lia papo.

...Tiun tagon, la voĉo de l'sonoriloj kiu serĉis la piulojn, pli ol iam kortuŝis animon, kiu rigardadis la kampojn ĉe la rando de du grandaj okuloj.

Estis l'animo de Lazarette Moselli, animo malfeliĉa inter ĉiuj, kvankam bela kaj ornamita per anĝela vizaĝo.

Estas ĉar Lazarette, portis en si grandan, finiĝintan revon. Tiu revo havis la formon nekompereblan de la juna fremdulo, kiu kondukis, tre malproksimen nun, la aŭtomobilon de la princo della Scalla.

Tutan sezonon, li pasigis sur la vojojn, majeste sidanta sur la antaŭaĵo de la stranga veturilo, kiel antaŭkila figuraĵo. —kaj tutan sezonon, ŝi lin rigardis, apoginta sur muro aŭ arbo, duonsvenanta kiel kaptita birdo, kiu vidas alproksimiĝi la kaptiston, kaj ŝi ne kuraĝis reteni sian frenezan ekscitiĝon por ne montri sian koron. Kelkajn fojojn, la bela piloto de la princa veturilo alparolis ŝin, kaj

dufoje, ŝi lin vidis de proksime kun liaj belaj francmodaj lipharoj, disfalditaj kiel la flugiloj defluganta falko... Poste li forflugis sur la magia ĉaro, kiu lin obeis. Kaj estis ĝuste pro lia bildo ke ŝi ne plu povis resaniĝi.

Kiom, de tiam, la mondo ŝanĝiĝis! Ŝiaj ridoj foriĝis, ŝiaj paroloj maloftiĝis, ŝia sorto mallarĝiĝis, malvastiĝis ĉirkaŭ ŝia domo. Ŝi tie vivis en la seka ombro de la maljuna Anna, de kiu ŝi iom estis la nevino, kaj multe la servistino.— kaj kiu estis paralizita, sed disputema. El la malhela domo kun kelaj muroj ŝi foriris nur kiam estis necese, por iri sur la marbordan krutaĵon, kie ŝi deŝiris la flo-rojn, kiujn bezonas majstro Mateo, la sperta kreskajokolektanto, aŭ por konduki la kaprinon Giralda, kiu perfekte egaligis la velu-ron de l'herbo ĉirkaŭ sia paliso.

Ŝi estis tiel bela kiel antaŭe; funebro ne sukcesas tuj forviŝi la belecon; la plej eta sunradio ŝin ornamis kiel talismano, kaj igis ŝin simila al rozo kapvestita per papavo. Sed ŝi interesiĝis pri nenio kaj neniu; ŝi eĉ ne rimarkis kiom ĉarma estas ŝia spegulo, kiam, okaze, ŝi ĝin rekte rigardis.

Ŝin kortuŝis nur la voĉo de la sonoriloj de Sankta Tomaso, ĉar, en la mirinda subtileco de sia ĉagreno, ŝi kredis percepti en ili tion, kio efektive estis: maldikajn pecojn de homa ĝemo apenaŭ malrapidiginta la ritmon, kaj konfuzan impreson de malgaja rezignacio. Kvankam la paroloj, kiuj radiis de la preĝejo, estis la solaj, kiujn ŝi aŭskultis,— ĉar ili estis malgajaj kaj pravaj,— Lazarette timis iri preĝejon. Ŝi eĉ evitis laŭiri la vojon, ĉe kies fino atendas la portreto el blanka ŝtono. Ĉu la doloro de ŝia koro hontigis ŝin, aŭ, ĉu funde de si mem, ŝi timis, ke oni ŝin demandos, ke ŝi forgesu aŭ bedaŭru la tagojn, kiujn l'amo turmentis?...

...Estas tiam ke, post la aliaj dimanĉoj, alvenis kiel belega grandsinjoro, la Paskotago...

Ĝi komenciĝis per tiom da suno kaj parfumoj, ke ĉiu ektemis pro kontenteco, eĉ Scafino, la malgranda ŝuoflikisto kiu, je la sepa matene, haltis sian frapadon por aŭskulti la tumulton, kiun lia koro faras en lia mallarĝa tubforma torso,— kaj eĉ la maljuna Anna, kies sekigita korpon, similan je robo pendita ĉe najlo, sopiro movigis!

Kaj Beppo, kiam li pretiĝis por sonorigi la sonorilojn, en la lumplena turo, sentis tremantan ĝojon, strangan ĝojon, maljustan ĝojon, kiu plenigas lian bruston... Mirigite, li konstatis ke li ne plu estas sama... Kio estas tiu nova forto, tiu nova espero, tiuj koloroj pli belaj, kiuj troviĝas sur ĉio?

Li, kontraŭvole, reviviĝis. Li sentis, malgraŭ la peza estinteco, ke lia koro, tro frue endormiĝinta, sin relevas kaj revekiĝas. Lia juneco sin trudis al li, kiel fataleco, kaj igis lin vivtremi.

Ĉu miraklo dia, aŭ miraklo homa tute simple?...

Ciaokaze, la kanto de la sonoriloj, kiu eliris de li, estis pli vibranta kaj feliĉa. La granda ŝvebanta voĉo anoncis, ke la vivo estas venko super la morto, kaj ke l'espero estas venko super vivo.

Kaj tie, Lazarette, aŭdante tiujn parolojn de la sonoriloj, tremis en tuta sia juna doloro. Ŝi malfermis sian fenestron, kiu donas vidon sur la herbejo en dimanĉa vestado de florantaj pomujoj. L'eterna malgajulino pli antaŭen kliniĝis, al l'abismo de lumo, por aŭskulti la ŝanĝitan voĉon; ŝi kliniĝis, unue sendecida, poste, iom post iom, ŝi aŭskultis pli, ŝi aŭskultis pli bone...

Tial, tiun tagon, la unuan fojan post tiom da jaroj, Lazarette iris al preĝejo... Ŝi marŝis tra la vojoj, trovante la ĉielon pli bela ol ŝi fine kredis. Sur sia veturilo, kiu baris la vojon, la dika Biasco multegegadis komike, kaj tiu ridigaĵo igis ŝin ridi... Al knabineto, kiu ŝin salutis, ŝi respondis: bonan tagon, kiel ŝi dirus dankon.

Ŝi preskaŭ alvenis ĉe la preĝejo, kaj malrapidis, impresigita pro ĝia alteco, kiam ŝi rimarkis iun, kiu ŝtelire forlasas ĝin.

Estis li. Li decidis forlasi sian niĉon, eniri plene en la mezon de la bonodora kaj radia vivo, tuŝi la varmetecon kiu pasas, kaj la parfumojn kiuj supreniras.

Tiel ili preskaŭ iris unu al la alia. Ili preterpasis kaj hazarde rigardis unu la alian samtempe. Ebriiga rozoparfumo ĝustatempe venis por daŭrigi, dum momento, la rigardon, kiun interŝanĝis tiuj du venkitaĵaj kreitaĵoj, kiuj ne plu povis resti tiaj.

Ili estis tiel similaj, ĉiu kun sia duono da amo, ke ili tute devis sin koni dum la momento, kiam iliaj okuloj sin fiksas reciproke...

Ciaokaze, kelkajn horojn poste, vespere, unu el ili tien revenis, iom atendis, kaj la alia ankaŭ revenis.

La vespera ombro kaŝis sub sia flugilo ilian komunan ruĝecon. Poste ĝi pli bone faris: ĝi, kiu plisimpligas kaj pliproksimigas, ĝi pruvis ke, kiel ajn nekonataj ili estis unu por la alia, kiel ajn fremdaj, tamen en iliaj profundaj vizaĝoj io estas, kiun ili ŝajnis rekonii; ĝi montris al ili, ke ili havas reciprokajn similecon, ne kiam oni ilin rigardas, sed kiam ili rigardas unu la alian...

Tradukis kun la permeso de la verkisto.

S-INO LUCETTE FAES.

Menciita en la XIII^aj Internaciaj Floraj Ludoj.

Bibliografio

LA KANTO DE LA KOSMOPOLITO.—Muzikajo dediĉata «al la alta memoro de Plato kaj lia famega majstro Sokrato». Aĉetebla ĉe la aŭtoro, Johano Thiery, Rabotstrato, 16, Gento (Belgujo). Prezo ne montrita.

La teksto de la kanto kiu estas en la lasta paĝo estas en esperanta, flandra kaj franca lingvoj, kaj mi dezirus scii se la originalo estas en flandra aŭ franca lingvo. Certe ĝi ne estas en esperanta. Ĉar tion legante mi preskaŭ kaptuniĝis. Kiel pruvo, bonvolu diri al mi, kara leganto, la signifon de la versaĵo:

«Ĉiuj veraj kosmopolit postul':
L' rajt' ĝis skrib' per l' tribunoj liberaj,
Ki' ĝis nun'ec' konduk' el'ktas il',
Frank' kaj lib'ratut' en l'publika:
L' fav' roreg' d' kiel l' malpraveco fari,
Trovas ili tre tre ma-aljusta,
Por soldatoj mil'to kaj kulto,
Bal'tas il'nen mono ĉar l' 'stas krim'!»

Ĉu vi komprenis? Mi ne. Eĉ mi ne povis kompreni kiel oni povas elparoli l' kaj d'. Kaj kiel tiu ĉi estas aliaj tri strofoj kaj la rekantaĵo «solene jejuranta». Sed la aŭtoro, eble jam plene konvinkita ke oni ne kaptos la sencon, en la lasta paĝo aldonas la forigitajn literojn kaj tiel la antaŭa nekomprenebla versaĵo transformiĝas jene:

«Ĉiuj veraj kosmopolitoj postulas:
La rajto ĝis skribi per la tribunoj liberaj,
kio ĝis unueco kondukas elektas ili,
Franko kaj libera tute en la publika:
La favororega do kiel la malpraveco fari.
Trovas ili tre tre ma-aljusta.
Por soldatoj milito kaj kulto,
Balotas ili neniam mono ĉar la estas krimo!»

Kaj malgraŭ la klarigo... mi preskaŭ ne komprenis ion. Ĉu mi estus stultulo? Ĉu la aŭtoro verkas aŭ tradukas en volapük?...

Kontraŭe la melodio estas por mi tre agrabla, tre belsona kaj tre facila. La pianparto povas esti ludata de infano, tiel ĝi estas naiva.

Meze de la titolpaĝo estas desegnita parto de la terglobo kun tiu impona devizo: «La Meditado kondukas al l'Amo. l'Amo kondukas al la Fratigo. La Fratigo kondukas al la Mondpaco. »Do, ni meditadu... la versaĵojn de la aŭtoro.—*Kodo*.

Reĝo Johano

KLARIGO DE LA TRADUKINTO.

ARTURO juna princo kiu laŭrajte devus heredi, en la jaro 1199, la anglan tronon, sed estas malliberigita de sia onklo, la uzurpinta

Reĝo Johano

HUBERTO, la gardisto de la princo.

REĜO JOHANO

AKTO IV.

Sceno I.

Northampton. Ĉambro en la Kastelo.
Venas Huberto kaj du Sekvistoj.

HUB.: Varmigu brule tiujn ĉi feraĵojn;
kaj post la murpendaĵo vin starigu:
kiam ni teren frapos per piedo,
elkuru, kaj al seĝo forte ligu,
la knabon, kiun apud mi vi trovos.
Tre zorgaj estu. For! kaj staru garde.

UNUA SEKVISTO: Esperas mi ke via rajtigilo
la faron senkulpigos.

HUB.: Hontaj duboj!
Ne vi: sed zorgu kaj atentu.
(Foriras Sekvistoj)
Elvenu, knab'; al vi mi ion diros.
(Venas Arturo)

ART.: Hubert', bontagon.

HUB.: Bontagon, princ' malgranda.

ART.: Malgranda kiel eble princo, kvankan
kun rajto esti multe pli grandega.
Malĝoja estas vi.

HUB.: Mi certe estis
foje pli gaja.

ART.: Mi pensas, ke neniu
malĝoja devus esti, kron mi mem.
Sed mi memoras, kiam en Francujo
loĝadis mi, sinjoroj junaj estis
malĝojaj kiel nokt', nur pro petolo.
Se estus mi libera kaj ŝafisto,
mi estus gaja dum la tuta tago;

kaj tia povus esti mi ĉi tie,
 se mi ne timus ke malbonon pluan
 komplotas kontraŭ mi la onklo mia.
 Li timas min, kaj ankaŭ mi lin timas.
 Ke estas mi la filo de Gefrio,
 ĉu mi kulpigas? Ne, plej certe, ne.
 Ĉiel'! Mi volus esti via filo,
 se vi pro tio amus min, Huberto.

HUB.: (al si mem): Se mi aŭskultos lian babiladon
 senkulpan, vekos li kompaton mian,
 kiu servive kuŝas. Mi rapidu.

ART.: Ĉu vi malsanas? Vi aspektas pala:
 ja volas mi ke vi malsanetiĝu,
 ke povu mi sendorme tra la nokto
 vin flegi: vetas mi; ke mi vin anas
 pli ol vi amas min.

HUB.: (al si mem): Paroloj liaj
 subpremas mian bruston. (Al li) Legu tion.
 (Montras paperon)

(Al si mem) Malsaĝa okulakvo. kiel do?
 Forpelas vi torturon senkompatan.
 Mi devas ja rapidi, ke decido
 ne falu el okul' en larm' virina.
 Ĉu vi ne povas legi? Ĉu ĝi ne
 skribita bone estas?

ART.: Ho, Huberto,
 tro bone por efekt' malbona tia.
 Vi devas la okulojn forbruligi
 per varma fero?

HUB.: Knabo, mi ja devas.

ART.: Kaj ĉu vi tion faros?

HUB.: Mi ĝin faros.

ART.: Ĉu havas vi la volon? Kiam vi
 nur kapdoloron sentis, mi poŝtukon
 sur via frunto ligis, la plej belan
 kiun mi havis,—brodis ĝin princino—
 kaj mi neniam ĝin al vi repetis.
 Mi mane tenis vian kapon nokte,
 kaj kiel gardminutoj al la horo.
 de temp' al temp' denove vin konsolis,
 dirante, «Kio al vi mankas? Kie
 doloro kuŝas? Kion bonan faru mi?»
 Multaj malriĉulidoj eble kuŝus,
 kaj ne parolus al vi aman vorton;
 sed vi por vin flegservi havis princon.

Vi eble pensas mian amon ruza,
 kaj nomas ĝin perfida; nu, laŭvole!
 Se plaĉas al ĉiel' ke vi min traktu
 malbone, nu, nenio helpas. Ĉu vi
 okulojn miajn forbruligos? tiujn,
 kiuj neniam vin rigardis akre,
 nek iam faros tion.

- HUB.: Mi ĝin juris,
 kaj per varmegaj feroj vin blindigos.
- ART.: Ha, nur en tiu ĉi epoko fera
 troviĝus iu, kiu tion farus.
 La fero sola, kvankam ruĝe brula,
 proksimiĝante al okuloj miaj,
 la larmojn trinkus, kaj estingus fajron,
 eĉ en la flu' de mia senkulpeco;
 post tio eĉ en rusto konsumiĝos,
 pro tio, ke ĝi havis fajron por min vundi.
 Ĉu estas vi ol fero pli malmola?
 Se venus min anĝelo kaj min dirus,
 «Huberto forbruligos la okulojn»,
 mi lin ne kredus; nek alian langon,
 krom tiu de Huberto, nure lian.
- HUB.: (Piedfrapas la teron): Elvenu!
 (Revenas Sekvistoj, kun ŝnuro, feraĵoj, k.t.p.)
- HUB.: Faru kiel mi ordonis.
- ART.: Ho savu min, Huberto! savu min!
 Blindiĝis la okul' nur pro l'aspekto
 feroca de mortigemuloj tiuj.
- HUB.: Al mi la feron donu, kaj lin ligu.
- ART.: Ve! Kial esti tiel perfortega?
 Mi ne baraktos; staros mi senmove.
 Pro la ĉiel'. Hubert, mi ne ligiĝu!
 Huberto, aŭdu min; forpelu ilin,
 kaj sidos mi kiel ŝafid' trankvila:
 ne nomos min, nek diros unu vorton,
 nek akre rigardetos la feraĵon.
 Nur pelu for ĉi tiujn virojn, kaj
 mi vere vin pardonos, spite ĉia
 turmento kian ajn al mi vi faros.
- HUB.: For, kaj ekstere staru; lasu nin.
- UNUA SEK.: Al mi tre plaĉas lasi tian faron.
 (Foriras Sekvistoj)
- ART.: Ho ve! Do mi riproĉis for amikon.
 Kvankam severe li aspektas, tamen

- li havas mildan koron. Li revenu,
por ke kompatu lia veku vian.
- HUB.: Nu knabo, vin pretigu.
- ART.: Ĉu ne estas
kontraŭrimed'?
- HUB.: Nenia. Vi ja devas
l'okulojn perdi.
- ART.: Ho ĉiel'! ke estu
en viaj nur grajneto, polvereto,
aŭ kulo, har' vaganta, la ĝeno
en tiu kara sento: se vi spertus
kiel turmentas tie tiaj etaĵoj,
intenco via ŝajnus ja terura.
- HUB.: Promesis vi. La langon silentigu.
- ART.: Hubert', du da langoj nepre devas
por du da okuloj fari pledon.
La langon mi ne silentigu, ne!
Aŭ, se vi volas, tranĉu for la langon;
mi tenu la okulojn. Savu ilin,
se nur ke mi ankoraŭ vin rigardu.
Jen, je la ver', la ilo malvarmigis
kaj ne difektus min!
- HUB.: Mi povas ĝin varmigi.
- ART.: Ne, je la vero, jam la fajro mem,
kreite por komforto, estingiĝis
pro honto esti tiel misuzata.
Vi vidu mem; malice ne troviĝas
en la brulanta karb'; ĉiela spiro
forblovis la spiriton, kaj disverŝis
sur ĝia kapo cindrojn de pentado.
- HUB.: Per mia spir' mi povas ĝin vivigi.
- ART.: Farante tion, ĝin vi nur ruĝigos
pro honto pri procedoj de Huberto.
Ne, eble ĝi ekbrilos kontraŭ vi,
kaj, kiel hund' batalen devigata,
ekmordos mastron kiu lin incitas.
Ĉio, kion vi uzus por min vundi,
rifuzas la oficon; nur al vi
mankas kompatu, kiun fer' kaj fajro
elmontras, spite krueluzo famo.
- HUB.: Nu, vi vidadu! La okulojn viajn
ne tuŝos mi pro tuta la trezoro
apartenanta al la onklo via.
Mi tamen juris, kaj intencis, knabo,
per tiu fero forbruligi ilin.

ART.: Ho, jam aspektas vi kiel Huberto;
ĝis nun vi ŝajnis esti aliulo.

HUB.: Silentu! Ne parolu plu. Adiaŭ!
La onklo devos pensi ke vi mortis.
Raportos false mi al tiuj viroj:
kaj, bela knabo, dormu en konfido
ke pro riĉeco de la tuta mondo
mi ne difektos vin.

ART.: Mi dankas vin, Huberto.

HUB.: Silentu: vi kun mi envenu kaŝe.
Pro vi mi riskas multe da danĝero.

(Ili foriras)

F-INO LOUISE BRIGGS.

Premiita en la XIII^a Internaciaj Floraj Ludoj.

Skizo de Humanista Historio

(Fino)

KEMIO, MEDICINO, HIGIENO

La mezepoka *alkemio* donis vivon al du novaj sciencoj: al la kemio kaj al la medicino. Ni scias jam, ke la alkemiistoj serĉis komence la metodon por fabriki oron el aliaj metaloj kaj poste ili serĉis, kiamaniere oni povus plilongigi la homan vivon. La universala materio, kion ili serĉis, kaj por la fabrikado de la oro, kaj por la plilongigo de la vivo, estis la «ŝtono de saĝuloj».

La medicino komenciĝis do el la kemiaj konoj. La unuaj kuracistoj estis alkemiistoj kaj iom poste kemiistoj: ili esploris, kiajn efikojn faras la kemiaj materialoj sur la homan korpon. Ili volis kuraci ĉiujn malsanojn per kemiaj reakcioj. Tiu ĉi scienco, aŭ preskaŭ-scienco nomiĝas *iatrokemio*. La plej granda sistemiganto de tiu ĉi scienco estas *Paracelsus*, kiu estas unu el la plej grandaj kuracistoj de la homaro. Li naskiĝis en la fino de la XV. a jarcento en Svisujo; ĝis sia tridekjara aĝo li studis kaj kuracis en pluraj Eŭropaj landoj. Reveninte en Svisujon, li fariĝis profesoro de la Universitato en Basel. Li nur povis prelegi unu jaron, ĉar la oficiala opinio de la epoko ne toleris liajn novajn instruojn. La granda kuracisto mortis en 1541 en ekzilo. Lia influo al la scienca mondo de sia epoko estas decidiga. Li radikale deklaras, ke la ĝis tiamaj konoj egalvaloras ĉikanon kaj superstiĉon kaj li fondas la kuracistan sciencon sur kemian bazon. *Li estas vere la fondinto de la moderna medicino.*

Paracelsus ne ŝatis la oficialajn instruojn. Estas ĝenerale karaktero de epokfarantaj genioj, ke ili kontraŭstaras la akademiajn sciojn de sia epoko. Sed ni ne kredu, ke sufiĉas kontraŭdiri la konojn de nia epoko por fariĝi mem genio! La geniulo suferas dum

sia vivo por la verecoj, al kiu li kredas, kaj li fordonas sian scion al la posteularo, kiu estas preskaŭ ĉiam maldankema. La nomo mem de la geniulo estas forgesata kaj tio estas la kazo de tiu ĉi geniulo, kiu estis Paracelsus. Galenus kaj Avicenna estis konsiderataj de la epoko de Paracelsus kiel la plej grandaj kuracistoj. Paracelsus unu belan tagon bruligis la verkojn de tiuj ĉi profesoroj sur unu el la placoj de Basel. Sed li ne nur detruis, sed ankaŭ li konstruis. Malgraŭ, ke en nia epoko, liaj verkoj ne plu estas konsiderataj kiel studindaj, la unuaj vere efikaj medikamentoj venas de Paracelsus. Li estas la fondinto de la *eksperimenta metodo*, kiu estas verdire la komuna metodo de ĉiuj natursciencoj. Paracelsus faris scienccon el la superstiĉa medicino de sia epoko.

Sed ne nur en la medicino, ankaŭ en la kemio Paracelsus estas granda. Ĝis li, la sola klasigo de la metaloj distingis «noblajn» kaj malnoblajn metalojn. Paracelsus klasigis la metalojn laŭ la fleksebleco kaj laŭ la solideco kaj tiu ĉi klasigo postrestis ĝis niaj tagoj. Laŭ li, la sola celo de la kemio estas la preparado de medikamentoj kaj la celo de la kuracisto estas la eksperimentado per la medikamentoj. Li efektive elprovis ĉiujn medikamentojn de sia epoko. Li rekte rifuzis okupiĝi pri fabrikado de oro. Li estas vere la ekzekutinto de la alkemio.

La plejparto de la hodiaŭ aplikataj simplaj medikamentoj venas de Paracelsus. Li deklaris, ke oni nur bezonas por la kuracado la sukcon de la kreskaĵoj. Li eksperimentis per ĉiuspecaj vegetalaj sukcoj, li ne timis apliki eĉ fortajn venenojn. Krom la naturaj sukcoj, la sekvantoj de Paracelsus aplikis la tiam konatajn kemiajn materialojn, kiuj estas: plumbo, antimonio, kupro, fero, hidrargo. Poste oni aplikis la ceterajn elementojn, laŭ la marŝo de la kemia esplorado.

En la jaro 1591 aperis la *unua kemia lernolibro*. Ĝia verkinto estas Andreo Liebau. Li estas la eltrovinto de la metodo per kiu oni ĝis nun fabrikas la *sulfuran acidon*, kiu estas unu el la plej necesaj kemiaj produktaĵoj. Li estas ankaŭ inventisto de pluraj koloraj vitrosolvaĵoj, kiuj servas kiel bonegaj farboj. Tiu ĉi kemiisto estas la reprezentanto de la *pura kemio*. Apud li vivis en la sama epoko fama reprezentanto de la *medicina kemio*, disĉiplo de Paracelsus, nomita Johano Helmont. Tiu ĉi persono estas unu el la plej interesaj kaj li plej bone karakterizas la tiaman scienccon. Li estas miksaĵo de superstiĉa alkemiisto kaj de scienca kemiisto. Liaj verkoj estas plenplenaĵoj de stultaj asertoj, inter kiuj aperas de tempo al tempo geniaj inventoj. Ni nur diras ekzemple, ke li esploris la grandan problemon: de kie venas la musoj? Por respondi tiun ĉi «problemon» li faris plurajn eksperimentojn kaj li fine deklaris, ke «por *fari* musojn, oni devas meti malpurajn ĉemizojn en keston kaj oni devas verŝi sur ilin farunon». Sed, se ni ridas pri tiu ĉi erara aserto, ni

devas lin estimi por liaj seriozaj esploroj pri la gasoj kaj pri la aero. La vorto «gaso» estas lia esprimo. Li estas la unua persono, kiu sciis fari diferencigon inter aero, vaporo, gaso, akvovaporo, karbona gaso, ktp. Li observis la unuan fojon, ke la karbona acido estas la akompananto de ĉiuspeca putrado: tiel same ĉe la fermentado de la vino, kiel en la homa stomako. Depost li oni komencas kredi, ke la leĝoj kiuj valoras por la ekstera naturo, valoras ankaŭ por la homa organismo. La *principo de la moderna kuracado* estas vere, ke *la samaj reakcioj, kiuj okazas, en la naturo aŭ en la laboratorioj, okazas ankaŭ en la homa organismo.*

Georgo Agricola verkis 17 voluman enciklopedion pri la konoj de metalurgio de sia epoko. Li mortis en la jaro 1551. Li estas la unua granda metalurgo. Li kaptis la gasojn, kiuj liberigas ĉe la fandado de la mineralo kaj anstataŭ lasi ilin libere kaj venenigi la atmosferon de la laboristaj familioj, li kondensis ilin kaj fabrikis en ili sulfuron. Li perfektigis la procedojn, kiuj servas al la fandado de mineraloj, kiuj enhavas kupron, bismuton, antimonon, oron kaj arĝenton. Li ankaŭ ellaboris praktikajn metodojn por la ekspluatado de salaj, feraj, nitraj, k. a. minejoj. Ĝis la eltrovo de la vapormaŝino (komenco de la XIV.^a jarcento) liaj metodoj estis ĉie aplikataj, ne nur por la minejoj kaj por la metalurgio, sed ankaŭ por la racia agrikulturo.

En la XVIII.^a jarcento la medicino definitive disiĝas de la kemio. La kemiistoj rimarkis, ke la kemio havas aliajn celojn ol la kunmetadon de medikamentoj kaj la kuracistoj konvinkigis, ke oni povas uzi aliajn ol kemiajn metodojn por la kuracado. Tiu ĉi jarcento estas laŭta de grandaj sciencaj diskutoj. La ĉefa temo de tiuj ĉi diskutoj estis la tielnomata *teorio de la flogistono*. Multaj el la tiamaj profesoroj de kemio kredis, ke la flogistono estas tiu mistera gaso, kiu liberigas el la korpoj okaze de la brulo, dum la cindro postrestas. Diskutante pri tiu ĉi problemo de la brulo, kelkaj reprezentantoj de tiu ĉi teorio inventis novajn aferojn. Tiel la angla kemiisto Cavendish malkovris la hidrogenon. Jen estas bona ekzemplo, kiu pravas, ke eĉ la eraraj doktrinoj estas utilaj, se ili elvokas liberan diskutadon. Hodiaŭ ni scias, ke la tuta teorio de la flogistono estas erara. Kaj estis la *plej granda kemiisto de ĉiuj tempoj!* *Lavoisier*, kiu detruis la falsan teorion. Li estas la vera fondinto de la moderna kemio. Li eldiras la unuan fojon la aksiomon, ke la energio estas konstanta: same, kiel oni ne povas krei laboron, *oni ne povas krei aŭ detrui energion*. Ĉiuj fenomenoj nur estas *energiotransformiĝoj*.

En tiu ĉi epoko la eltrovoj pli kaj pli multiĝas. Oni kreas la grandajn porcelanajn manufakturaĵojn de Meissen kaj de Sèvres, oni kreas grandajn uzinojn por la tinkturado de ŝtofoj, k. a.

Post kiam la kemio kaj la medicino faris la unuajn grandajn

progresojn, la *higieno* naskiĝis. En la mezepoko la homoj vivis en nepriskribebla malpurajo. La kanaloj de la Romanoj estis jam detruitaj, neniam akvokondukiloj ekzistis. La pesta akvo de la lignaj kondukiloj—se ekzistis—la kompleta manko de la kanaloj, larĝe kontribuis al la disvastiĝo de teruraj epidemioj. Kiamaniere tiuj epidemioj ĉesis, kiamaniere la homa raso tute ne ekstermiĝis? Ni scias, ke okaze de la pestoj, ĥoleroj, varioloj, kaj aliaj epidemioj, la kadavroj preskaŭ kovris la stratojn. Hodiaŭ ni scias, kial la epidemioj tamen ĉesis, kaj mi ĝin diros: samkiel la bakterioj de la malsanoj propagiĝas per la akvo, kraĉaĵoj, manpremo, ktp. ekzistas en la homa sango malgrandaj materiaĵoj, kiujn la plej moderna *bakteriologio* nomas *bakteriofagoj*, bakterio-maĝantoj. Interesa propreco de tiuj ĉi bakteriofagoj estas, ke ili estas same kontagiaj kiel la bakterioj mem. Kiam epidemio atingas sian maksimumon, alia epidemio de bakteriofagoj disvastiĝas kaj detruas la bakteriojn. Ĝis la plej nova epoko oni kontentigis atendante la venon de tiuj ĉi bakteriofagoj kaj nur en la lasta tempo oni pripensis aliajn rimedojn kontraŭ la malsanoj kaj la epidemioj. La scienco, kiu konsistas el tiaj konoj, portas la nomon *higieno*.

Pasteur estas la nomo de la genia franca kemiisto kaj kuracisto, kiu ellaboris la teorion de la bakterioj. Li konsideris ilin kiel vivantajn organismojn, li kulturis kaj malsovaĝigis ilin. Sed li estas ĉefe konata por sia genia invento de la vakcino. Li rimarkis, ke la homo havas naturan kontraŭstarpon kontraŭ malsanoj kaj sufiĉas plifortigi tiun ĉi povon por defendi la homon kontraŭ malsonoj. Li atingis tiun ĉi per la vakcino, kiu konsistas el la inokulo de bakterioj en la homan sangan. La bakterio-fagoj kompreneble tuj ekatakas la envenintajn malgrandnombrajn malamikojn kaj post malforta krizo venkas ilin. sed la bakteriofagoj estas preparataj de la sango en granda nombro kaj ili postrestas. Kiam ajn poste bakterioj de la sama malsano invados la korpon, ili atakos kaj venkos ilin. Oni diras science, ke la vakcino donas *imunecon* al la korpo. *Pasteur* vere refondis la medicinon: la modernaj kliniko, hospitaloj kaj sanatorioj estus senefikaj aŭ eĉ danĝeraj sen la seninfektaj metodoj de *Pasteur*.

Moderna scienco estas ankaŭ la *urbanismo*. La higienaj problemoj prenas specialan gravecon en la urboj. La homoj tie estas kunpremitaj en plejparte malhigienaj loĝejoj. La urbanismo unuflanke studas, kiamaniere oni povas plibonigi la urban higienon, aliparte ĝi projektas la estontajn grandajn urbojn. Ni nur signalu tie ĉi la gravecon de du fakoj de la urbanismo: akvokondukiloj kaj kanaloj, forigo kaj utiligo de malpurajoj. Per la principo de la komunikigantaj vazoj oni instalas akvokondukilojn en ĉiuj grandaj urboj. La akvo estas pumpata en la tiel nomatajn akvoturojn, de kie ĝi de si mem

falas en la tubaron kaj suprenkuras al la etaĝoj. Multaj urboj posedas specialajn uzinojn por la utiligo de la malpurajoj kaj la enspezoj de tiuj uzinoj permesas tre regulan kaj higienan forigon de la malpurajoj, je la plej granda publika bono.

Ni vidas do ke kemio, medicino kaj higienio estas sciencoj kaj artoj, kiuj en siaj metodoj kaj en la multspecaj objektoj de siaj studadoj estas multe diversaj, sed kiuj havas ankoraŭ pli multe da komunaj trajtoj. Ne nur inter la diversaj homaj grupoj sed inter la sciencoj kaj teknikoj estas solidareco, kaj ni devas kredi kiel eternan verecon, ke ekzistas pli da komunaj trajtoj inter la homoj kaj inter la homaj produktoj, ol diversecoj!

LA ELEKTRECO.

Kiam ni parolis pri la Egiptanoj, ni diris, ke ili konis jam la atmosferan elektrecon, ke ili jam konstruis fulmoforigilon, kies pinton ili tute same oriziĝis kontraŭ la oksido kiel ni faras. En la Eŭropa kulturo la elektraĵoj ne estis konataj ĝis la greka filozofo *Thales* (640, a. K.) Li mencias la unuan fojon tiun proprecon de la sukceso, ke ĝi altiras malpezajn korpojn, kiam frotita. Tiun ĉi proprecon li nomis *elektrono* kaj de tie venas la nomo elektro. Post *Thales* ni nenion scias pli pri la elektraĵoj. Ŝajne la homoj tute ne plu okupiĝis pri elektraĵoj ĝis la XVI, a jarcento. Tiam *Gilbert*, kortega kuracisto de la angla reĝino Elizabeto, komencis siajn eksperimentojn. *Gilbert* okupiĝis pri la t. n. *statika* elektreco. Li kunfrotis ĉiuspecajn korpojn kaj li konstatis la konatajn fenomenojn de la elektra influo. Post *Gilbert* multaj fizikistoj eksperimentis pri statika elektreco kaj ili serĉis, kiamaniere oni povus fabriki pli grandajn kvantojn da statika elektreco. Pli bone dirite, ili serĉis tute simple pri elektreco, ĉar ili ne sciis ion pri la vera elektro, kiun ni nomas iom pli science elektra fluo, aŭ kurento. *Otto Guericke* urbestro de *Magdeburgo* konstruis la unuan elektran *generatoron*. li fandis sulfuron en vitran globon. Post la solidiĝo de la fandajo, li disrompis la vitran globon, puŝis stangon en la globon, kiu servis kiel rotacia akso. Turnante la globon ĉirkaŭ tiu ĉi akso, li kolektis elektrecon sur la globo per sia manplato. Se li estus forgesinta disrompi la vitran globon, li estus konstruinta multe pli perfektan elektran *generatoron*.

Cuneus riĉa amato malkovris tute hazarde la elektran *kondensatoron* aŭ la tiel nomitan botelon de *Leyden*. Tiu ĉi kondensatoro estas hodiaŭ uzata en ĉiu senfadena ricevaparato en iom alia formo. Pri ĝi oni lernas en ĉiu fizika kurso.

Sed la vera epokfaranta dato en la historio de la elektreco estas 1700. En tiu jaro *Ludoviko Galvani* jam fama profesoro de la biologio en la Universitato de *Bologna*, inventis la *elektran fluan*. Li

eksperimentis per dissekcado de ranoj; post sia biologia studo li metis la ranaĵn femurojn sur la kuprajn hokojn de sia fenestro. Li observis, ke la tranĉitaj femuroj de la rano faras strangajn movojn sur la hokoj kaj ankaŭ li rimarkis, ke la movoj estas pli rimarkeblaj en pluva ol en sunluma vetero. Volta estis geniulo, li ne penis klarigi la nove spertitan fenomenon per la konoj de sia epoko, sed li eksperimente serĉis kaj trovis la kaŭzojn de la fenomeno. Galvani atribuis tiun ĉi fenomenon al la atmosfera elektreco kaj li deklaris, ke la animalaj muskoloj estas kondukiloj de la elektra kurento tute same kiel metalaj fadenoj. Li do samtempe estas la unua asertanto de la besta elektreco, kiu estas unu el la plej modernaj sciencaj konceptoj. Galvani kredis, ke la kaŭzo de la fenomeno ĉi supre priskribita estas, ke la ranaĵn femuroj funkcias kiel kondensatoroj aŭ Leyden'aj boteloj. Tiu ĉi klarigo ne estis ĝusta kaj la vera klarigo devenas de la profesoro de fiziko en Pisa kies nomo estas same fama: *Volta*. Volta estas konsiderata kiel la fondinto de la *elektrotekniko*.

Volta pruvis, ke la kaŭzo de la movoj de la ranaĵn femuroj estas, ke du metaloj, kupro kaj fero (hoko kaj krado de la fenestro) tuŝas unu la alian. La kurento trapasas la nervojn de la femuro kaj movigas ilin. Volta konstruis la unuan baterion de elektraj piloj, kiu donis konsiderindan kvanton da elektreco.

Descartes, la genia filozofo de la nova epoko kredis ankoraŭ, ke la fulmo kaj la tondro rezultas el la kunpuŝiĝo (kolizio) de nuboj. Aliaj samepokanoj kredis, ke la fulmo-tondro rezultas el la eksplodo de brulgasoj, kiuj troviĝas en la atmosfero. *Well*, angla fizikisto rimarkis la unuan fojon en la jaro 1708, ke ekzistas analogio inter la elektrostatika sparko kaj la atmosfera fulmo. Sed estis *Benjamen Franklin*, fama amerika ŝtatisto kaj scienculo, kiu pruvis, ke efektive temas tie ĉi pri la sama fenomeno. Li ankaŭ konstruis la unuajn fulmoforigilojn, kiuj ĝis nun estas sukcese uzataj. Sur lia tombo oni gravuris la sekvantan enskribon:

«li rabis al la ĉielo la armilon de fulmo-tondro»

Tiŝi estas la nomo de la unua inventisto de maŝino, kiu funkcias per elektro. Lia maŝino ne estis sufiĉe efika. Por tiu celo oni en kondukis la tiel nomitan *dinamomaŝinon*. Ni ne povas tie ĉi doni teknikan instruadon, do ni nur diras, ke la dinamomaŝino kapablas funkciigi tutan aron da *elektromotoroj*. La dinamo estas tiu, kiu produktas la elektran fluon kaj la motoro estas tiu, kiu movigas la laborantan maŝinon. La dinamo povas esti movigata ĉu per vapormaŝino, ĉu per akvoforto. La kurento estas kondukata de la dinamo al la motoro per kondukiloj, kiuj estas kabloj aŭ simplaj kupraj fadenoj. Anstataŭ la komence konata *kontinua fluo* oni enkondukis la tielnomitan *alternan fluon*, kiu ŝanĝas sian direkton multajn fojojn dum la minuto. La avantaĝo de tia fluo estas, ke ĝi disvastiĝas ne en la internaĵo de la kondukilo sed sur la surfaco. Tia-

maniere oni povas konduki *altpotencialan* fluon per tute maldikaj, sekve ekonomiaj kondukaj fadenoj kaj la energio povas esti *transformata* en la uzino mem, kie ĝi estas uzata.

Ni devas nepre kompreni la gravecon de tiu ĉi metodo. Ni imagu karbminejon en la internaĵo de montaro, for de ĉiu komunikilo. Konstruado de fervojo estus tre multekosta entrepreno kaj la prezo de la ekspluatota karbo estus tiel alta, ke oni ne ĝin povus vendi. Eble la ekspluatado de tiel alte kuŝanta minejo eĉ ne estus ebla pro diversaj fizikaj kaŭzoj. Oni do devus lasi la nigrajn diamantojn (karbo) en la internaĵo de la montaro. Kaj nun venas la elektrotekniko, kiu savas por ni tiun ĉi trezoron. Oni povas bruligi la karbon sur la loko mem, en vapormaŝinoj aŭ turbinoj, kiuj turnas potencajn dinamojn. La altpotenciala kurento de tiuj ĉi maŝinoj-generatoroj estas sendata per maldikaj fadenoj, kompreneble bone izolitaj de la homaj manoj, ĉar tuŝo al ĝi mortigas!—al la uzinoj, kie la transformatoroj unue transformas la altan potencialan fluon je malaltpotenciala kaj poste sendas ĝin en la diversajn motorojn, kiuj siavice funkciigas la diversajn labormaŝinojn de la uzino. *Nia tuta industrio estas hodiaŭ organizita tiamaniere.*

Ni nur devas mencii ankoraŭ kelkajn tre interesajn praktikajn aplikojn de la elektro. El ĉiuj aplikoj la plej interesaj estas tiuj por la telegrafado kaj telefonado sen kaj per fadenoj. Por la telegrafado sen fadenoj oni aplikas metalfadenon, kies unua parto finiĝas en la senda kaj kies dua parto alvenas en la ricevaparatoj. La senda aparato konsistas en la t. n. *Morse-kontakto*, per kies helpo ni sendas longajn kaj mallongajn kurentojn en la kondukilon, kiujn la ricevaparato enregistras kiel streketojn kaj punktojn. La Morse alfabeto estas kunmetita el kombinaĵoj de tiaj streketoj kaj punktoj. La telefono konsistas el du partoj: la telefono mem kaj la mikrofono aŭ aŭskultilo. Tie ĉi temas pri flekseblaj membranoj, kies funkciadon ni facile komprenas en la fiziko. Interesa apliko de la telefono estis antaŭ ne longe la dissendado de muziko kaj konferencoj al specialaj abonantoj. Sed tiuj ĉi entreprenoj devas cedi la lokon en la lasta tempo al la *Radio*. La *radio* estas praktika apliko por la publiko de la senfadena telefonado, kiu estas bazita sur la dissendado kaj ricevado de elektraj ondoj tra la etero (spaco). Ni povas kapti la ondojn dissendatajn de la diversaj *radiostacioj* per anteno kaj per ricevaparatoj, kiuj—laŭ sia perfekteco kapablas akcepti ondojn venintajn de pli malpli granda distanco. Ŝajnas, ke tiu ĉi nova tekniko estas nur en sia unua fazo kaj ke ĝi multe evoluos en la estontaj jaroj. Efektive ĝi estas mirinda eltrovo. Dank' al la *Radiofonio* la plej modesta familio provas ĝui la artan muzikon venantan el la ĉefurba opero, la plej malproksime loĝanta studemulo povas aŭskulti la voĉon de la plej bonaj profesoroj. Sed ankoraŭ pli grava kaj pli serioza estas la aplikoj de la senfadenaj telefonado kaj tele-

grafado en la ĝenerala trafiko. Efektive, la jam ekzistantaj telefonaj kaj telegrafaj kabloj ne estis sufiĉaj. Hodiaŭ ĉiuj kursoj de ĉiuj gravaj borsoj de la mondo estas transmetataj per senfadena telegrafado kaj la moderna ekonomia vivo estus neebla sen tiuj ĉi rapidaj kaj ekzaktaj sciigoj. Ankaŭ la komunikiĝo de la ŝipoj kun la tero kaj kun aliaj ŝipoj estas efektivigata per senfadenaj telegrafoj: ili ebligas ekzemple la redaktadon de gazeto, aperaranta sur transoceana ŝipo kaj enhavanta la plej lastajn novaĵojn de la kvin kontinentoj, tiel same, kiel iu ajn el la grandaj ĵurnaloj de la tero.

La aplikoj de la elektreco ne nur estas rimarkindaj sur teknika kampo. La diversaj fakoj de la scienco uzas la elektrecon kaj novaj sciencofakoj naskiĝis dank' al la elektreco. Ni jam memoris pri la *elektroterapeutike* kiu kuracas kaj ekzamenas la pacientojn per elektraj kurentoj. *Roentgen* inventis la radiojn nomitajn X, aŭ pli vulgare Roentgen-Radioj, per kies helpo oni povas travidi la homan korpon kaj fotografi la internajon de la korpo. Sed oni ne nur povas konstati la malsanon per la radioj X sed oni ankaŭ povas kuraci ĝin per la samaj radioj. Sed la mirindaj radioj, kiuj bone aplikataj kuracas, malbone aplikataj mortigas. Tiel multaj kuracistoj, kiuj savis la vivojn de siaj pacientoj per tiuj ĉi radioj, mortigis sin mem per ili. Tiuj estas la veraj viktimoj de la scienco, *herooj, pli grandaj ol reĝoj kaj generaloj*. Iliaj nomoj ankaŭ pli longe vivos en la memoro de la homoj... La scienco hodiaŭ defendas la eksperimentantojn per taŭgaj rimedoj kontraŭ la danĝeraj radioj kaj saĝnas ke la longa serio de la viktimoj de la scienco baldaŭ tute finiĝos.

Laŭ la kredo de niaj scienculoj, la lasta elemento de ĉiuj korpoj estas la elektrono. Oni ĉion klarigas verdire per la elektro. La perspektivoj de la elektra scienco estas senfinaj: ni ne povas antaŭvidi, kiajn rezultatojn la estontaj jaroj alportos. Estas tre facile eble, ke ĉiuj sonĝoj de la iamaj alkemistoj baldaŭ realiĝos pere de la natursciencoj kaj per la tekniko, kiuj marŝas brako ĉe brako, en harmonia konstrua laboro, por la bono de la homaro.

Karaj Infanoj! Niaj lecionoj pri la humanista historio finiĝis: mi nur diris al vi la minimumon. En aliaj fakoj vi lernos ankoraŭ certe pri la samaj aferoj, kaj tiam tio, kio nun ŝajnas al vi eble ne tute klara, fariĝos tre facile komprenebla. Se vi volas vere profiti el mia instruado, vi devas konservi viajn kajerojn, de tempo al tempo rigardi ilin kaj ĉefe vi devas de nun memstare daŭrigi la laboron, se tio interesas vin. Vi devas en viaj liberaj horoj legi pri la historio de la civilizacio kaj kulturo kaj vi tiamaniere povas kompletigi viajn notojn kaj desegnojn. Sed vi neniam devas forgesi, ke ne sufiĉas koni la historion, oni devas ĉefe ekkoni la nunan staton de la scio: kaj por tio vi ja havas la plej bonan okazon dum vi estas studentaj en la lernejo.

JOZEFO MAJOR.

Premiita en la XIII^a Internaciaj Floraj Ludoj.

XIV.aj Internaciaj Ludoj

NOVAJ PREMIOJ:

XII.—Premio de Esperantista Grupo «Nova Stelo» el Barcelono: 50 ptoj. temo: laŭvola.

XIII.—Premio de S-ro S. Chaler, 50 ptoj. temo: laŭvola.

XIV.—Premio «Esperantista Klubo Palma», 50 ptaĵ. temo: laŭvola.

VERKOJ RICEVITAJ (ĝis la 16 de Majo): TRIA KAJ KOMPLETIGA LISTO.

28—Kong-Fou-Tsen, devizo: Budoj 29—Amo, se estas vera..., devizo: Pasio. 30—Viktimo, devizo: Malamikoj. 31—Mia filineto, devizo: Patrino Amo. 32—Vilaĝa Anatemio, devizo: Anatemio. 33—Godiva, devizo: Coventry. 34—La Reĝo Pentekosta, devizo: Fortuno helpas kuragulon. 35—Rispondi neatendita, devizo: Kion koro sentas, lango prezentas I. 36—Kristo venis, devizo: II. 37—Infana Filosofo, devizo: III. 38—Kristnasko, devizo: IV. 39—En lulilo..., devizo: V. 40—Nek en la sonĝo, devizo: D. E. 41—Sunkso, devizo: Savinien 42—Mi serĉis vin, ho mia fratanimo, devizo: Homaj sortoj. 43—Pio, devizo: Pio. 44—Varmaj manoj, devizo: Varmaj manoj. 45—Surprizo, devizo: Surprizo. 46—Renkontiĝo de Cindrulino, devizo: Cindrulino, 47—Infanregino, devizo: Infanregino. 48—Tradukoj de Aleksandro Sik, devizo: Flamo. 49—Tri Sonetoj, devizo: Antonia. 50—Abundo apud abismo, devizo: Abundo apud abismo. 51—En Maja Tago, devizo: Saluton al vivo I. 52—Kosmeco, devizo: Saluton al vivo II. 53—Al malsamopinianto, devizo: Al bono por amo. 54—Das Ungetüm, devizo: Verkado ne estas tiel facila, kiel laboro argila. 55—Poste Restante, devizo: Oni ekkonas birdon laŭ flugo, kaj verkiston laŭ plumo. 56—Memorinda boatekskurso, devizo: Ne en unu tago ekkresgis Kartago. 57—Du ĉapitroj el Fratoj Kamamazov, devizo: Se kion mi ne scias, mi scius, ĉiuj gesamideanoj min envidus. 58—La lasta horo de Mata-Hari, devizo: Flandremulino. 59—Lilofeo, devizo: Tamen. 60—Fraŭlino Muso, devizo: Bone faru, kaj diri lasu. 61—Orfeo, devizo: Orfeo. 62—Avino, devizo: Ĉiu laŭ sia povo. 63—Aŭtunaj impresoj, devizo: Manjo. 64—Mezepoka Londono, devizo: Sanavan Og. 65—Kanto de Trinkejo, devizo: Ni kantu. 66—Historio kaj efiko de Tabako, devizo: Al saĝulo sufiĉas aludo. 67—La balkona sceno el Romeo kaj Julieta, devizo: Verona. 68—Mia unua radio-parolado, devizo: Cigo. 69—La kreskado de humaneco, devizo: Ni semas kaj semas konstante. 70—La kokido, devizo: Amo prudenta. 71—La leciono de la Historio, devizo: D. Chenem. 72—La Vizio, devizo: Superas humaneco, naciecon! 73—La Fluto, devizo: Pentanto. 74—

La Majstra verko de l'Dio, devizo: Amanta homo. 75—Kie estas feliĉo?, devizo: La granda demando.—76—La uzo kaj la maluzo de la silento, devizo: Silentulo. 77—Rakontoj de esperanta avino, devizo: Ne tentes aut perfice. 78—La pluvelfino, devizo: La pluvelfino. 79—Rubzahl, devizo: Ni estu ĉiuj gefratoj. 80—Malriĉa filo, devizo: Triumfa Amo. 81—La Okcidenta Skismo, devizo: Mi kredas en la Sankta Eklezio. 82—Du amaj «Romancoj», devizo: Alma parens historiae. 83—Rivero, devizo: Niaj vivoj estas fluoj fincelantaj al la maro, kiu estas mort'. 84—Lanfloro, devizo: Senodora. 85—Bona viro kaj lia filo, devizo: Grafo Lukanor. 86—Rezurekcio, devizo: Amo ĉion toleras, ĉion kredas, ĉion esperas, ĉion eltenas. 87—Himno de maltrankvilo, frenezo kaj enuo, devizo: Malsana fantazio. 88—Himno de malamo, devizo: Kio estas pli justa? pesimismo aŭ optimismo. 89—Himno de Fajro, devizo: Brulu fajro, e n niaj koroj brulu eterne. 90—Lamento, devizo: Ne larmojn, sed agojn. 91—Al malamiko, devizo: Ĉu homaron vi kreis perfekte kaj bele?. 92—La duon-mortiginto, devizo: Kiu estas senkulpa?

Noto.—Tiu ĉi estas la lasta listo. Verkoj alvenontaj post la datolimo por la ricevo ne estos konkursataj.

JOAN GILI NORTA, *Sekretario.*

Esperantista Akademio

Jen la rezultato de la Elektoj en la L. K.:

Nombro de la L. K-anoj:	126
Voĉdonis	92
Plimulto	47 voĉoj

Estas elektitaj:

S-roj Muĉnik	89 voĉoj
Sabadell	88 —
Drezen	87 —
Bofill M. Granada	86 —
Ghez	85 —
de Ménil	84 —
Zwach	83 —
Uitterdijk	81 —
Sepúlveda Cuadra	78 —

Je nia granda bedaŭro S-ro Zwach mortis dum la balotado. Lia nomo tamen staros en nia Jarlibro 1928.

AKADEMIAJ DECIDOJ

La Akademio, fidela al la Zamenhofs sistemo por landnomoj kaj forigante ĉian alian solvon, decidis per 15 voĉoj kontraŭ 2 (Febr.

1928), ke la solaj landnomoj, kiujn ĝi povas aprobi estas tiuj *nome* montritaj en la verketo *Pri Landnomoj la sistemo de D-ro Zamenhof*.

Ĝi aliparte opiniis, ke la paragrafo 15 de la Fundamenta Gramatiko ne estas tie ĉi aplikebla, kaj ĝi decidis, ke la rimarko (1) de *Vortaro de la Oficialaj Radikoj* (p. 31) kaj de *Klasika Libro* (p. 119), kiu estis nur komentaria noto de l'Prezidanto, estas nuligota.

Malprave oni riproĉas la Akademion, ke ĝi estas tro konservema, ke ĝi nenion faris.

Tro konservema! sed kial do, se oni deziras esplorojn pri difinitaj lingvaj demandoj, pri ia ŝanĝo en nia Regularo, oni ne uzas lojale la rimedojn montritajn en la paragrafo 15—23 de ĉi tiu Regularo?

Ĝi nenion faris! Ĉu nenio: la longa laboro de la *Korektoj de la eraraj tradukoj en U. V.*, la *Aldonoj*, la *Vortaro de la Oficialaj Radikoj*, la eldonado de *Klasika Libro* en 6 lingvoj (la tradukoj en 4 aliaj lingvoj estas pretaj, nur *mono mankas*); ĉu nenio la grava, multnombra, privata korespondado prilingva de kelkaj Akademianoj, kaj la jaraj Raportoj? Prof. Grosjean-Maupin preparas nun novan *Aldonon* al nia Vortaro!

Trankvile, senbrue ĝi efektive laboras kaj ne meritas la riproĉon pri nelaboremo, ĉar ĝi rifuzas preni sur sin taskon, *kiu ne, nepre ne, estas la ĝia*: plirapidigi la evoluon de la lingvo!

Sen ia ajn kompensajo, sen rekompenco la Akademianoj donacas al Esperanto la tempon, kiun lasas al ili libera, iliaj profesiaj okupoj: pagata estas neniu el ili. Mi ne insistas.

La *Jarlibro 1928* aperos tuj post la elektoj.

Ni trankvile, senŝanceliĝe iru nian rektan vojon: per disciplino, per unueco ni venkos ĉiujn momentajn malfacilaĵojn.

Via tre fidele

TH. CART.

Pri la Movado

FESTO ĈE BARCELONA STELO

Kiel ni jam anoncis en nia lasta numero, la Grupo BARCELONA STELO sukcese festis la XIXⁿ, datrevenon de sia fondiĝo.

La 14.ⁿ de Aprilo ĉe la grupa sidejo, antaŭ multnombra ĉeestantaro, oni prezentis la komedion «Amors Esperantistes» kies aranĝon faris antaŭ kelkaj jaroj nia kunsocietano Gili Norta. Ĝi estis korekte ludata kaj ni sendas niajn gratulojn al samideanoj kaj grupanoj F-ino Coll kaj S-roj Juan kaj Cantò pro ilia sukceso.

Poste oni prezentis alian katalunan komedion, ludinte ĝin la teatra fako de la «Unión Cooperatista Barcelones» kiu honore partoprenis la feston.

Ankaŭ tre bone sukcesis la kantoj de S-ro Badia. Li kantis nian Himnon, Sankstan Luĉion kaj Tannhauser' on ĉiuj en Espe-

ranto, meritinte grandan aplaŭdadon. Li bone interpretis kaj korekte kantis tiajn verkojn.

Samideano Juan legis du poeziaĵojn en korekta formo, malgraŭ li estas nur lernanto de Esperanto de antaŭ tri monatoj.

Fine oni dancis ĝis frumatene kaj la festo plene kontentigis ĉiujn ĉeestintojn.

Ni denove sendas al Barcelona Stelo la esprimojn de nia simpatio, dezirante multajn sukcesojn kaj ke dum multaj aliaj jaroj povu ankoraŭ festi pliajn datrevenojn.

Pri U. E. A.—Ni ricevis flugfolion, kiu ja povus esti nomata preskaŭ, broŝuro, subskribitan de S-ro Delanoue Ĉefdelegito de tiu societo en Francujo kaj de kelkaj membroj kiuj protestas kontraŭ la administrado de U. E. A. kaj la kontrakto de Helsinki. Ni bedaŭras ke la diskuto pri la landnoma afero kondukis al tiu ĉi pli grava disputado kaj volas esperi ke en la Antverpena Kongreso kun bona volo kaj iom da cedo ĉiuflanke oni sukcesos denove esti ordon pri la organiza demando.

ANTVERPENAN KONGRESO.—Jam 420 aliĝoj alvenis por la Universala Kongreso okazonta en Belgujo tiun ĉi jaron; el nia lando estas 9 aliĝoj. La Organiza Komitato zorgas pri la enloĝado de la aliĝintoj kiuj faris mendon antaŭ la 15^a de Julio. Ni rekomendas al niaj kunfederacianoj kiuj intencas veturi al Antverpeno ke ili aliĝu kiel eble plej baldaŭ por faciligi tiel la laboron de la Loka Komitato.

INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ.—La Loka Komitato de nia Kongreso de Vinaroĉ sciigis nin ke ĝi kolektis jam dek kvin premiojn por la Floraj Ludoj, kio estas kontentiga frukto de ĝia laborado. En nia venonta numero ni donos pli da detaloj.

ACADEMIA ENCICLOPEDICA ESPERO.—La 6^an de Majo, matene je la 11^a, okazis en la salono de tiu societo, Str. La Internacional 95, bajos, propaganda kunveno en kiu paroladis S-roj Valdepekas, Alberich, Rocamora kaj Dalmau. La aŭdantaro montriĝis tute favora al Esperanto kaj kontraŭ la ida skismo kiu de post kelka tempo agitadas en Barcelono. Kiel rezultato de la kunveno kurŝo estas malfermita en tiu societo.

RADIO.—La 21^an de Majo S-ro S. Chaler faris paroladon antaŭ la mikrofono de Radio Barcelona pri Vinaroĉ la urbo de nia kataluna kongreso. Rimarkinde estas ke post duonhoru li ricevis gratulan telegramon de liaj amikoj en Vinaroĉ.

NOVA FEDERACIO DE KATALUNAJ ESPERANTISTOJ.—La barcelonaj gazetoj konigis al ni la intencon de la grupo Fajro, t.e. S-ro Rocamora, starigi tiun ĉi federacion kiu kompreneble naskiĝas por plenigi grandan mankon en nia lando. Laŭ la gazetoj jam aliĝis S-roj Gorgues kaj Anglada. Ni ne dubas ke kun tia anaro la nova federacio grave antaŭenpuŝos la movadon.

Respondo al Espero Katolika

En la lasta numero de tiu ĉi gazeto estas publikigita artikolo kun la pseŭdonimo Kata Luno kiu riproĉas nian organon, Kat. Esperantisto kaj persone nian Direktoron pro rompo de neŭtraleco koncerne religiajn dogmojn.

Ni devas unue diri ke neniam oni legis en nia gazeto redakcian tendencan artikolon kaj ke la direktoro, kiu necese ne devas opinii same kiel liaj kunlaborantoj, povas nur respondi pri tio kion li mem persone redaktis.

Koncerne la publikigon de la «Skizo de Humanista Historio» de S-ro Major kies lastajn ĉapitrojn ni donas hodiaŭ, ni tre volonte volus scii en kiu loko ili kontraŭdiras la katolikan dogmon. Ja S-ro Kata Luno mem rekonos ke li estas tro antaŭvidema kiam li skribas en ESPERO KATOLIKA ke ne pro la publikigita parto, kiu nenion enhavas riproĉinda, sed pro la publikigota parto mi protestas». Kio donas al li rajton antaŭscii la enhavon de ankoraŭ publikigitaj ĉapitroj kaj pri afero ankoraŭ nelegata antaŭmeti opinionon? Se S-ro Major apartenas al Oomoto tio estas persona afero lia kiu neniel povis nek devis influi sur la publikigo de tiu ĉi cetera bonega verko.

Pri la publikigo de la verkoj premiitaj en la Floraj Ludoj, ni devas diri, ke nia deziro estus vidi ĉiujn verkojn kune publikigitajn en unu volumo, sed ĉar tio estas per la nuna momento neebla, necese estas fari elekton inter ili kaj oni facile komprenos ke la literatura valoro estis ĉiam la faktoro kiu decidigis la elekton, krom en tiuj okazoj en kiuj bedaŭrinde la amplekso de la verkoj, la manko de maŝinskribado kaj la malgrandeco de la paĝoj de KAT. ESPERANTISTO malpermesis la publikigon.

Koncerne la tradukon de verko de kondamnita aŭtoro, kiun, laŭ viaj vortoj S-ro Kata Luno, S-ro Solà profitis la okazon esti la Direktoro de K. E. por publikigi sur la paĝoj de tiu gazeto, ni devas diri ĉar ŝajne S-ro Kata Luno ne kuraĝis ke la aŭtoro estas ne alia ol la famekonata moderna pensulo Maurice Maeterlinck.

Pri moraleco aŭ malmoraleco de iu publikigita poezio oni povus longe diskuti sed ne ŝajnas al ni tiu la ĝusta loko por tio. Private ni tre volonte tion farus.

S-ro Kata Luno sendube legis kelkfoje la gazetojn aŭ broŝurojn sennaciulajn kaj sendube ankaŭ miris pri la atakoj de sennaciuloj kontraŭ la neŭtrala movado esperantista. Se tion li faris li ne kolekos kiam ni diras al li ke en lia artikolo kaj lia sinteno kontraŭ ni oni trovas strangan similecon al la konduto de tiuj sinjoroj.

LA REDAKCIO.

El Comité Directiu de la K. E. F. ha rebut el següent comunicat:

GOBIERNO CIVIL DE LA PROVINCIA DE BARCELONA

Secretaria General.

Número 4.094

Teniendo en cuenta que la redacción de los estatutos de esa Federación pueden dar lugar a confusiones que conviene prevenir, me dirijo a V. para significarle deberán agregar un artículo en el que se haga constar que, para cuanto se refiera a las relaciones internacionales establecerán relaciones de solidaridad con las demás asociaciones con la misma finalidad establecidas en el resto de España, o sea, que conste desmentido de una manera categórica que a la sombra de una entidad al parecer cultural se efectúan trabajos para que cunda el desafecto y desunión entre regiones que son hermanas.

Sírvase acusarme recibo de la presente comunicación a la que dará cumplimiento en términos de quinto día.

Dios guarde a V. muchos años.

Barcelona 1 de Junio de 1928.

J. Milans del Bosch.

Formando por lo tanto parte integral de la Asociación Esperantista de España y dejando de llamarse Catalana.

Sr. Presidente de la Federación Catalana Esperantista.

Jen la traduko en Esperanto de la ĉi supra komunikajo:

PROVINCESTRO DE LA BARCELONA PROVINCO

Generala Sekretario.

Número 4.094

Konsiderante ke la redakto de la regularo de tiu ĉi Federacio povas konduki al eraroj kiujn oni devas antaŭgardi, mi turnas min al Vi por sciigi Vin ke Vi devas aldoni artikolon per kiu oni vidigos ke, pri ĉio koncernanta la internaciajn rilatojn Vi starigos solidarecon kun la ceteraj societoj kiuj kun sama celo funkcias en la cetera Hispanujo, tio estas, ke estos formale malkonfesate ke en la ombro de ŝajne kultura societo oni laboras por la plikreskigo de malamo kaj malkuniĝo inter frataj regionoj.

Bonvolu atesti pri tiu ĉi komunikajo kiu devas esti plenumita en la daŭro de kvin tagoj.

Dio Vin Gardu multajn jarojn. Barcelona la 1^an de Junio 1928^a.

J. Milans del Bosch.

Sekve kun plena aliĝo al la Hispana Esperantista Societo kaj ne plu sin nomante Kataluna.

S-ro Prezidanto de la Kataluna Esperantista Federacio.

Al tŭ ĉi komunikajo nia Prezidanto respondis jene:

El infrascrito Delfin Dalmau Janer, vecino de esta ciudad segŭn cedula personal, clase II^a n.º 17.597, presidente de «Kataluna Esperantista Federacio», tiene el honor de acusar recibo de su atenta comunicaci3n de 1 de Junio corriente, relativa a la actuaci3n de dicha entidad, y se complace en comunicarle que en obediencia a las 3rdenes de V. E. queda tachada la palabra *Kataluna* o *Catalana* de nuestra Federaci3n Esperantista, y que en la pr3xima reuni3n de sus asociados anunciada y organizada en Vinaroz —fuera de Cataluńa, como otras veces en Palma de Mallorca y S3ller— se someter3 a estudio la forma de reglamentar las dem3s indicaciones de V. E.

En todo caso, el hecho de que nuestra Federaci3n sea de objetivo exclusivamente esperantista, como lo prueba la adhesi3n a ella de esperantistas baleares, valencianos, aragoneses, castellanos, etc. residentes en el territorio que le asignan sus Estatutos, el hecho de que sus Congresos sean organizados y defendidos por concejales y alcaldes gubernativos actuales como ocurri3 en Santa Coloma de Farn3s en 1926, y es el caso del Congreso de hogao en Vinaroz, puede ofrecer garant3a del leal proceder de los componentes de esta Federaci3n y de que no pueden hallar la menor oposici3n cuantas 3rdenes emanen de V. E. dirigidas a la entidad que me cabe el honor de presidir.

Con el debido respeto saluda a V. E. que Dios guarde muchos ańos.

El Presidente de la Federaci3n Esperantista

Delfi Dalmau.

Noves edicions

(Esperanto).

ZAMENHOF RADIKARO. Wŭster. Amb derivacions, 85 p3gines. Preu, 9 pessetes.

PALACO DE DANGERO. Wagnealls-Paysen. Enquadernat amb tela. Preu, 9 pessetes.

MAŠINFKA ESPERANTO VORTARO PRIELEMENTA. Wŭster. 89 p3gines en rŭstica. Preu, 3 pessetes.

Nota: Cal afegir el 5 per cent dels preus senyalats, per les desp3ses de correu, en cas d'3sser els llibres enviats fora de Barcelona. Cal que l'adreσα sigui ben clara.

Dirigir-se a Ferd. MONTSERRAT, Villarroel, 107, 2.º, 2.ª Barcelona. IBERIA ESPERANTO SERVO.

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA ESPERANTISTA
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

La comprensibilitat internacional

de les altres llengües

Tenim a Catalunya dotzenes de clergues esperantistes; demaneu al més modest i poliglòtament pobre que hagi assistit a una reunió internacional d'esperantistes, si li ha esdevingut mai de no poder comprendre i fer-se comprendre. En canvi, un eminent políglota i filòlec català, A. Grier, prev., parlant de la seva estada a Berlín de poques setmanes enrera, en una de les seves cròniques a la *Gazeta de Vich* deia:

...«A cada altar el Ministre que fa de diaca canta un passatge de L'Evangelí, que no puc saber quin és».

Qué hi contesten Chesterton i Puig i Cadafalch?

DELFI DALMAU.

"KATALUNA ESPERANTISTO"

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTISTA FEDERACIO

Membra kotizajo: 3'50 p.; Grupoj: 1'20 por membro.

Jarabono: 6 p. enlande kaj 6 sv. fr. internacie, provokzemplero 2 respondkuponoj.

Federacia sidejo kaj redakcejo: carrer València, 245-BARCELONA

LA DEK DEVOJ DE LA ESPERANTISTO

1. Bone sciu la lingvon, traktu ĝin kun respekto, kaj lasu la versfaradon al poetoj.

2. Esperanton uzu parolante, studu legante kaj ne fuŝu skribante.

3. La plibonigistoj diskutu; vi Fundamenton sekvu kaj fide-la restu.

4. Propagandu ĉiam, ne ĉie; klarigu, ne prediku; rakontu faktojn, ne esperojn.

5. Kion vi povas lerni nur en unu semajno, ne instru en unu horo; el malgravajoj ne faru regulon, kaj el la regulo ne faru malgravajon.

6. Verkante en Esperanto, ne kredis interesa, kion nacilingve neniu legus; ne imagu, ke preseraroj plibeligas libron, ne malesperu, se mankas acetantoj.

7. Al grupo aliĝu; la kunvenon vizitu; Esperanton parolu. Subtenu K. E. F.

8. Atentu, ke internacia lingvo vivos nur per uzado; memoru, ke tial internacia organizaĵo estas necesa, senlace varbu por U. E. A.

9. Legu gazeton, por ke vi konu faktojn; novajn abonu, por ke ĝi povu ekzisti; kunlaboru, por ke ĝi estu interesa.

10. Por Esperanto kiel movado agu; por ĝi kiel realaĵo pagu, kaj kiel altan idealon konservu ĝin en via koro.



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA ESPERANTISTA FEDERACIO
KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gutaro* Redakcio: *Carrer València 245 BARCELONA*

DIREKTORO: MARIAN SOLÁ

Kongreso

Post kelkaj tagoj nia XX^a Universala Kongreso de Esperanto estas okazonta en Antverpeno. Oni antaŭvidas respektindan nombron da partoprenontoj. Se oni konsideras ke tiuj kiuj povas veturi al mallproksima lando estas relative malmultaj, ni devas konstati ke internacia movado kiu sukcesas kunvenigi tiel grandan aron da personoj estas, devas nepre esti grava movado, ĉar la nombro da ĝiaj membroj kiuj pro diversaj kaŭzoj devas resti en siaj hejmoj kaj ne povas partopreni la plezurojn de la vojaĝo kaj de la internaciaj festoj estas certe grandega. Se ni, ekzemple kalkulas, ke el urbo kie troviĝas cent esperantistoj nur unu povas veturi al la kongreso, kaj tiu proporcio ŝajnas al ni iom tro granda, ni povas konkludi ke dumil kongresanoj diverslandaj reprezentas almenaŭ ducent mil esperantistojn.

Niaj internaciaj kongresoj estas ĉiam la granda festo de la esperantistaro: ili havas eksterordinaran valoron tiel interne kiel ekstere de la movado. Por la esperantistoj ili estas la bildo de la estontaj internaciaj kunvenoj, kie nur unu komuna lingvo kunigos la homojn diverslandajn kaj tiu sento de facila komunikebleco, de amika interrilato inter diversnacianoj, vigligas la fervoron de la kongresanoj, kiuj reveninte ĉiuj en sian propran landon, sentas sin denove harditaj por la propaganda tasko kaj pretaj al apostola laboro.

Por la loĝantoj de la urbo kie la kongreso okazas, tiu internacia kunveno estas la plej efektiva propagando: neniu kiu vidis per propraj okuloj la miraklon de niaj kunvenoj povas dubi pri la taŭgeco de nia lingvo kiel esprimilo kaj sekve pri ĝia pli-malpli frua definitiva venko.

M. S.

La Urbo de la XV^a. Kongreso de la K. E. F. kaj de la XIV.^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj Vinaroç: Deveno kaj disvolvigo

(Fino)

NUNA STATO

Por elplenumi nian taskon ni devas ankoraŭ fari mallongan priskribon de la nuna stato de Vinaroç.

Ni diras, simple, ke ĝi estas ĉarma, pura kaj alloga orienta urbo kuŝanta apud la maro kaj sur vasta ebenaĵo, kiu ŝajnas kvazaŭ bela ĉefurbeto, jam de malnovaj tempoj konata per la simpatia nomo «Perlo de la Maestrato». Ĝiaj stratoj kaj placoj kun arboj estas belaj kaj vastaj. Ĝi enhavas belajn publikajn kaj privatajn konstruaĵojn, teatrojn, belegan paroĥan, preĝejon kaj pentrindajn ermitejojn ekster la urbo. En konstruado estas granda lernegrupo, publikvendejo kaj alloganta Marpromenejo apud la haveno. Arta memoraĵo dediĉita al fama vinaroçido arkiepiskopo Costa i Borràs staras en la dirita promenejo. Arta fontano ornamas la placon de la Konstitucio. La strato Dozal rekta kaj vasta, laste plibeligita per multe da florplantoj, estas kvazaŭ avenuo de moderna ĉefurbo.

La elektra lumigado de la urbo estas nun plibonigita. Kiel bonfarajn organizaĵojn ĝi havas urban hospitalon, kaj Azilon por senhel-paj maljunuloj.

Kron la fakajn lernejojn, ĝi posedas ankoraŭ klerigan organizaĵon, muzikakademion, paroĥan bibliotekon kaj en konstruado alian popolan. k. t. p.

Ĝi havas belan komerean kaj militan havenon, la sola kiu estas finita en la tuta provinco.

Ĝi havas stacidomon en la Norda fervojo en projekto estas aliaj fervojlinioj kiuj devas konduki al Vinaroç. Ĉefvojoj al Barcelona, Valencio kaj Zaragoza kaj aliaj malpli gravaj al diversaj vilaĝoj en la lando. Aŭtomobilservo al Morella, San Mateo, Alcalà de Chivert, Penýscola, Rosell, San Carles de la Ràpita kaj la Cenia.

Ĝia riĉeco estas la komerco, industrio kaj terkulturado.

Por la komerco ĝin favoras ĝia centra situacio en la lando. Kiel industrio troviĝas fabrikado de oleo, faruno, rizo, teksaĵoj k. c. Grava estas ankaŭ la fiŝkaptado precipe per motorboatoj.

En niaj kampoj oni rikoltas migdalojn, olivojn, vinberojn, grenon, oranĝojn, kaj plej diversajn fruktojn.

Per tio ĉi, rapide priskribita, ni finas la skizon de nia amata urbo kiu en proksima Septembro estos honorata kun la okazigo de la Internaciaj Floraj Ludoj kaj la Kataluna Esperantista Kongreso.

Daniel D. DELMAS. Trad. S. CHALER.

Vaska popolo, deveno kaj antikveco

Vaska aŭ Eŭskara popolo estas sendube unu el la plej antikvaj kaj studindaj rasoj loĝantaj en Eŭropo. Pri ĝia antikveco multe oni diskutis, kaj oni povas trovi ĉiajn opiniojn. Vaskoj, kaj kun ili kelkaj filologoj pretendas ke sia raso estas plej antikva en la mondo, kaj ke la vaska lingvo «eŭskera» estis parolata en la Tera Paradizo. Kontraŭe, aliaj malamikoj eĉ kuraĝas diri ke ĝi aperis dum la Mezjarcentoj, kaj ke ĝi estas kunmiksado da vortoj latinaj, gotikaj, arabaj k. t. p.

Pioniro de unua hipotezo, estis la klera lingvisto, ĵus mortinta, Universitata Profeso Julio Cejador. Tiu scienca viro estis travojaĝinta tutan Azion kaj parton de Afriko, li perfekte konis la Eŭropajn lingvojn, ĉu vivantajn, ĉu mortintajn, kaj gramatike la Afrikajn kaj Amerikajn lingvojn; post tio, li, hispanlingvano, studis vaskan lingvon, kaj vaska lingvo estis al li malkovro, ĝi lin ravis, lin delogis, kaj glora frukto de tiu ravo, de tiu delogo estis grandega verko «Lenguaje» (Lingvajo). Per ĝi, li pravas: unue, la ekzistadon de pralingvo; due, ke tiu pralingvo estas Vaska aŭ Eŭskera, ĉar ties elementaj vortoj, estas voĉoj devigitaj de naturo mem aŭ kaŭzigitaj pro la simpla funkciado de organismo. «Per fundamentoj prenataj el centoj kaj centoj de lingvoj, li certigas la ekzistadon de kelkaj sonoj samaj, egalaj en ĉiu lingvo, esprimantaj precipe la ideojn kaj spacajn rilatojn, kiuj envolvas la ideojn personecajn, instinktan jeson, nomitaj de la hodiaŭaj psikologoj «unuaj asocioj» aŭ «sentaj asocioj» bazo de la mensa komparo. Kaj tiuj unuaj vortoj—neesperita okazo—koincidantaj en ĉiu monda lingvo, estas la Eŭskaraj montraĵoj.» (Navarro-Ledesma).

Tiel granda estas la efiko de tiu verko, ke oni demandis al la Guberniestraro, la kreadon de katedro de Vaska lingvo en la Madrida Universitato.

Ni devas konstati ke nek profesoro Cejador, nek lia laŭdanto Navarro-Ledesma estis vaskoj; ili estis, la ambaŭ hispanlingvanoj. Ĥia opinio estas, do, liberigita de ĉia partiececo, de ĉia blindeco, kiunpor sia lingvo sentas ĉiu homo, nur komparebla al la pasia amo, kiun por sia patrino sentas bona infano.

Tamen, tiu opinio, ke Eŭskara lingvo estas la Paradiza parolmaniero estas, ni tion diros kun la plej grandaj respektoj, io panegira. Certe Eŭskera konservus kelkajn montraĵojn de pralingvo, pri tio, neniu kuraĝos kontraŭstari post la ĉefverko de Prof. Cejador. Sed unua lingvo ja estis unusŭlaba origine, kaj vaska lingvo estas aglutina, kun multaj trajtoj de fleksa lingvo.

Dua hipotezo nur meritas malestimon. Eĉ plej mallerta homo.

studinte iomete Lingvosciencan, komus ke Eŭskera estas pli malnova ol latina, greka, araba, k. c. Kvamkam certe ĝi ricevis kelkajn latinajn, grekajn, germanajn kaj arabajn vortojn pro la militoj kaj la vojaĝoj.

Pri antikveco de Eŭskara popolo, oni ne rajtas dubi. Jam la latinaj verkistoj parolas pri ĝi, kaj la nomoj de homoj kaj lokoj, dum Roma regado, aperas kun sama sono ol hodiaŭ oni povas rekonigi ilin. Klasikuloj pentras la vaskan popolon kiel kruela, brava, aroganta, fiera kaj militema; sed ankaŭ fidela kaj heroa. Sulpicio Galba kaj Sertorio jesas ĝian fidelecon al ĉefoj.

Sed se Romaj kaj eĉ grekaj klasikaj aŭtoroj mencias Vaskojn, kiel menstarantan popolon, oni ne povas certe akordigi aŭtoritatojn ĉu antikvajn ĉu nuntempajn pri la deveno de tiu mistera gento. Pastro Fita kaj Eduardo Saavedra—du famaj hispanaj etnografistoj—opiniis ke ĝi devenas de la unuaj migradoj de Arja raso, veninte okcidenten tra Kaŭkazo, Nigramaro kaj Meztera maro, dum pratempo. Ili lasis ĉe Kaŭkazo branĉon de sia nacio; la Iberianojn; Sed Garat, Charencey kaj Tubino Vinson neas tiun devenon.

Campion, nuntempa vaska scienculo kredas ke ĝi estas la antaŭgordio de la grandaj migradoj de Arja raso.

Haeckel pruvis la malsimilecon de vaskoj kun la ceteraj mezmaraj popoloj, kaj nuntempe oni pretendas trovi analogion kun Japanoj (1) Aliaj menciinda fakko estas ke—laŭ multaj vaskaj soldatoj de Hispana kaj de Franca Armeo en Maroko povas konstati—kelkaj Bereberaj dialektoj eksterordinare similas al Eŭskera.

Kia ajn estu ĝia deveno, unua vaska popolo estas raso laborema, bonmora, honesta, tre religiema, disciplinamanta, obeema kaj entreprenema. Plej kuraĝaj maristoj, la esplorintoj de la du kontinentoj—Ameriko kaj Oceanio—eltrovitaj de Hispanoj por la mondo, estas vaskoj: Tiel la velŝipo de fiŝkaptisto Echaide aliris la Novateran marbordon multajn jarojn antaŭ Kolombo ekvidus la Antiljan insularon. Tiel Elcano, la unua ĉirkaŭvojaĝanto de la Mondo; Legazpi, Urdaneta kaj multaj aliaj, ĉu kiel soldatoj, ĉu kiel misiistoj, al militis la sovaĝulojn kaj ilin altiris al civilizacio. Ankaŭ pro la komerco ili trairas marojn, kaj ankoraŭ oni povas trovi en la Flandraj havenoj la «Place des Basques» placo de la Vaskoj, honorante la nomon kaj rason de tiuj kuraĝaj homoj kiuj eĉ faris konvenciojn kaj akordis pacon kiel egaluloj kun la reĝo de Anglujo.

Nenie, en Iberia duoninsulo, oni trovas pli respektataj la leĝoj ol en Vaskaj provincoj. Multefoje, la Hispanaj politikistoj prezentis la kvar provincojn kiel modelajn al ceteraj.

(1) Aŭt' de tiu—ĉi verko intencis studi la aferon kaj prezentis demandaron al korespondanto Japana. Bedaŭrinde la korespondado subite ĉesis.

Nuna areo de Vaska popolo

ĝia plimalgrandiĝo

Statistiko de homoj parolantaj vaske ekzistas nek en Hispanujo, nek en Franca. En la ambaŭ Ŝtatoj, vaska lingvo estas *ne oficiala*, kaj la Estraroj ne atentis pri tio; sed privataj scienculoj prikalkulas el 800.000 al 1.000.000 proksimume, sur la ambaŭaj landoj Pirineaj. Hodiaŭ oni povas diri ke ĝi estas la popola lingvo de tuta Guipuzcoa, de tri kvaronoj da Vizcaya, kaj proksimume de duono da Navarra kaj Alava, tio estas, ĉe 4 provincoj Hispanaj. En la Franca parto, la Vaska teritorio ampleksas la landojn Labourdi, Soule kaj Suberoa, la tri en la «departament» Basses-Pyrénées. Ankaŭ ĝi estas parolata en Argentino, Ĉilio, Kalifornio kaj aliaj Amerikaj landoj, kien la Vaskoj, gvidataj de sia aventurema spirito, amase enmigras, kaj kie, meze de diversaj rasoj, ili konservas sian Eŭskeran kiel vera ligilo, kiel amata eĥo de malproksima patrolando.

Sendube, amplekso de Vaskalando estis pli granda ol hodiaŭa. Multaj nomoj de akvoj, montoj, vilaĝoj, urboj de centra kaj suda Hispanujo estas vaskaj kaj nun posedas ian signifon, ekzemple Lucena, plej alta, Eiberis urbonova. Komende de XIX jarcento princo, Lucien Bonaparte konstruis landkarton de vaska regiono. Nun, ĝi estas malgrandigita kaj vilaĝoj en kiu antaŭ jarcento nur oni parolis vaske, estas hodiaŭ hispanlingvaj. En Hispana parto, ĉefe en Navarra ĝi perdas ĉiutage teramplekson; kontraŭe ĝiaj limoj staras proksimume samloke sur la Franca parto.

Por klarigi tiun fenomenon, oni donas kelkajn rezonojn. La vaska lando apartenanta al Francujo estas pli malriĉa ol la ĉirkaŭantaj «departaments»; kontraŭe la Hispana parto estas unu el la plej riĉaj landoj, tie estas la riĉega fermineja kavaĵo Bilbao kaj Baracaldo; tie staras la somerlokoj San Sebastian, Zarauz, Deva k. t. p.; tie la gravaj havenoj Bilbao, Pasajes; tie la industriaj urboj Tolosa, Vergara, Eibar, Rentería... Pro tio, multaj gelaboristoj Hispanlingvanoj eniras la landon, kaj por interkompreni, vaskoj estas devigitaj lerni Hispanan lingvon. Oni povus kontraŭdiri kial venintoj ne lernas la landlingvon, sed ni devas rememori ke Hispana lingvo estas deviga en Leĝaj, Juraj kaj Ŝtataj rilatoj; tial hispanlingvanoj facile povas vivi ne lerninte vaskan lingvon, dum vaskoj, jam koninte la devigan lingvon pro ilia lerneja tempo, facile ellernas Hispane paroli.

Alia kaŭzo, la landoj ĉirkaŭantaj Francan vasklandon parolas diversajn «patois» neoficialajn lingvojn, ordinare malriĉajn. Kon-

traŭe, la Hispanaj provincoj proksimaj al Vaska lando parolas pli puran Hispanan lingvon, riĉa kulturlingvo, posedanta multenombrian literaturon.

Kelkaj kontraŭuloj opiniis ke la kaŭzo de vasklingva malmombriĝo povas esti la neadaptado de tiel antikva lingvo al nuntempaj bezonoj; sed la karaktero aglutina de Eŭskera, kontraŭe, bone efikas al la adoptado de novaj vortoj. Tie, kiel en Esperanto, oni povas elpensi novajn vortojn se nur oni bone konas la radikojn. Plej novajn ideojn kiel ekzemple «submarsĥipo» «aerplano» «aŭtomobilo» k. c. perfekte oni tradukis al Eŭskera per vortoj tiel multe signifplenaĵ ke, eĉ plej malklera vilaĝano, neniam vidinte la aferojn, povas tuje kompreni ilin, laŭ ilia nomo.

Maloficialigo de vaska lingvo estas sendube la ĉefa kaŭzo de malestimo. Lernejo, leĝo, gazeto, ĉiu grava afero estas, same en Franca ol en Hispana parto en la ŝtata lingvo. Tial kleraj homoj lerninte, legante eĉ pensante en Hispana aŭ Franca lingvo, pograde kutimiĝas ĝin paroli, ili instruas siajn gefilojn en Hispana aŭ Franca lingvoj, kaj vaska lingvo preskaŭ malaperis de urboj. Gevilaĝanoj loĝintaj en urboj—soldatoj, servistinoj, industriaj gelaboristoj—ankaŭ imitas la gesinjorojn, la burĝojn, kiel ĉiam oni imitas la morojn, kutimojn kaj vestojn de la elegantuloj.

Sed XX jarcento estas jarcento de la naciaj renaskiĝoj. Vigla movado burĝonas nun en vaska lando pro sia bela kaj respektinda lingvo. Oni eldonas vortarojn, gramatikojn, oni kreas katedrojn kaj multaj homoj, ŝoj de vaskoj; sed hispanlingvanoj, varme studas la parolmanieron de siaj praŭloj.

Nuna Euskera-ĝiaj dialektoj

Manko da gramatikoj, ĝis proksimaj jaroj, manko da gvidantoj en klera mondo, disa loĝado de enlandanoj—ordinare vaska familio loĝas en kamparlando izolita—kaŭzis malkomprenon inter diversaj regionoj de vaska lando—Nun oni distingas 8 dialektojn: kvar en la Hispana parto kaj kvar en la Franca, nome: Vizkaya, Gipuzkoa, Alta-Navarra de la Nordo, Alta-Navarra de la Sudo; Laburdia, Souletina, Malalta Navarra Orienta kaj Malalta Navarra Okcidenta. Inter ĉiuj, Gipuzkoa kaj Vizkaya estas sendube la plej literaturaj, sed oni trovas presitajn verkojn en ĉiuj. Nunaj kleraj vaskoj kreas Akademion, kies ĉefa tasko estos la unuigado de ĉiuj en unu literatura Eŭskera, pro tio oni elektos, plej eble, Gipuzkoan kiel bazon.

Vaska fonetiko varias laŭ la dialektoj. Ekzistas kvin vokaloj

a, e, i, o, u, sonantaj kiel en Esperanto, kaj en la franca parto ekzistas alia *u* kun la sama sono ol en francaj vortoj *du lumière*; Ankaŭ ekzistas du duonvokaloj. Oni skribas per la latina aboco, la konsonaj sonoj estas: b, d, f, g, h, j, k, l, ll, m, n, p, r, r, t, ts, tz, z, tx.

B, d, f, k, l, m, n, p, sonas same kiel en Esperanto; g ankaŭ sonas kiel en Esperanto; r kaj r estas la *r* kaj *rr* hispanaj, kiel en vortoj *marino, carro*; h ekzistas nek en Navarraj nek en Gipuzkoa dialektoj; sed en Laburdia ĝi estas gutura, meza sono inter esperantaj *h* kaj *h̄*, oni uzas preskaŭ ĉiam en vorto komencante per vokalo. Ekz; eria (lando), estas Laburdie, heria. I sonas kiel j hispana =*h̄* esperanta en Navarraj dialektoj, kiel franca j en Vizcaya kaj kiel latina kaj esperanta j en Gipuzkoa dialekto; ts sonas kiel esperanta *c*, tx estas nia ŝ, kaj z iom similas al la hispana z en vortoj *zumo, zapato*.

Ciu silabo povas esti longa aŭ mallonga, laŭta aŭ mallaŭta, laŭ bezono. Tio donas grandan facilecon por versfarado kaj kantado.

Ĉe la nomo, ne ekzistas seksa finiĝo; por determini la inon ekzistas ofte vorto tre malsimila al la virseksa. Ekz: gizon, viro; emakume, virino; jauma, sinjoro; andre, sinjorino; zaldi, ĉevalo; beor, ĉevalino; Se nur ekzistas unu vorto por la ambaŭ seksoj, oni aldonas la vortojn *ar, eme*. Ekz: Otxo-ar lupoj; otxo-eme, lupino. Nevivantaj vortoj estas neseksaj. Pri tio diras aŭtoro: Vorto *sango* estas hispane *ino* france *o*, angle neŭtro, vaske neseksa. Kiu estas plej prava? plej logika?

Rolon de artikolo ludas finiĝoj *a* ununombra neaktiva; *ak*, multenombra neaktiva kaj ununombra aktiva, *ek*, multenombra aktiva. Ekz. Gizon=viro; gizona=la viro; gizonak=la viroj.

Gizonak doaz=la viroj iras; gizonek ikusten dute=la viroj vidis ĝin.

Nomoj estas laŭvice adjektivoj. Ekz. Gizon gaztea=la viro juna; gaztea=la junulo. Kiam estas pluraj vortoj kunmetitaj, nur la lasta prenas la nombran, determinan aŭ deklinacian sufikson, tio estas, ne ekzistas la akordo, kiel en la latina, hispana, franca kaj multaj aliaj lingvoj. Ekz.

Gizon gazte ori=tiu juna viro (laŭ vaska ordo: viro, juna, tiu).

Gizon gazte orek=tiu(j) junaj viroj (laŭ vaska ordo: viro, juna, tiuj).

Ĉi deklino estas sinteza; tio estas, radikoj kaj finiĝoj konsistas nur en unu vorto. Pro tio, la vaska deklino, pli similas grekan kaj latinan sistemon ol hispanan kaj francan. Estas diversaj sufiksoj, ĉu por ununombra, ĉu por multenombra; ĉu por definitiva, ĉu por nedefinita ideo. Por ne trolongigi tiun-ĉi verkon, nur mi donos pruvon de ununombra definitiva afera deklino.

Mendia, mendiarĭ, mendiaren, mendiarekin, mendiarentzat.

La monto, al la monto, de la monto, kun la monto, por la monto. (posesiva).

Mendian, mendiagatik, mendirikgabe, mendira, mendirontz, mendiraño, menditik, mendiko, mendirako, mendiaz.

En la monto, pro la monto, sen la monto, en la monton, direkte al la monto ĝis la monto, el la monto, de la monto-monta, por la monto, pri la monto.

Adjetiva vorto estas ne ŝangebla, kiel Esperante. Oni metas ĝin ĉiam post la nomon. Ĝi ricevas sufikson *ago* por la komparativa, *en* por la superlativa. Ekz.

Aundi=granda; aundiago=pli granda; aundiena=la plej granda.

La numera sistemo estas kurioza, ĝi estas dudeka. Vaskoj posedas nomon por la 10 unuaj numeroj, oni nombras el 10 al 20 aldonante al la vorto 10, ĉiun el la 10 unuoj; sed el 20 al 40; el 40 al 60; el 60 al 80 kaj el 80 al 100, oni nombras same ol dudek unuaj numeroj. Ekz.

1 bat; 2 bi; 3; ĵiru, 4 laŭ; 5 bost; 6 sei; 7 zazpi; 8 zortzi; 9 hederatzi; 10 amar; 11 amaika; 12 amabi; 13 amaizu; 14 amallaŭ; 15 amabost; 16 amasei k. e.; 20 ogei; 21 ogei ta bat; 22 ogei ta bi...; 30 ogei ta amar; 35 ogei ta amabost...; 40 berogei; 41 berogei ta bat; 42 berogei ta bi...; 50 berogei ta mar; 55 berogei ta amabot; 60 irurogei; 61 irurogei ta bat; 42 irurogei ta bi...; 70 irurogei ta amar; 75 rurogei ta amabost.

... ..

Ankaŭ ekzistas ordigaj numeraj vortoj, per sufikso *garen*, 2.^a=*bigaren*. 10an=*amagaren*; 28an *ogeitazortzigaren*; disdonaj: *bata* (po unu), *bina* po du; *araj*, binaka=duope; *seinaka*=sesope.

Pronomoj estas multaj, kaj ekzistas, same ol ĉe latina kaj hispana lingvo, 3 diversaj montraj formoj, por signifi proksimecon aŭ malproksimecon de la persono. Tiu varieco, kaj la ekzisto de aldonaj vortoj kaj sufiksoj analogiaj al niaj esperantaj *sama* kaj *mem* permesas altegrade nuanci la paroladon. Ĉe la pronomo, tiel kiel ĉe la nomo, ne ekzistas seksta finiĝo.

Verba konjugacio estas tre malfacila, ĝiaj formoj varias multe laŭ la dialektoj. Estas respekta kaj familia konjugacio, kaj en tiu lasta aperas seksta formo, stranga fakto en lingvo ne ĝin posedante por la nomoj. Estas du plenaj konjugacioj, simpla aŭ sinteza, en kiu radikoj kaj komplementoj konsistas nur el unu vorto, kaj malsimpla aŭ kunmetita, kie la verba-vorto kombiniĝas kun helpanta verbo.

Simplaj aŭ sintezaj verboj estas malmultaj. En tiuj verboj,

radiko estas nek komenco nek fino, sed centro de la vorto. Por konjugi oni antaŭmetas la personan prefikson kaj oni postmetas la numeran sufixon. Ekz:

Joan=iri, radiko *oa*

Noa=mi iras, zoaz=vi iras, doa=li aŭ ŝi iras; goaten=ni iras, zoazten=vi iras, doazten=ili iras.

Konjugo de ceteraj verboj okazas tiel: verbo havas tri formojn, nome: estanta, estinta kaj estonta. Estanta aŭ nuna finiĝas per *ten* aŭ *tzen*, estinta estas la vera verbo, kaj estonta finiĝas per *go* aŭ *ko*. Al tiuj formoj oni antaŭmetas helpan verbon *izan* (havi kaj esti), kiu multe varias laŭ ĝi estas en aktiva aŭ en neaktiva formo, kaj laŭ la ĉefa verbo posedas aŭ ne posedas komplementojn.

Ekzemplo de konjugo neaktiva

Erortzen	naiz=mi	}	falas	Erori	naiz = mi	}	falis
erortzen	zera=ci			Erori	zera = ci		
erortzen	da = li			Erori	da = li		
erortzen	gera=ni			Erori	gera = ni		
erortzen	zerate=vi			Erori	zerate = vi		
erortzen	dira=ili			Erori	dira = ili		

Eroriko	naiz	}	falos
eroriko	zera		
eroriko	da		
eroriko	gera		
eroriko	zerate		
eroriko	dira		

Ekzemplo de Aktiva verbo, kun nur direkta komplemento

Ematen	dut = mi	}	donas	Eman	dut = mi	}	donis		
Ematen	duzu = ci			donas gin	Eman			duzu = ci	donis gin
Ematen	du = li			au donas	Eman			du = li	au donis
Ematen	dezute=vi			tion	tion
Ematen	dute = ili		
			

Emango	dut	}	Mi donos	
Emango	duzu			donos gin
Emango	du			au
...	...			donos tion
...	...			

Konjugo de aktiva verbo kun du komplementoj

Ematen diot=Mi ĝin donas al li Ematen dizut=mi ĝin donas al ci
 ematen diozu=Ci ĝin donas al li ematen diguzu=ci ĝin donas al ni
 ematen dio=li ĝin donas al li emango dizkiot=mĭ ilin donos al li
 ematen diogu=mi ĝin donas al li eman dizkiogu=ni ilin donis al li
 ematen diozute=vi ĝin donas al li eman dizkidate=vi ilin donas al mi
 ematen diote=ili ĝin donas al li

Kaj multaj aliaj, devenantaj de la kombinoj de la du komplementoj. De la supraj ekzemploj oni konkludas ke la helpa verbo entenas la ideon helpan kaj la du komplementojn, ni malkunigu iujn ajn, ekz:

Diote=*di*, helpa verbo; *o*, al li; *t*, mi.

Diogu=*di*, helpa verbo; *o*, al li; *gu*, ni.

Dizkiot=*di*, helpa verbo; *ski* radiko por montri multenombrojn, *o* al li, *t*, mi.

Tio estas sendube malfacila por la fremduloj, sed malmultaj lingvoj povas prezenti pli perfektan kaj pli logikan kunmetadon.

(Daŭros)

XV^a Kongreso de K. E. F. Vinaroç

8-9 Setembro 1928

Ni povas hodiaŭ doni gravajn kaj kontentigajn novaĵojn pri la kongreso en Vinaroç, kies dato pli kaj pli alproksimiĝas.

Ni scias ke la Urbkonsilantaro de tiu urbo ĵus voĉdonis monhelpon da 1.500 ptoj. por la organizado de nia kongreso; tio montras kun kia intereso la urbo laboras por la sukceso de nia ĉiujara pure esperantista festo.

Ankaŭ la urbeŝtaro decidis doni la nomon de D-ro Zamenhof al unu el la stratoj de la urbo, kaj tiu estos jam la kvara urbo en nia lando kie ni havas straton kun la nomon de nia kara Majstro.

Necesas nun ke ĉiuj katalunaj samideanoj faru al si devon partopreni nian kongreson, kaj ĉiu klopodu varbi amikojn por veturi al Vinaroç. Ni devas konsideri ke tiun ĉi jaron, ĉar la kongreso okazas en urbo kie la esperantistoj estas ankoraŭ tiel malmultaj, nia festo devas esti precipe propaganda festo kaj sekve ni devas veturi multnombro por ke la Vinaroçanoj konstatu la amplekson de nia esperantista movado.

De vi dependas ke la esperantismo tie faru aŭ ne fortan impreson.

Pri Sinjoro Halevin!

(*Mezepoka flandra Kanto*)

Kanteton kantis Halevin';
Ĉiu aŭdant' sopiris lin.

Kaj tion aŭdis reĝidin',
Kies gepatroj amis ŝin.

Al sia patro petis ŝi:
«Ĉu iri povas mi al li?»

—«Ho ne, filino, ne vi, ne;
Vi ankaŭ ne revenus, ve!»

Al la patrino petis ŝi:
«Ĉu iri povas mi al li?»

—«Ho ne, filino, ne vi, ne;
Vi ankaŭ ne revenus, ve!»

Al la patrino petis ŝi:
«Ĉu iri povas mi al li?»

—«Ho ne, filino, ne vi, ne;
Vi ankaŭ ne revenus, ve!»

Al sia frato petis ŝi:
«Ĉu iri povas mi al li?»

—«Ne gravas kien iras vi,
Se vian ĉaston gardos vi
Kaj kronon rekte portos vi.»

En ĉambiron iris la knabin';
Kiel por fest' ŝi vestis sin.

Per kio vestis ŝi la korpon?
Per delikata ĉemizeto.

Kion ŝi portis sur la bluz'?
Juvelojn el brilanta or'.

Kaj kion sur la ruĝa rob'?
Je ĉiu flank' ora buton' .

Kio ornamis ŝian kolon?
Maloftajn, multekostajn perlojn.

Kio do brilis en la har'?
Multpeza kron' el pura or'.

Eksidis ŝi sur la ceval'
Plej bona el la patra stal'.

Sidante kiel kavalir',
Ŝi ĝoje rajdis tra l' arbar'.

Kaj en l'arbaro Halevin'
Subite ekrimarkis ŝin

Li diris: «Mi salutas vin,
Ho, brunokula virgulin'!»

La vojon kun li ŝi daŭrigis,
Kaj multon ili preparolis.

Ĉe pendtrabejo ili venis;
Virinkadavroj tie pendis.

Kaj diris tiam Halevin' :
«Elektu, bela virgulin' ,
Kiel mi tuj mortigos vin.»

—«Nu, se elekti povas mi,
Perglavan morton ŝatas mi.

Sed la mantelon vi demetu:
Sang' virgulina forte ŝprucas;
Mantelon vian ne makulu.»

Dum li demetis la mantelon,
Jam lia kapo terenfalas.
Lang' lia ankoraŭ parolis:

«Jen iru en la tritikon
Kaj ludu mian kornon,
Ke aŭdu ĝin miaj amikoj!».

—«Ne en tritikon iros mi,
Ne vian kornon ludos mi,
Ne laŭ dir' via agos mi.»

—«Sub la pendtrabon iru vi,
Balzampoteton prenu vi,
Kaj mian kolon ŝmiru vi.»

«Ne sub pendttrabon iros mi,
Ne vian kolon ŝmiros mi,
Ne laŭ dir' via agos mi.»

La kapon prenis ŝi ĉe l' haroj
Kaj lavis ĝin en fonto klara.

Sidante kiel kavalir' ,
Ŝi ĝoje rajdis tra l' arbar' .

Kaj duonvoje la patrin'
De Halevin' renkontis ŝin:
«Ĉu mian filon vidis vi?»

—«Mortinta estas via filo;
Neniam plu vi lin revidos.

Li estas morta, Halevin' ;
La kapon portas mi ĉe l' sin',
La ruĝa sang' makulis min.»

Venante ĉe la kastelpord' ,
La kornon ludis ŝi kun fort' .

Kaj ŝia patro, je l' eksci'
De tio ĉi, tre ĝojis li.

Okazis festoj kaj festen' :
La kap' sur tablo staris jen.

Tradukis,

JAN VAN SCHOOR.

Bibliografio

RIBELEMAJ VIRINOJ (*Uan-Caŭ Ĉin*), moderna ĥina dramo en du aktoj de M. Ĉ. Kuo, tradukita de Ŝ. M. Chun. Jen la tria numero de «Ilustrita Biblioteko», kun titola bildo de F. Dücker kaj ilustraĵo de Ilse Hofman. Interesege verketo, kvankam iom stranga por ni, okcidentuloj; moderna ĥina dramo laŭ la nuna teatra vermaniero, kiu vere estas granda ŝanĝo en la orienta literaturo.

Pri ĝi, diras la tradukinto en la antaŭparolo: «Kiel la aŭtoro diras mem en la antaŭparolo, la dramo «*Uan-Caŭ-Ĉiu* estas produkto de lia propra fantazio sed bazita sur historio. La aŭtoro intencas per ĝi elmontri kiel ĥina virino ankaŭ scias ribeli en la katenoj de pseŭdomoralo, kiun la viroj altrudas al ili je la malbono ekskluzive de la virinoj».

Pli ol dremo, «Riibelemaj Virinoj», estas preskaŭ tragedio, kies fino—pro la neatendata sceno de la monologo de la reĝo kun la detranĉita kapo de la pentristo—strangas iomete al niaj antaŭjuĝoj. Tamen, la unua akto estas bonega, perfekta, kiel moderna dramo; kaj la dua, sen tiu monologo, estas ankaŭ akceptebla kaj bona.

La tradukado estis tre zorgita de S-ro. Chun, kaj per ĝi oni komprenas—unu fojon pli—la majstran taŭgecon de Esperanto por ĉiuj lingvoj el la mondo.

Niaj gratuloj al «Heroldo de Esperanto» kiu ĝin eldonis, pro la fakto meti «Riibelemaj Virinoj» inter la esperanta libraro.—*Kodo*.

KVIN VIVOKANTETOJ.—Tekstoj originale verkitaj de Catharina J. Roskes-Dirksen, muziko de H. Windisch-Sartowsky. Menciitaj dum la XII^aj Esperantistaj Floraj Ludoj en Santa Coloma de Farnés.—Prezo: Fl. 0,90. M. 1'50. Havebla ĉe S-ino Roskes, Anemoonstrato 96, Hago (Nedrl.) kaj ĉe S-ro Windisch, Lindenstr. 35 b. Berlino-Niederschönhausen (Germ).

Jen florbukedo antaŭ ni: «Kvin Vivokantetoj» nome: 1 Se la homo...; 2 La flirtemulo; 3 Knabino; 4 La surprizo; 5 Majstro. Poeziaĵo de S-ino Roskes-Dirksen, jam konata de niaj legantoj per la belaj poemetoj kiujn ni publikigis, kelkaj el ili premiitaj en la Floraj Ludoj. Ŝi havis la ĝentilecon skribi sub la titolo «Menciitaj en la Internaciaj Esperantistaj Floraj Ludoj en Katalunlando 1926».

Muziko tre agrabla precipe, por mi, en «La flirtemulo»; ankaŭ «Se la homo...» estas bela melodio. «La surprizo», kvankam komence estas iom monotona pro la ripetado de tri strofoj sur la sama muziko, estas en la dua parto gracia kaj ŝatinda. «La Majstro» bele solena kaj «Knabino» iom plaĉa, malgraŭ la kvarstrofa ripeta-

do. Ĝenerale, bona teksto, kaj bona muziko. Ĉiuj muzikamantoj devus ĝin aĉeti kiel kuraĝigo al la geaŭtoroj, kaj kiel honorigo al nia kara samideanino S-ino Catharina Roskes-Dirksen.

La aspekto kaj preso estas tre bona.—*Kodo.*

Pri la Movado

ZARAGOZA.—La 15^a de Aprilo okazis en la salono de Casino Mercantil propaganda kunveno en kiu paroladis S-roj Orós, Legaz, Acbón, Marín kaj Sancho Izquierdo. Kiel rezultato de la sukcesinta kunveno kurso estas malfermita.

Nia amiko S-ro Maynar redaktas esperantan fakon en nova ilustrita gazeto kiu aperas en tiu ĉi urbo.

LITERATURA KONKURSO.—En Sevilla okazos la 15^an de Novembro de la nuna jaro Internacia Literatura Konkurso. La Ĵuĝantaro konsistas el S-roj Th. Cart, Prezidanto de la Akademio, J. M. Warden, Akademiano kaj L. Belmont, fama poeto.

PRUVO DE LA DISVASTIĜO DE NIA LINGVO.—La germana ĵurnalo Chemnitzer Tageblatt entreprenis pere de Esperanto enketon pri la demando: Kiel oni parolas pri ni». Estas ricevitaj leteroj el 50 malsamaj landoj. La traduko de tiuj leteroj aperis en tiu ĵurnalo en la 4^a de Aprilo kaj tio estas certe interesa propagando ĉar tio montras la intensan disvastiĝon de nia mondlingvo.

INTERNACIA VORTARO ESPERANTA.—Ni ricevis cirkuleron subskribitan de S-ro P. Stojan per kiu li, en la nomo de Bibliografia Servo de U. E. A., raportas pri sia plano por la pretigado de Internaciaj Vortaro Esperanta, laŭ la modelo de Kabe kaj Boirac, t.e. kun esperantaj difinoj kaj sen naciaj tradukoj. Ni ne povas publikigi la tutan cirkuleron pro manko de sufiĉa spaco, sed ni povas nur laŭdi la projekton kiu plifaciligos la uzon de nia lingvo kaj eĉ la presadon de naciaj vortaroj de Esperanto.

ALIĜO AL ANTVERPENĀ KONGRESO.—La Barcelona Farmacia Kolegio aliĝis al la Univerŝala Kongreso de Esperanto.

PERSONA KLARIGO.—S-ro Butler kiu sendis protestan cirkuleron kontraŭ U. E. A. pro la uzado de *io* kiel sufikso por landnomoj, nun sendis alian en kiu, ĉar tiu societo decidis reveni al la antaŭaj kaj obei la decidojn de la Akademio kiu sola rajtas pri la lingvo, li realiĝas al U. E. A. kaj rekomendas al ĉiuj agi kiel li.

PRAHAJ FESTOJ.—Okaze de datreveno de martira morto de Sankta Veneslao okazos en Praha la venontan jaron grandaj festoj. La porfremdula komitato sendis cirkuleron invitante la esperantistojn helpi ne nur per sendo de dokumentoj pri la nomita sanktulo sed ankaŭ per multnombra ĉeesto en Praha, kie samtempe okazos la Katolika Esperantista Kongreso.

NOVA SENTO.—Tiu laborema societo malfermis la pasintan monaton novan kurson de Esperanto, sub gvido de Prof. Artur Domenech. Ni gratulas la nelacigeblan grupon.

PREMIITO.—En la konkurso por la kongresinsigno en Antverpeno ricevis la unuan premion per sia desegnaĵo nia amiko S-ro Jacinto Comella el Vidh. Ni kore lin gratulas pro lia sukceso.

FERVOJISTOJ.—Estas fondita Hispana Ligo de Esperantistaj Fervojistoj. Ĝia Prezidanto estas S-ro Luis Rodriguez Escartin. Adreso: Liga Española de Ferrovíarios Esperantistas. Apartado 820, Madrid.

ATENCO.—Kiel oni povis legi sur la ĵurnaloj, la jugoslava eksministro S-ro Stepan Radić estis vundita en la parlamento mem. S-ro Radić la fama jugoslava politikisto estis ĉiam tre favora al Esperanto kaj partiano de la enkonduko de la internacia lingvo en la lernejojn. Multaj diverslandaj esperantistoj sendis al li proteston kontraŭ lia atenco kaj bondezirojn pri resanigo. Ni ankaŭ esperas ke S-ro Radić fartos baldaŭ bone kaj estos denove preta favori nian movadon.

Nekrologio.—Nia bona amiko S-ro JAUME CLARAMUNT, ekskomitatano de nia Esperantista Federacio, fondinto de la societo «Nova Sento» mortis en Barcelono la 12^an de Julio.

Ni esprimas al lia malĝojigita familio nian sinceran kondolencan.

La proksima numero de nia gazeto, kiu enhavos ilustraĵojn de nia kongresurbo, la programon de la kongreso kun ĉiuj detaloj pri loĝado kaj vojaĝo kaj la verdikton de la Floraj Ludoj, aperos nur en la lastaj tagoj de Aŭgusto.

Estatuts de la Federació Catalana d'Esperantistes

Article primer.—Amb el nom de «Federació Catalana d'Esperantistes» hom constitueix una federació d'esperantistes en terres de llengua catalana.

Art. segon.—L'objecte de la «F. C. d'E.» és la unió de tots els esperantistes en terres de llengua catalana per a la divulgació i propaganda de l'Esperanto, pels fins de la representació aconsellada en la reunió general del V Congrés Internacional d'Esperanto celebrat a Barcelona, per a complimentar tots els acords i resolucions, que afecten als esperantistes com a col·lectivitat, emanats dels Congressos Internacionals o dels nuclis directors de la llengua del Dr. Zamenhof.

Art. tercer.—Per a el millor compliment de l'article anterior, la «F. C. d'E.» publicarà una revista, l'organització de la qual serà determinada per un reglament especial interior publicat pel cos de redacció i prèvia acceptació del Comitè Directiu. El preu de l'abonament a la revista serà de sis pessetes anyals.

Art. quart.—La «F. C. d'E.» constarà de membres associats i de membres isolats; els primers seran federats per mitjà de l'entitat a la qual pertanyin i els altres directament i en caràcter particular.

Els diversos organismes pertanyents a la «F. C. d'E.» contribuiran el seu sosteniment amb la quota trimestral, pagada a la bestreta, de 0'40 ptes. almenys per cada soci i els individuals amb una quota mínima de 3'50 ptes. anuals, pagada a la bestreta.

Art. quint.—La «F. C. d'E.» serà regida per un Comitè Directiu, renovable cada any, compost de President, Vice-president, Secretari, Vice-secretari, Comptador, Caixer, Administrador i quatre Vocals.

Art. sisè.—El Comitè de la «F. C. d'E.» convocarà almenys una vegada a l'any, en diferents localitats, durant la primavera i en dia festiu, tots els federats, en Assemblea o Congrés general, en el qual, prèvia ordre del dia hom donarà compte als assistents dels treballs i gestions acomplerts pel referit Comitè Directiu durant el seu exercici, hom acordarà el lloc on deurà celebrar-se el vinent Congrés o Assemblea, hom nomenarà els individus que deuran constituir el Comitè el pròxim exercici, i hom discutirà les proposicions que hagin estat presentades abans de la sortida del número de la revista anunciant el Congrés o Assemblea, i anunciades en l'ordre del dia.

Art. setè.—El Comitè serà facultat per a crear les seccions que cregui més convenients per a la prosperitat de la «F. C. d'E.» i de l'Esperanto, les juntes de les quals seran renovades per cada Comitè de bell nou elegit.

Serà president nat de cada secció un individu del Comitè designat pel mateix.

Art. vuitè.—Tots els esperantistes pertanyents a organitzacions federades tindran veu i vot en les Assemblees anuals, però el seu vot serà delegable al president d'un grup o una altra persona qualificada, prèvia la presentació dels corresponents carnets de soci.

Art. novè.—Tots els acords de les Assemblees o Congressos seran presos per majoria absoluta de vots dels socis assistents. Les esmenes que puguin presentar-se a aquest reglament deuran ésser presentades amb la deguda antelació per tal d'incloure-les en l'ordre del dia i publicades en la seva totalitat, puix que només podran ésser discutides i aprovades en les Assemblees o Congressos generals.

Art. desè.—La llengua oficial de la «F. C. d'E.» serà l'Esperanto, podent també emprar-se la catalana en les Assemblees.

Art. onzè.—Aquesta «F. C. d'E.» podrà actuar mentre compti amb dues col·lectivitats organitzades o trenta membres isolats. En cas de dissolució, previ acord d'ella, l'actiu existent serà lliurat al caixer de la Constant Representació de les Societats Nacionals Esperantistes.

Art. transitori.—La «F. C. d'E.» serà domiciliada a Barcelona carrer València, 245.

Noves edicions

R. U. R. Rosumaj Universal Robotoj. Drama de Capek-Karel. Representat amb gran èxit en el Teatre Romea de Barcelona. Traduït a l'Esperanto per Moraviaj Esperanto Pioniroj. Preu 3'50 pessetes.

JAVA-J LEGENDOJ. Liem Tjong Hie; molt recomanable. Preu 1'25 pessetes.

CURS PRACTIC DE LA LLENGUA ESPERANTO. Pujulà Vallés. Preu, 0'70 pessetes.

ENCIKLOPEDIA VORTARO de WÜSTER. Han sortit fins avui tres parts; cada una val 21 pessetes.

MAŠINFKA ESPERANTO VORTARO PRIELEMENTA. Wüster. Preu 2'80.

UNIVERSALA ESPERANTISTIGILO; D-ro Benson, en ses lekcioj, eldonoj kataluna aŭ hispana. Cada lliçó: 1 pesseta.

Nota: Cal afegir el 5 per cent dels preus senyalats, per les despeses de correu, en cas d'ésser els llibres enviats fora de Barcelona. Cal que l'adreça sigui ben clara.

Dirigir-se a Ferd. MONTSERRAT, Villarroel, 107, 2.^a, 2.^a Barcelona. IBERIA ESPERANTO SERVO.

XV^a Kongreso de la Esperantista Federacio


VINAROÇ 8-9 Septembro 1928^a




PAROĤA PREĜEJO



ERMITEJO SANT SEBASTIÁ




KASTELO EN PENYÍSCOLA



LA HAVENO




PLACO DE LA KONSTITUCIO




LA URBO PENYÍSCOLA



LA MARBORDO



PENYÍSCOLA - ÂGENERALA VIDAJO



VINAROÇ - KOMERCA HAVENO

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA ESPERANTISTA
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

VINAROÇ

La vila natal del nostre volgut company Sebastia Chaler, a l'activitat i fervor esperantistes i patriòtics del qual devem la celebració enguany del Congrès de la nostra Federació, és franca, generosa, acollidora i progressiva com poques al món. Per això ens espera amb una cordialitat que no poden sospitar els qui no coneixen Vinaroç; i per això es daleix avui per l'ideal sant i la gran conquesta cultural dels nostres temps, que constitueix la llengua internacional, la genial obra de Zamenhof.

Vinaroç és curulla d'evocacions històriques, perquè és rica de fills il·lustres perquè és privilegiada de Natura, perquè és capdavantera en tota lluita per la gran causa de la llibertat, que vol dir civilització, superioritat humana, magnanimitat.

Vinarocencs són:

Costa i Borràs, bisbe i arquebisbe que fou de Barcelona i de Tarragona respectivament.

Messeguer i Costa, bisbe de Granada.

Lassalle, el nom del qual és d'anomenada universal.

El Pare Bover, jesuïta eminent.

Aiguals de Izeo, gran literat.

Safonç, excellent poeta.

Rafels Garcia, notable historiador i polític que fou mantes voltes diputat.

Josep Manuel Borràs Jarque, poeta i historiador contemporani.

Vinaroç ens recorda el fet històric transcendental d'un antipapa.

Sant Sebastia és el Patró de Vinaroç; protegeix, salva i fa miracles als mariners vinarocencs.

Sant Sebastia, Patró de Vinaroç, guiarà la nostra passada esperantista d'enguany per terres de Castelló de la Plana, del Regne de València, de la Pàtria d'Ausiàs March.

DELFI DALMAU.

"KATALUNA ESPERANTISTO"

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTISTA FEDERACIO

Membra kotizajo: 3'50 p.; Grupoj: 1'20 por membro.

Jarabono: 6 p. eniande kaj 6 sv. fr. internacie. provokzemplero 2 respondkuponoj.

Federacia sidejo kaj redaktejo: carrer València, 245-BARCELONA

LA DEK DEVOJ DE LA ESPERANTISTO

1. Bone sciu la lingvon, traktu ĝin kun respekto, kaj lasu la versfaradon al poetoj.

2. Esperanton uzu parolante, studu legante kaj ne fuŝu skribante.

3. La plibonigistoj diskutu; vi Fundamenton sekvu kaj fide-la restu.

4. Propagandu ĉiam, ne ĉie; klarigu, ne prediku; rakontu faktojn, ne esperojn.

5. Kion vi povas lerni nur en unu semajno, ne instruu en unu horo; el malgravajoj ne faru regulon, kaj el la regulo ne faru malgravajon.

6. Verkante en Esperanto, ne kedu interesa, kion nacilingve neniu legus; ne imagu, ke preseraroj plibeligas libron, ne malesperu, se mankas aĉetantoj.

7. Al grupo aliĝu; la kunvenon vizitu; Esperanton parolu. Subtenu K. E. F.

8. Atentu, ke internacia lingvo vivos nur per uzado; memoru, ke tial internacia organizaĵo estas necesa, senlace varbu por U. E. A.

9. Legu gazeton, por ke vi konu faktojn; novajn abonu, por ke ĝi povu ekzisti; kunlaboru, por ke ĝi estu interesa.

10. Por Esperanto kiel movado agu; por ĝi kiel realaĵo pagu, kaj kiel altan idealon konservu ĝin en via koro.



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA ESPERANTISTA FEDERACIO
KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gataro* Redakcio: *Carrer València 245 BARCELONA*

DIREKTORO: MARIAN SOLÁ

Pri nia Kongreso

La Organiza Komitato de nia XV^a Kongreso invitas vin hodiaŭ al Vinaroç. Ĉiuj preparoj kiuj povas certigi la sukceson estas jam fari-taj. La programon kaj ĉiujn detalojn pi loĝado kaj vojaĝo vi povas legi en aliaj paĝoj de tiu ĉi numero de nia gazeto.

Ni esperas kaj niaj amikoj en Vinaroç rajtas esperi ke la espe-rantistoj venos al la Kongreso en granda nombro. Memoru ĉiu ke nia ĉiujara festo devas esti precipe propaganda festo, kaj por veki en la loĝantaro intereson por Esperanto necese estas ke ni montru al ili ke nia anaro estas ja granda kaj rimarkinda.

La festo de la Internaciaj Floraj Ludoj havos tiom ĉi jaron, se eble, ankoraŭ pli da brilo kaj soleno. Ĝojo por la okuloj kaj por la animo ĝi alportas al ĉiu kiu havos la plezuron ĉeesti la poezian tur-niron.

Multaj valenciaj samideanoj promesis veni al nia kongreso kies okazigon ili vidas kun granda ĝojo. Ni atendas ĉiujn federacianojn kaj legantojn de nia gazeto kiujn ni jam de longe ne povis saluti. Al ĉiuj ni diras hodiaŭ: Ĝis revido en Vinaroç!

M. S.

XV^a Kongreso de la Esperantista Federacio

Vinaroç, 8-9 Septembro 1928

PROGRAMO

SETEMBRO, 8.

Matene, 9.^a.—Oficiala eniro en la urbon de la kongresanaro kun la grupaj standardoj, kun akompano de la aŭtoritatuloj, lokaj societoj kaj muzikistaro «La Alianza».

Tuj poste solena akcepto en la Urbodomo kaj Malfemo de la Kongreso.

10.—Malkovro de arta marmora tabulo kun la nomo de D-ro Zamenhof en la, ĝis nun nomata, strato Santa Bàrbara.

12 1/2.—Malfermo de la esperanta Ekspozicio en domo de la placo de Rovellar.

Posttagmeze.

13.^a.—Honora vino per kiu regalos la kongresanojn la Urbestraro de Vinaroç.

15.^a.—Ekskursoj al la haveno kaj akceptoj en la diversaj societoj de la urbo.

17.^a.—Ekzamencj por la diplomoj de kapableco kaj profesoreco.

19.—Labora Klunsido kaj Fermo.

22.^a.—Koncerto kaj balo en la ĝardeno de Centro Instructiu Republicà.

SEPTEMBRO, 9.

Matene, 8 1/2.—Solena Diservo en la Paroçia Preĝejo kun orgenludo, kantoj kaj prediko en Esperanto kiun faros Pastro J. Font Giralt, Profesoro en la Seminario kaj Prezidanto de la Internacia Katolika Societo Esperantista.

11.^a.—Solena Festo de la Internaciaj Floraj Ludoj, sub la prezido de Fraŭlino Maria de la Victoria Perez de Sanmillan, elektita kiel Reĝino de la Festo.

Posttagmeze.

14.^a.—Oficiala Festeno en la Nacia Publika Lernejo, Placo Rovellar.

18.^a.—Koncerto en la Placo de la Konstitucio per la fama muzikistaro «La Alianza» kiun direktas profesoro Mansciridor.

22.—Koncerto en la sama placo kiun ludos la nova ĥoristaro de la Centre Instructiu Republicà.

SEPTEMBRO, 10.

Ekskursoj al Penýscola, Sant Carles de la Ràpita kaj Alcanar. Vespere, propaganda kumveno en salono antaŭe anoncota.

HOTELOJ

Pension Torres. Prezoj: Pensiono, dek pesetoj potage. Unu manĝo: 5 ptoj.

Fonda Viuda Aparicio: Pensiono, dek pesetoj potage. Unu manĝo: 5 ptoj.

Fonda de los Tres Reyes: Pensiono, ok pesetoj potage. Unu manĝo: 3 ptoj.

Posada San Pedro: Pensiono, ok pesetoj potage. Unu manĝo: 3 ptoj.

—Oficiala Festeno: la partopreno en la oficiala festeno kostos 15 ptoj. Oni petas jam antaŭe anonci sian partoprenon en la festeno por faciligi la aranĝon.

—La organiza komitato de la Kongreso petas al la esperantistaj societoj ke ili venu al Vinaroĉ kun siaj respektivaj standardoj.

VETURADO AL VINAROĈ

Jenaj vagonaroj veturas al Vinaroĉ:

Iro: Barcelona (Correo) 21 1/2. Ĝi atingas la kongresurbon la 3 1/2 matene.

Barcelona (Ekspreso) 8,35 matene. Alvenas en Vinaroĉ je la 13,57.

Reveno: Vinaroĉ (Correo) 1,35 matene. Alvenas en Barcelono la 8,56 matene.

Vinaroĉ (Ekspreso) 13,9 ptn. Alvenas en Barcelono la 20,11 vespere.

La vojaĝo kostas en tria klaso 16,50 ptoj. La esperantista grupo Nova Stelo en Barcelono organizas kolektivajn vojaĝojn al Vinaroĉ: tiuj kiuj intencas veturi en tiu ĉi maniero ricevos rimarkindan rabaton en la vojaĝkosto. Por tio ili devas sin turni tuj antaŭ la 4^a de Septembro al la grupo NOVA STELO Abaixadors, 10 pral. Barcelono sendante sian aliĝon kaj krome 11,50 pesetojn kiu estas la duono de la vojaĝkosto.

Do, kiu volas la rabaton profiti, tiu rapidu skribi.

XIV Internaciaj Floraj Ludoj

VERDIKTO

ORDINARAJ TEMOJ

Originalaj tekstoj.

I—Versaĵo kantanta Amon

Natura Floro—Ĉefa Premio al la verko n-ro 42, devizita «Homa Sorto».

Kiel eksterordinaran premion de la Urbeŝtraro de Vinaroĉ oni aljuĝis al la sama verko 100—pesetojn.

Premio de S-ro Narcís Bofill—50 Ptoj. al la verko 41—«Savinien».

Premio de S-ro S. Alberich Jofré—50 Ptoj.—al la verko 46 «Cindrulino».

Premio de Sindicato de Policia rural—50 Ptoj.—al la verko 51—«Saluton al vivo».

Premio de Excmo. Sr. Gobernador de Castellón—50 Ptoj.—al la verko 23—«Koro».

Premio de Pósito Marítimo Terrestre—25 Ptoj.—al la verko 20—«Excelsior».

Menciindaj verkoj:

N-ro 44 «Varmaj Manoj» — N-ro 13 «Ĝojo, malĝojo de la viv' nutraĵo».

II—Proza Ama verkajo.

Neniu verko konkursis speciale por tiu ĉi temo.

Tradukitaj Tekstoj.

I—Esperantigo de kataluna versaĵo.

Premiita: neniu.

Menciindaj; verko n-ro 5 «Amo, amo, amo» kaj n-ro 6 «Lumon».

II—Esperantigo de kataluna prozaĵo.

Ne konkursita.

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

LIBERVOLAJ

Originalaj versaĵoj.

Premio de Pastro Joan Font Giralt, 50 Ptoj. verko 79 «Ni estu ĉiuj gefratoj».

Premio de U. A. B. E., 50 Ptoj. al la verko 40 «D. E.»

Premio de «Paco Kaj Amo». Ptoj. 50 al la verko 63 «Manjo».

Premio de Cooperativa Ojbrera «La Económica» 50 Ptoj. al la verko 49 «Antonia».

Premio de Póesito Marítimo «El Previsor» 30 Ptoj. verko 37 «Kion koro sentas lango prezentas».

Premio de Peña Taurina 25 Ptoj. al verko «Abundo apud abismo».

Menciindaj: verko 38 «Kion koro sentas lango prezentas IV».

» 53 «Al bono per amo».

» 14 «El Oriente venos lum' radia».

Originalaj prozaĵoj.

Premio Grupo Lumon, 50 Ptoj. verko 32 «Anatemo».

Premio Grupo Barcelona Stelo, 50 Ptoj. verko 77 «Ne tentes aut perŝice».

Premio de Grupo Nova Stelo, 50 Ptoj. verko 55 «Oni ekkonas birdon laŭ flugo».

Premio de Sociedad de Carreteros, 50 Ptoj. verko 56 «Ne en unu tago elkreskis Kartago».

Premio de D. Juan Ribera, 50 Ptoj. verko 54 «Verkado ne estas tiel facila».

Premio de Sociedades Albañiles y Carpinteros, 40 Ptoj. verko 59 «Tamen».

Premio de Sociedades de Peones y Barberos, 30 Ptoj. verko 2 «Madnova ideo en nova originala vesto».

Premio de Ateneu Mercantil, 25 Ptoj. verko 68 «Cigo».

Premio de Teo Jung (5 jara abono al Heroldo de Esperanto) verko 75 «La granda demando».

Mencioj: Verko 64 «Ŝanavan Og».

Verko 63 «Al saĝulo sufiĉas aludo».

Verko 25 «Edukado».

Verko 30 «Viktimoj».

Tradukitaj versaĵoj.

Premio de S-ro Delfi Dallmau, 50 Ptoj. verko 67 «Verona».

Premio S-ro Joan Gili Nortaj, 50 Ptoj. verko 62 «Ĉiu laŭ sia povo».

Premio de S-ro S. Chaler, 50 Ptoj. verko 61 «Orfeo».

Premio de Cruz Roja local, 50 Ptoj. verko 3 «Per nur dek du linietoj».

Premio de Centro Instructivo Republicano, 25 Ptoj. verko 33 «Coventry».

Mencioj: Verko 17 «Venko de l'koro».

Verko 48 «Flamo».

Verko 87 «Malsana fantazio».

Verko 82 «Alma parens historiae».

Tradukitaj prozaĵoj.

Premio de S-ro Marian Solà, 50 Ptoj. verko 57 «Se kion me ne scias, mi scius, Ĉiuj min envidus».

Premio de Esperantista Klubo Palma, 50 Ptoj. verko 86 «Amo ĉion toleras».

Premio de Banco de Castellón, 50 Ptoj. verko 78 «La pluvelfino».

Premio de Banco de Tortosa, 50 Ptoj. verko 71 «El la historio».

Premio de Círculo Católico Obrero, 25 Ptoj. verko 70 «Amo prudenta».

Mencioj: Verko 4 «Dokumento por la esperantistaro».

Verko 11 «Trinovantum».

Verko 15 «Bilardo».

Verko 27 «Paco».

Verko 8 «Nescio».

JOAN GILI NORTA, *Sekretario.*

Nuna Euskera-ĝiaj dialektoj

(Daŭrigo)

Kuriozaĵo de vaska lingvo estas la manko de resenda verbo; por esprimi tiun ideon vasko devas uzi turnparolon, kiel *sian kordon*, *sian kapon*; Ekz: Mutilakil du bere burna=Knabo mortigis sian kapon; tio estas, knabo mortigis sin mem.

Reciprokan verbon oni faras per aldona vorto *elkar* (unu la alian).

En gipuzkoa dialekto oni uzas ĉiam, por montri la demandan formon vorteto *al* samsenca ol la esperanta *ĉu*. En aliaj dialektoj ĝi estas malpli uzata.

Grandan nombron da adverboj posedas la vaskoj, kaj ankaŭ multaj adverbaj rilatoj formiĝas per sufiksoj. Ĉefaj estas:

la, on=tiu ĉi; onela=tiel; beste=alia, iu; bestela=alie.

z; oin= piedo; oinez=piede; zaldi=ĉevalo; zaldig=rajda, ĉevalrajde. Ki (post n, gi) kiel esperante *e*, edera=bela; ederki=bele; ona=bona; ongi=bone; ero; egun=tago; egunero=ĉiutage; ostegun=jaŭdo; ostegunero=ĉiujaŭde *ean*; (tempo)=etóri=veni; dato=li venas; dato renean=kiam li venas.

Ni ja diris ke deklinacio estas sinteza, pro tio, en Eŭskera ne ekzistas prepozicioj kiel en latina kaj latinidaj lingvoj, tiun rolon ludas la sufiksoj, multaj kaj definitaj, kaj ankaŭ la ordo de vortoj en la parolado, kiel okazas por distingi la subjekton el la direkta komplemento, aŭ la subjekton el la noma predikato.

Konjunkcioj estas ĉu plenaj vortoj, antaŭmetitaj al aliaj vortoj; ĉu sufiksoj aldonataj al la lasta vorto de la frazo. Ekzemplojn de la unuaj oni povas rimarki ĉe la kunigaj *etia, et, da, ta* (eble la *et* latina?); ĉe la malkunigaj *edo, ala, naig, bai* k. c.; ekzemploj de la duaj estas: 'Ko=ĉar, etori da, li venis; etori dalako=ĉar li venis; 'ta; 'zkeru, arren kaj aliaj.

Kiel en ĉiuj lingvoj, veraj interjekcioj estas krioj, nevolaj esprimoj; kaj pro tio egalaj en ĉiu popolo. Aliaj estas vortoj transigitaj; tio estas, nomoj, adjektivoj, verboj kaj adverboj uzataj kiel konjunkcioj, kiel ankaŭ okazas en ĉiu lingvo. Tiel estas *aurera!*= antaŭen, *biotz!*=koro (kuraĝo); *aruyo!*=fulmo k. a. Veninte al tiu punkto, oni devas konstati ke vaska lingvo posedas nek blasfemiajn nek fiparolojn. Kiam vasko koleriĝas, ordinare retranskviĝas post kriado de kelkaj *arayo* kaj *arano* (fulmo, kaj aglo), sed se li ne transkviĝas... li fiĝuras hispane aŭ france.

Sintakso.—Leganto de tiu verko sendube ja komprenis ke strukturo de vaska parolado estas malsana, pli ankoraŭ, kontraŭa, mala al esperanta. Pri tio diras Campion, gramatika kompetentulo: «Postmetado estas ĝenerala uzado ĉe la Eŭskera; oni postmetas artikolon al nomo; oni postmetas adjektivon al nomo, tiel kiel kelkaj el la pronomoj; oni postmetas la finiĝojn nomformantajn; oni postmetas la sufiksojn montrantajn ties rilatojn; oni postmetas al verbo la rilatajn kaj konjunkciajn partikulojn; oni postmetas la posedaĵojn al la posedanto, je la genitivo; oni postmetas la vortojn montrantajn aliformiĝon tempa, lokan, je la esprimata ago, kaj oni postmetas la verbon al ĉiuj la ceteraj membroj de la frazo, per ĝi finata kaj esprimata kun Cícera majesteco».

Nur kelkaj linioj pri vaska versfarado: Ĉar ĉiu silabo povas esti longa aŭ mallonga, ne ekzistas vera akcento kaj metriko bazas sur silabnumero kaj sur rimo. Versoj estas rimaj aŭ duonrimaj (rimo nur sur vokaloj). La plej uzata verso estas la deksilabo kaj la klasika strofo la *zortziko*, tio estas strofo okversa, propra al la samnoma melodio.

Literaturo

Vaska literaturo estas nek multenombra nek fremdlande konata. Se kleraj vaskoj sentis sin altirataj al literaturaj laboroj, pro la influo de fremda kulturo, ili skribis siajn verkojn ĉu latine, ĉu hispane, ĉu france. Princo de Viana, la glora Navarra reĝido kaj ama poeto; Malón de Chaide kaj Frato Diego de Estella, profundaj mistikoj; Ignacio de Loyola, fondinto de la Jezuitoj, kaj multaj aliaj, kvankam vasklingvanoj, neniom verkis vasklingve. Eŭskara verka-

do restis nur por meklera popolo, malriĉa. Krom tio, du naciaj kaŭzoj okazigis la malvastecon de Vaska literaturo, laŭ opinias nuntempa vaska kritikisto Salaverría: *Troa saneco*, ebliganta ekvilibron inter korpo kaj animo, kiu malpermesas al forta popolo senti la inŝpiron de malforteca Muzo, la dolorojn kaj angorojn de pasioj turmentantaj la animojn de nervmalsanaj lirikaj verkantoj; kaj *troa aroganteo*, naskita de ilia aktiva vivado, vivo de luktado kontraŭ malamikaj popoloj, kontraŭ tero kaj kontraŭ furioza maro, vivo kiu, per paradoksa fakto, kreas timemon por kanti iliajn herolĵojn.

Pro tio, vasko estas homo de vorto, de kanto, de krio; sed ne estas tiu, kiu fiksas, preparas kaj eternigas sian penson.

Tamen, ni nomign ŝa ne multenombrajn, sed valorajn ĉefverkojn.

Plej antikvaj, kiel en ĉiu popola literaturo, aperas eposaj kantoj. Pri tiu aspekto, inter aliaj, nur parole konservataj, oni trovas du belegajn verkojn: «Kanto de Lelo» kaj «Altabizkara Kanto».

Kanto de Lelo ŝajnas tre antikva, ĝi estas popola verko, plena de arĥaismoj. Komentariantoj multe fantaziis pri ĝia antikveco, kiun oni preterigas ĝis Aŭgŭsta tempo. Tamen kelkaj latinaj vortoj aperantaj en la teksto, malpermesas akcepti tiun opinion, ĉar estas nekredeble ke vaska popolo, tiam luktante kontraŭ Romaj soldatoj, ĵus venintaj en ĝian landon estus akceptinta al sia lingvo latindevenajn vortojn. Sed kvamkam oni maljesu tiel grandan antikvecon, la verko devenas almenaŭ el Mezjarcento, kaj eble la «rekantajo» estas Romtempa. Ĝi rakontas pri la situacio de Romanoj kaj Eŭskaroj, iliaj luktoj, iliaj pacoj, iliaj kontraktoj. Tiu verko estis trovata dum 17^a jarcento de arĥivserĉanto kaj poste forgesita ĝis komenco de XIX jarcento, kiam Vilelmo Humboldt denove studis ĝin.

Dua eposa ĉefverko, la Altabizkara kanto, estas ankaŭ de nekonata aŭtoro, sed la verkanto estis sendube klera homo, forte inspirata kaj bone konanta la artajn rimedojn. Li mezure kaj brile uzas ĉiajn figurojn, ekkriojn, gradaciojn, vortajn kombinojn. Ĝi rakontas la malvenkon de Franca Imperiestro Karlo la Granda, aŭ pli ĝuste de lia nevo Rolando ĉe la Roncesvala montkolo. Mi ne pritraktos pli detale la aferon, ĉar prezentita ties tradukajon al Internaciaj Floraj Ludoj de la pasinta jaro, ĝi atingis honoran mencion.

Lirikaĵoj poetistoj estas reprezentataj ĉefe de la «versolari» popolaj kantistoj. Ili, kiel la Runoj, la Bardoj kaj la Trobadoroj, kantas en la vilaĝaj festoj, en la geedziĝoj, en la bankedoj. Iliaj verkoj, ne perfektaj sed sinceraj kaj ofte belaj, kiel la birdaj padoj kaj la rozaj aromoj, naskiĝas en naturo kaj mortas en naturo.

XV^a Kongreso de la Esperantista Federacio


VINAROÇ 8-9 Septembro 1928^a




PAROĤA PREĜEJO



ERMITEJO SANT SEBASTIÁ




KASTELO EN PENYÍSCOLA



LA HAVENO




PLACO DE LA KONSTITUCIO




LA URBO PENYÍSCOLA



LA MARBORDO



PENYÍSCOLA - ÂGENERALA VIDAJO



VINAROÇ - KOMERCA HAVENO

sed ne pasas al presejo. Ili estas naivaj, simplaj, bonhumoraj, rememorigante la Anakreontajn odojn; ili pritraktas la vivajn plezurojn: bonan mangadon, bonan trinkadon, gajan dancadon je la tambursono; ĉefe ili laŭdas la forton kaj virton de la vino—la nura vaska maivirto—Ebie ne ekzistas popolo pli naive kaj pli senkaŝe laŭdanta la feliĉon de drinkado. Jen kiel finiĝas tre konata popola poemo:

Ni estas riĉuloj:
la trezoroj ĉiaj
Nun ja estas niaj.

Kontraŭe, malmulte oni laŭdas anon. Vaska amanto estas plej timema el ĉiuj amantoj. Liaj virinoj energiaj, luktemaj, seriozaj, laborantaj ĉujn terajn kaj domajn laborojn dum viroj marveturas, fiŝkaptas aŭ klopodas riĉiĝi en malproksima Ameriko, nur inspiras al ili plenrespektajn kantojn pri hejma feliĉo, gaja, paca, trankvila; sed ne la kuraĝajn, senkaŝajn proponojn kiel en aliaj lingvoj. Amaj poemoj vaskaj estas legindaj eĉ por malpliagaj infaninoj.

Kelkaj aŭtoroj supermontriĝas el la senmoma amaso de lirikaj poetoj; ni menciuj Ohienart'on, naskita en Soule, Iztueta'on; sed inter ĉiuj Indalecio Vizcarrondo'n, kiu sub la nomo «Vilinch» verkis belegajn poeziojn, nur kompareblaj al tiuj de Heine kaj de Bécquer. Li estis ne instruita viro, sed ennaske klera kaj forte inspirata. Se li estus naskita en alia vivrondo, li estus sendube la plej granda Eŭskara verkisto.

Inter la nuntempaj oni devas nomi E. Arrese, «Matxin-Gori», «Urtsuya» kaj la dolĉega poetino «Tene.»

Prozaj verkoj estis nur, ĝis antaŭ malmulte da jaroj, preĝejparoladoj, sed lastetempе oni verkis kelkajn menciindajn romanojn, novelojn kaj rakontojn, kaj oni tradukis aliajn—eĉ kelkajn ĉapitrojn de D. Kihoto—Nuntempa movado volas plivastigi eŭskaran lingvon tra ĉiuj literaturaj kampoj.

Multe ankoraŭ oni povus skribi pri vaska evoluo, influo de vaska lingvo sur hispanan, estonteco de vaska lingvo kaj popolo, se la timo deflankigi la temon kaj enuigi la leganton, ne konsilus al mi haltiĝi. Ke la nuna verko povu, per nia kara Esperanto, konatigi al tuta Homaro, malgrandam popolon pro ĝia nombro, sed grandegan pro sia genio, siaj homoj kaj siaj virtoj.

AMALIA NUÑEZ.

Premiita en la XIII^a Internaciaj Floraj Ludoj.

Flandra Mezepoka Juvelo

La legendo de Beatriso

Iu frato Ghysbrecht legis en la verko «Dialogus miraculorum», skribita proksimume en la jaro 1223, de Caesarius el la abatejo de Heisterbach, la legendon de Fratino Beatriso kaj konigis ĝin al la nekonata aŭtoro de la flandra mezepoka poemo «Beatrys» kiu poezie kaj kolorplene animis la sekan temon kaj prilaboris ĝin, inter la jaroj 1300 kaj 1350, kiel veran artjuvelon.

Per versfarado mi malmulte profitas,

La homoj al mi konsilas lasi ĝin,

Kaj ne plu longtempe suferigi mian koron...

Tiel li enkondukas la legendon. Sed lia amo al la Sankta. Di-patrina instigas lin prikanti ŝian laŭdon.

Vere, la mezepoko estis tempo de fajra, infana kredo. La kavallira literaturo el Flandrolando konis grandan disvastigon. Sed la piaj animoj kontraŭagis la respektigon por la tera amo, igante pli kaj pli sentama en tiuj verkoj. La ekleziaro estis devigata kontraŭtari la materialisman vivkoncepton en tia ja voluptema kavallirliteraturo. (Precipe en la t. n. Britaj aŭ Arthurrromanoj). Kontraŭ la virinokulto profana starigis la kulto al la Sankta virino, la Virgulino Mario. La pura, gracia figuro de tiu ideala virino estis tronita kaj ornamita per la nimbo de ĉiela amo. La timeganta animo de la simpla, pekkonscia homo mezepoka, dankeme sin levis al la dolĉa figuro de la bona, pardonema Mario.

Tiel ankaŭ nia nekonata verkisto, kies «Beatriso» restas alta eterna laŭdkanto al la Sankta Virgulino.

En lia verko Beatriso estis sakristiĉino en monaĥinejo kaj fajris pro sankta amo al la Sankta Virgulino. Sed tera amo por viro, kiun ŝi konis dum sia juneco, submetis ŝian koron. Kiel ajn ŝi batalis kontraŭ la tentado, tiu peka amo estis pli forta ol ŝi mem. Infante ŝi metis sian monaĥinoveston kaj siajn ŝlosilojn antaŭ la bildo de Mario, fervore preĝante kaj petegante al ŝi pardonon por la peko kiun ŝi estis faronta. Post tio ŝi forkuras al fremda lando.

LA FORIRO DE BEATRISO

Por frua meso sonorigis

Ĵus antaŭ mezonokto ŝi.

La amo, konsumanta flamo,

Doloris ŝin ankoraŭ pli.

Kaj kiam ĉiuj monaĥinoj,

Kantintaj dum la serv' en ĥor' ,
Ja ĉiuj, junaj kaj maljunaj,
Nun al dormejo estis for,
Ŝi restis sola en kapelo,
Kaj di-timante, tutanime,
Surgenuiĝis ĉe l'altaro,
Preĝante tie laŭkutime:
«Ne plu longtempe mia korpo,
Mari' , patrino, dolĉa nomo,
Elporti povas tian veston.
Naturan, koron de la homo
Vi bone kaj profunde konas.
Mi preĝis, fastis, Virgulin' ,
Kaj skurĝis mian pekan korpon.
Sed vane, am' submetas min.
Mi servi devas nun la mondon.
Sinjor' amata, tiel vere
Ke inter mortigistoj, vi
Al kruc' streĉiĝis mortsufero,
Ke revivigis vi Lazaron,
Vi tiel vere mian sorton
Ja konas kaj pardonos min.
Pekegoj kaŭzos mian morton.»
Post tio al Mariobildo
Ŝi iris, preĝis surgenu:
«Mari'», ŝi, kriis maltime,
«Al vi mi plendis fru-malfrue,
Malkaŝe mian kor-premegon,
Sed vane, ĉar ne helpis tio.
Mi vere perdus miajn sentojn,
Se plu longtempe, mi Mario
En monaĥinoveŝto vivus».
Kapuĉon ŝi demetis tie,
Ĝin lokis sur Marialtaron.
Demetis ŝuojn energie.
Aŭskultu kion ŝi nun faros!
Ŝlosilojn de la sakristi' ,
Por faciligi la ekserĉon,
Ŝi antaŭ bildo de Mari'
Pendigis, ĉar en ĉiu temp'
Sen pia ekrigardo iras,
Sen ke li dolĉe «Ave» diras,
Neniu preter bild' radia,

«Ave Maria».

Dum sep jaroj Beatriso vivas feliĉe kun sia amato, sed tiu ĉi, kiam malsatego suferigis ilin, malfidele forlasis ŝin kaj ŝiajn du infanojn. Tiam por gajni la pamon por siaj malfeliĉaj infanoj, ŝi dum sep jaroj, la koro rompita, vivas mizeran, diboĉan vivon. Sed neniam ŝia animo tute subigis, ĉar neniam ŝi preterlasis preĝi plenfide al Mario por ke tiu konvertu ŝin. Tamen fine ŝia pento iĝis tiel granda, ke ĝi instigis ŝin reiri al la monaĥinejo. Almozpetante ŝi venis en la najbarajo kaj pasigis la nokton ĉe kompatanta vidvino.

Miregante ŝi eksciigas ke Beatriso ankoraŭ ĉiam ekzemple servas en la monaĥinejon kaj famiĝis kiel sankta fratino. En revo Mario ĉion klarigas al ŝi kaj tri fojojn ŝin admonas reiri al monaĥinejo dum la nokto. Ŝi faras tiel kaj vere la Dipatrimo mem, dum la foresto de Beatriso anstataŭis ŝin.

LA REVENO DE BEATRISO

La pordojn ĉiujn malfermitajn,
Venante en l' arbej' ŝi vidis.
Sen iu timo ŝi eniris.
La fido je Mari' ŝin gvidis:
«Ho dankon, Sankta Virgulin' ,
En tiu domo mi revenas,
Ke Dio nun protektu min,
Mi lian sanktan nomon benas!»

En la kapelo ŝi efektive trovas sian monaĥinan veston sur l' altaro kaj daŭrigas sian preĝon al Mario:

«Indulgon ĉiam trovas ĉiu
Petante ĝin al vi fervore.
Senlima estas via bono,
Ĉar vere, kiam mi dolore
Suferis, vi ĝojigis min.
Nun malfeliĉ' de mi foriĝis
Ho, mi plenkore gloras vin!
Al ŝi en sama lok!' vidigis
La sakristiŝlosiloj antaŭ
Mario, kaj ŝi ilin prenis.
Je ĉiu flank' de l' altarejo
Ŝi vidis, kiam ŝi envenis
Helklare bruli ĉiujn lampojn.
Ŝi, kiel ja antaŭe, metis
Sur ĉies lokon preĝolibron,
Kaj al Virgin' Mario petis
Protektion kontraŭ malbonsort'
Por la infanoj, kiujn ŝi lasis

Ĉe la vidvino, en ĉagren'.
 Dum tiu temp' la horoj pasis,
 Kaj kiam frapis mezonokt',
 Ŝi sonorilan ŝnuron prenis
 Kaj sonorigis por frumeso,
 Ke ĉiuj el dormejo venis
 Rapide, ne sciante ion.
 Ŝi ĝis la morto tie restis
 Sen malglorego nek riproĉo:
 Mari' por ŝi servinta estis,
 Dum ĉiuj tiuj longaj jaroj.
 Do konvertiĝis pekulino,
 Je l' glori, honoro de l' reĝino,
 De la ĉiel-virgin' Mario,
 Helpante ĉiam kaj en ĉio,
 l' Amikon sian en sufero,
 Klor-premegata de l' mizero.

El tiu mezepoka perlo de la flandra literaturo parolas jam vera artisto. Per neesprimebla delikata, takta sento li pentras en «Beatrys» la batalon inter la du amoj, kiuj vivas en ŝia koro, la monda, kaj la ĉiela.

Ĉe Caesarius la deloganto de Beatriso estas ekleziulo, sed en la flandra verko li estas junulo, amiko el ŝia junaĝo. Des pli ŝia peko estas komprenebla kaj des pli granda devas esti ŝia interna animbatalo. En la originalo ŝian diuboĉan vivon kaŭzas nur honto kaj malsato sed ĉe nia aŭtoro ŝi agas pro patrina amo. Tiuj ĉi detaloj provas la superecon de la flandra prilaboro, kiu estas skribita en meznederlanda lingvo freŝa, natura, preskaŭ infane simpla.

Nur unu sola manuskripto estas konata de «Beatrys». Ĝi kuŝas en la Reĝa Biblioteko en Hago.

Le legendo inspiris jam diversajn verkistojn kaj aperis francaj, germanaj, anglaj kaj nederlandaj prilaboroj. Laste la flandra verkisto Herman Teirlinck metis ĝin sur la scenejon sub la titolo «Mi Servas». Interesa provo de modernigo de la teatro.

La mezepoka fratino Beatriso restas ĉiam juna. Ĝi apartenas al tiuj mezepokaj poeziaĵoj en kiuj la tera kaj la surtera vivo sin tuŝas. Kiele sur la pentraĵoj de Memling kaj Van Eyck, ŝajnas «ke en ili la ĉielo estas malsupreniĝinta sur la tero, kvazaŭ Mario kaj Jezuo kaj la profetoj vivis en Flandrolando».

H. L. J. VERMUYTEN.

Menciita en la XIII^aj Internaciaj Floraj Ludoj.

Invito Persona al S-roj. Rómulo S. Rocamora kaj Julio Mangada Rosenörn

Pro denuncoj kaŝaj kontraŭ mi faritaj al la Provincestro, hodiaŭ, la 22an. de aŭgusto, mi devis ekŝiĝi de la Prezido de nia Federacio mi ricevis ordonon fermi mian profesian laborejon, dum pli definitivam ordonon mi atendas kiel rezulton de tiuj denuncoj.

Nia Kongreso nunjara okazos post kelkaj tagoj ekster Katalunujo en nia frata regiono Valencia, en nia komuna Ŝtato hispana.

Tie, en la ĉarma urbeto Vinaroç, sub patronado kaj prezido de oficialaj aŭtoritatoj, ni kongresos kiel jam dufoje ankaŭ ekster Katalunujo, en Majorko.

Tie, malkaŝe, antaŭ la kongresanaro, kie la vero pri nia agado estas konata de multaj, se tiam mi ne estos en malliberejo aŭ ekzilo, mi atendos vin, vi diru publike, responde, niajn pekojn, kulpojn aŭ krimojn.

Nia Federacio estis ĉiam superordinare malavara. Ĝi abunde pagos vin por la klarigoj. Ĝenerale ni ne demandis aŭ prizorgis ĉu esperantisto estis aŭ ne kunfederaciano aŭ membro de Grupo aliĝinta, eĉ por nomi lin Komitatano. Honorige ankaŭ nia Federacio enskribis samideanojn el iu ajn regiono aŭ lando, kiam ĝi ricevis de ili favoron, fervoron, servon aŭ honoron. El iu ajn regiono aŭ lando, kvazaŭ divene ke iam, kiel efektive nun, ĝi ne povus uzi sian devenan lokadjektivon en sia nomo. Ĝoje, naive ni premios vin se vi venos lumigi niajn kunvenon per via scio, sento, parolo.

Aŭdi preta, respondi diligenta, danki malaavara, mi, simpla federaciano, vin atendos, vin atentos dum nia Kongreso en Vinaroç.

DELFI DALMAU.

Pri la Movado

UNIVERSALA KONGRESO.—Jus okazis en Antverpeno la XX^a Universala Kongreso de Esperanto kum ĉeesto de 1.500 esperantistoj el 38 malsamaj landoj. Ĉirkaŭ dek kvin personoj el nia malgranda lando veturis al Antverpeno por la kongreso. Pro manko da tempo li ne povas ankoraŭ publikigi raporton pri ĝi; tion ni volonte faros en la venonta numero de la gazeto.

PRELEGO.—La konata samideano S-ro Conrad Doménech faris la 22ⁿ de Aŭgusto en la ĉambro de la grupo «Lumon» en Terrassa interesan prelegon pri la malgranda lando Andorra, priskribo de ĝia geografio, politika organizo kaj moroj. La parolanto montris kiel perfekte li konas la ĉarman kaj malgrandan valon de Andorra. Multaj samideanoj venis al la grupo por aŭskulti nian amikon, kaj dankis lin per kora aplaŭdado.

PALMA DE MALLORCA.—La «Esperantista Klubo Palma» festis la 22^a datrevenon de sia fondiĝo. Laŭ raportoj de la lokaj ĵurnaloj ni povas diri ke ĉiuj festoj okazigitaj dum la tagoj 18, 19 kaj 20^a de Julio kontentige sukcesis. En Teatro Lirico okazis propaganda vespero kaj prezentado de komedio kiun ludis la trupo de S-ro Fuster. Ankaŭ ekspozicio estis organizita. Por solenigi tiun sukceson kaj la datrevenon de la jam malnova klubo la esperantistoj kunigis en festeno kiu okazis en la hotelo Ca's Català. Ĉe la fino de la manĝo parolis la Prezidanto de la Klubo S-ro Sebastià Crespí, S-ro Miguel Arbona el Soller kaj, laŭ peto de la ĉeestantoj, la honora Prezidanto de la Societo kaj Lingvakomitato S-ro Narcís Bofill kiu esprimis sian kontenton por la progreso de la esperantismo en Palma kaj ankaŭ en la tuta insulo.

Literatura konkurso estis ankaŭ organizata: premiojn ricevis S-roj Noguera, Arbona, Barceló, Colom kaj Menen.

Aperis fotografo de la festenantoj en la ĵurnado La Almudaina.

NATURA FLORO.—Ni ĵus sciigas ke en la Floraj Ludoj de Vinaroĉ atingis la plej honoran premion, tio estas, la Naturan Floron F-no Varma Järvanppä el Finnlando. Ŝi elektis kiel Reĝinon de la Florluda Festo la ĉarman fraŭlinon Maria de la Victoria Perez de Sanmillán.

Dolĉa morto

Por viŭ ami, ho Dio, min ne movas
la ĉielo al ĉiuj promesita,
nek de l' infer' mi estas timigita
kiam mi el la peko min forŝovas.

Vi min movas, ho Dio, ĉar mi trovas
pian vidon ĉe Vi, mortkrucumita;
emocias min via korp' vundita,
kies angoroĵn mi imagi provas.

Min movas via am', en maniero
ge, sen ĉiel', ekzistus mia amo,
kaj mi timus al Vi, eĉ sen infero.

Mi esperas nenion sur la tero;
kaj mia am' al Vi, estus la samo,
eĉ se en mi ne vivus glorespero.

Verkita de anonima hispana aŭtoro en la
XVI^a jarcento.

Trad. JAUME GRAU CASAS.

(Traduko dediĉata al «Espero Katolika», kiu riproĉis nian «Kataluna Esperantisto»).

Estatuts de la Federació d'Esperantistes

Article primer.—Amb el nom de «Federació Catalana d'Esperantistes» hom constitueix una federació d'esperantistes en terres de llengua catalana.

Art. segon.—L'objecte de la «F. C. d'E.» és la unió de tots els esperantistes en terres de llengua catalana per a la divulgació i propaganda de l'Esperanto, pels fins de la representació aconsellada en la reunió general del V Congrés Internacional d'Esperanto celebrat a Barcelona, per a complimentar tots els acords i resolucions, que afecten als esperantistes com a col·lectivitat, emanats dels Congressos Internacionals o dels nuclis directors de la llengua del Dr. Zamenhof.

Art. tercer.—Per a el millor compliment de l'article anterior, la «F. C. d'E.» publicarà una revista, l'organització de la qual serà determinada per un reglament especial interior publicat pel cos de redacció i prèvia acceptació del Comitè Directiu. El preu de l'abonament a la revista serà de sis pessetes anyals.

Art. quart.—La «F. C. d'E.» constarà de membres associats i de membres isolats; els primers seran federats per mitjà de l'entitat a la qual pertanyin i els altres directament i en caràcter particular.

Els diversos organismes pertanyents a la «F. C. d'E.» contribuiran el seu sosteniment amb la quota trimestral, pagada a la bestreta, de 0'40 ptes. almenys per cada soci i els individuals amb una quota mínima de 3'50 ptes. anuals, pagada a la bestreta.

Art. quint.—La «F. C. d'E.» serà regida per un Comitè Directiu, renovable cada any, compost de President, Vice-president, Secretari, Vice-secretari, Comptador, Caixer, Administrador i quatre Vocals.

Art. sisè.—El Comitè de la «F. C. d'E.» convocarà almenys una vegada a l'any, en diferents localitats, durant la primavera i en dia festiu, tots els federats, en Assemblea o Congrés general, en el qual, prèvia ordre del dia hom donarà compte als assistents dels treballs i gestions acomplerts pel referit Comitè Directiu durant el seu exercici, hom acordarà el lloc on deurà celebrar-se el vinent Congrés o Assemblea, hom nomenarà els individus que deuran constituir el Comitè el pròxim exercici, i hom discutirà les proposicions que hagin estat presentades abans de la sortida del número de la revista anunciant el Congrés o Assemblea, i anunciades en l'ordre del dia.

Art. setè.—El Comitè serà facultat per a crear les seccions que cregui més convenients per a la prosperitat de la «F. C. d'E.» i de l'Esperanto, les juntes de les quals seran renovades per cada Comitè de bell nou elegit.

Serà president nat de cada secció un individu del Comitè designat pel mateix.

Art. vuitè.—Tots els esperantistes pertanyents a organitzacions federades tindran veu i vot en les Assemblees anuals, però el seu vot serà delegable al president d'un grup o una altra persona qualificada, prèvia la presentació dels corresponents carnets de soci.

Art. novè.—Tots els acords de les Assemblees o Congressos seran presos per majoria absoluta de vots dels socis assistents. Les esmenes que puguin presentar-se a aquest reglament deuran ésser presentades amb la deguda antelació per tal d'incloure-les en l'ordre del dia i publicades en la seva totalitat, puix que només podran ésser discutides i aprovades en les Assemblees o Congressos generals.

Art. desè.—La llengua oficial de la «F. C. d'E.» serà l'Esperanto, podent també emprar-se la catalana en les Assemblees.

Art. onzè.—Aquesta «F. C. d'E.» podrà actuar mentre compti amb dues col·lectivitats organitzades o trenta membres isolats. En cas de dissolució, previ acord d'ella, l'actiu existent serà lliurat al caixer de la Constant Representació de les Societats Nacionals Esperantistes.

Art. dretor.—La «F. C. d'E.» serà domiciliada a Barcelona carrer València, 245.

Noves edicions

R. U. R. Rosumaj Universal Robotoj. Drama de Capek-Karel. Representat amb gran èxit en el Teatre Romea de Barcelona. Traduit a l'Esperanto per Moraviaj Esperanto Pioniroj. Preu 3'50 pessetes.

JAVAJ LEGENDOJ. Liem Tjong Hie; molt recomanable. Preu 1'25 pessetes.

CURS PRACTIC DE LA LLENGUA ESPERANTO. Pujulà Vallés. Preu, 0'70 pessetes.

ENCIKLOPEDIA VORTARO de WÜSTER. Han sortit fins avui tres parts; cada una val 21 pessetes.

MAŠINFAKA ESPERANTO VORTARO PRIELEMENTA. Wüster. Preu 2'80.

UNIVERSALA ESPERANTISTIGILO: D-ro Benson, en ses lekcioj, eldonoj kataluna aŭ hispana. Cada lliçó: 1 pesseta.

Nota: Cal afegir el 5 per cent dels preus senyalats, per les despeses de correu, en cas d'ésser els llibres enviats fora de Barcelona. Cal que l'adreça sigui ben clara.

Dirigir-se a Ferd. MONTSERRAT, Villarroel, 107, 2.º, 2.ª Barcelona. IBERIA ESPERANTO SERVO.

XV^a Kongreso de la Esperantista Federacio


VINAROÇ 8-9 Septembro 1928^a




PAROĤA PREĜEJO



ERMITEJO SANT SEBASTIÁ




KASTELO EN PENYÍSCOLA



LA HAVENO




PLACO DE LA KONSTITUCIO




LA URBO PENYÍSCOLA



LA MARBORDO



PENYÍSCOLA - ÂGENERALA VIDAJO



VINAROÇ - KOMERCA HAVENO